La lernoĉambro en siberia Popola Domo. Sur la muroj estas instruaj bildoj. Ili montras objektojn, florojn, bestojn, homojn. La instruisto estas soldato, sed ne en uniformo. Li estas hungaro kaj militkaptito. Li iras en la ĉambro, montras la bildojn, tuŝas la objektojn. Li instruas. La lernantoj kaj lernantinoj komprenas lin.

– Sinjoroj kaj sinjorinoj, ni parolas en Esperanto. Kio ĝi estas? Ĉu ĝi estas politiko? Ne! Ĉu ĝi estas religio? Ne! Ĝi estas kulturo? Ĉu vi komprenas?

La instruisto demandas, la lernantoj kaj lernantinoj respondas.

– Jes, ni komprenas.

Li instruisto iras en la ĉambro kal li faras demandojn. La lernantoj kaj lernantinoj faras bonajn respondajn frazojn... .



domo en Siberio



*2. Ответьте на вопросы.*

Kie okazas la leciono? Pri kio estas leciono? Kio estas sur la muroj? Kion montras la bildoj? Kio estas instruisto? Kion li faras en la lernoĉambro? Kio estas Esperanto? Kion faras gelernantoj? Ĉu ili komprenas la instruiston? Kiajn frazojn faras la lernantoj kaj la lernantinoj?

*3. Сопоставьте уроки, описанные в рассказах М.Бронштейна и Ю.Баги.*

В чём их различия? Используйте опорные слова: klaso – lernoĉambro, tabulo - muro, instruistino - instruisto, gelernantoj - gesinjoroj, pri Miĉjo - pri Esperanto.

***XV. Прочитайте и выучите пословицы. Найдите их русский эквивалент.***

Kia patrino, tia filino.

Kia estas via laboro, tia estas via valoro.

Kun kiu vi festas, tia vi estas.

**Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj**

*Задание II – Tasko II*

La ĉifrogramo de la sultano. Anna staras ĉe la tabulo. La bildo pri mamutido. La malkovro de patro de Lena. La nova vivo de Miĉjo. Krim atente skribas. Granda kaj ruĝa nazo de Krim.

*Задание X – Tasko X*

Duono de niaj klasanoj estas knaboj. Triope ni krias pli laŭte, ol sonas lerneja sonorilo. Nun estas kvarono antaŭ la 12a horo. Mi kvaronigis la pomon. La sportisto faris duoblan salton. Nia grupo triobliĝis. Kune ni estas trioble pli fortaj. Ni sidas duope ĉe la kameno. Ŝi havas duonfraton.

*Задание XII – Tasko XII*

Lernu Esperanton diligente!

## УРОК 4 – LECIONO 4

### Грамматика – Gramatiko



– **os** – окончание глаголов в будущем времени: Ni scios multe. Я буду знать много. Aleks fermos fenestron. Алекс закрывает окно.

– **et** – суффикс выражающий уменьшение: knabo (мальчик) – knabeto (мальчишечка), varma (тёплый) – varmeta (тёпленький), dormi (спать) – dormeti (дремать);

– **eg** – суффикс выражающий увеличение: domo (дом) – domego (домище), longa (длинный) – longega (длиннющий, очень длинный), sonogi (звонить) – sonoregi (звонить очень громко);

**re** – приставка, обозначающая «снова», «назад»: lego (чтение) – relego (перечитывание), doni (дать) – redoni (отдать);

**kiom da** – вопросительно-относительная конструкция (два слова), обозначающая «сколько»: Kiom da infanoj sidas? Сколько детей сидят? Kiom da maroj estas sur la Tero? Сколько морей на Земле?

**kioma** – вопросительное прилагательное, обозначающие «который?» (о числе, об очередности): Sur kioma etaĝo loĝas via amiko? На каком этаже живет ваш (твой) друг? En kioma klaso vi estas? В каком ты классе? Kioma horo estas? Который час?

**ke** – подчинительный союз, обозначающий 1) «что» и вводящий подчиненное предложение. Vi scias, ke mia kostumo estas nova. Вы знаете, что мой костюм – новый. 2) «чтобы» перед формой повелительного наклонения. Mi volas, ke vi desegnu. Я хочу, чтобы вы рисовали.

### Задания – Taskoj

**I. Прочитайте следующие слова с интернациональными корнями и назовите их русский эквивалент:** aŭto, pistolo, dolaro, kilogramo, paro.



**II. Прочитайте текст «En la parko».**

### **En la parko**

Jen estas la horloĝo. Kioma horo estas? Jam estas tri kvaronoj post la sepa. Ne dormu, geknaboj! Ĉu vi rememoris, ke hieraŭ la instruistino diris: «Morgaŭ ni iros al Miĉjo»? Hodiaŭ jam estas morgaŭ.

Mateno. En la blua ĉielo sub la suno petolas hirundoj. Kiom da lernantoj iras laŭ la strateto? Dudek ses gelernantoj iras po pare. Sed hieraŭ estis dudek kvar! La lasta paro ne estas lernantoj. Ili estas Krim kaj Graf.

Miĉjo promenas en la parko inter verdaj arboj.



hirundoj

Ĝi ekvidis la infanojn. Ĝi levas la rostron kaj salutas ilin: «Ŭa-a!». Apud Miĉjo estas oĉjo Boĉjo. Li balaas la vojeton. Ĝojas la infanoj. Ĝojas ankaŭ la mamutido.

– Ah, kia amuza, kia bona ĝi estas! – diras knabinoj. Ili karesas ĝiajn grandajn orelojn. Tio tre plaĉas al Miĉjo.

– Ĉu ni povas regali Miĉjon per bombonoj? Per bulko?

– Jes, sed ne donu al ĝi tre multe!

– Kiom da kilogramoj pezas Miĉjo?

– Kvarcent kvindek. Ĝi estas eta. Grandegaj mamutoj pezis ĉirkaŭ du tunojn.

– Kvarcent kvindek! – flustras Krim al Graf. – Oho! Ni devas trovi aŭton... aŭ helikopteron... Ili iras al oĉjo Boĉjo.

– Kion vi volas, infanoj?

– Ni ne estas infanoj, – respondas Krim. Li montras al oĉjo Boĉjo grandan nigran pistolon. Graf murmuras kaj montras kvin dolarojn. – Elektu!

**III. Составьте самостоятельно план рассказа и запишите его.**

**IV. Подберите к каждому пункту плана уточняющие его предложения из текста.**

**V. Перескажите кратко основное содержание текста.**

**VI. Найдите в тексте описание погоды и природы во время прогулки в парке.**

1. Ответьте на вопросы.

Kiam okazas la promeno en la parko? Kia estas la ĉielo? Ĉu la suno brilas? Kiu petolas sub la suno? Ĉu la parko havas vojetojn? Ĉu estas verdaj arboj en la parko?

2. Обратите внимание на перевод следующих слов:

printempo – весна

monato – месяц

vetero – погода

somero – лето

jaro – год

labori – работать

aŭtuno – осень

tago – день

riprozi – отдыхать

vintro – зима

semajno – неделя

sekvi – следовать



**VII. Прочитайте текст «La kalendaro». Обратите внимание на (про)чтение и написание числительных.**

### La kalendaro

Jen la kalendaro de la jaro 2012 (du mil dek du). La jaro 2012 estas dek dua jaro de la 21 (dudek unua) jarcento. Unu jaro konsistas el 12 (dek du) monatoj, unu monato – el 4 (kvar) semajnoj, unu semajno – el 7 (sep) tagoj. Unu jaro havas 365 (tri cent sesdek kvin) aŭ 366 (tri cent sesdek ses) tagojn. Jen la

monatoj de la jaro: januaro, februaro, marto. aprilo. majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro kaj decembro. Februaro havas 28 (dudek ok) aŭ 29 (dudek naŭ) tagojn. Januaro, marto, majo, julio, aŭgusto, oktobro kaj decembro havas po 31 (tridek unu) tagoj. Aprilo, junio, septembro kaj novembro havas po 30 (tridek) tagoj. Marto, aprilo kaj majo estas printempaj monatoj. Junio, julio kaj aŭgusto estas someraj monatoj. Septembro, oktobro kaj novembro estas aŭtunaj monatoj. Decembro, januaro kaj februaro estas vintraj monatoj. La 7 tagoj de la semajno estas: lundo, mardo, merkredo, jaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo. Lundo, mardo, merkredo, jaŭdo, vendredo kaj sabato estas labortagoj. Dimanĉo estas ripoztago.



### 1. Ответьте на вопросы.

Kiu jaro nun estas? Kiu jarcento nun estas? Kiom da monatoj havas unu jaro? Kiuj estas la monatoj de la jaro? Kiom da tagoj havas februaro? Kiom da tagoj havas julio? Kiom da tagoj estas en novembro? Kiujn monatojn havas printempo? Kiun sezono vi ŝatas? Kiun monaton vi ŝatas? Kiom da semajnoj havas unu monato? Kiom da tagoj estas en unu semajno? Kiuj tagoj de la semajno estas labortagoj? Kiu tago de la semajno estas ripoztago? Kiun tagon de la semajno vi ŝatas?

Internacia Festivalo		januaro 2015	
ĵaŭ	1	31-a F. - rojara promeno	
ven	2	31-a F. - 2007	
sab	3	31-a F. frigas / plitoroga tago	- friga la vespero de F. ADIAO -
dim	4	31-a F. - plitoroga tago frigas	
lun	5		
mar	6		semajno 2
mer	7		
ĵaŭ	8		
ven	9		
sab	10		
dim	11		
lun	12		3
mar	13		
mer	14		
ĵaŭ	15		

E-kalendaro

### 2. Расскажите об одном из месяцев года.

**Пример:** Majo. Ĝi estas la lasta monato de la printempo. Aliaj printempaj monatoj estas marto kaj aprilo. Majo estas la kvina monato de la jaro. La antaŭa monato estis aprilo. La sekva monato estos junio. Majo havas 31 tagojn. Po 31 tagoj havas ankaŭ januaro, marto, julio, aŭgusto, oktobro kaj decembro. La tagoj en majo estas longaj. En majo estas varme.

### 3. Прочитайте и выучите наизусть одно из стихотворений венгерского автора V.Setälä.

#### La jaro

Tridek tagoj en septembro.  
 en april', juni', novembro.  
 Dudek ok en februaro,  
 Dudek naŭ en superjaro.  
 Restas sep monatoj, kiuj  
 Havas tridek unu ĉiuj

#### La semajno

Lundo, mardo kaj merkredo  
 poste jaŭdo kaj vendredo  
 sekvas sese la sabato  
 kaj la sepa, la dimanĉo  
 en la kapo, sen eraro  
 la semajna kalendaro.

### VIII. Найдите и запишите названия месяцев, чьи буквы перепутаны:

O	R
F	U
A	R
E	B

T	A
G	S
O	Ŭ
U	

E	O	V
B	M	R
O	N	



***IX. Дополните предложения подходящими по смыслу словами.***

La unua \_\_\_ de la jaro estas januaro, la lasta – \_\_\_\_. En unu monato estas 4 \_\_\_ kaj en ĉiu semajno 7 \_\_\_\_. Oni laboras nur dum la unuaj 6 \_\_\_\_, la lasta estas \_\_\_\_, ĝi estas \_\_\_.

***X. Заполните пропуски окончаниями глаголов -is, -as, -os, -us или -u.***

Hieraŭ knabo regal\_\_ geamikojn per bombonoj. Ven\_\_ gaste al ni! Post du horoj mi deĉifr\_\_ la karton. Hodiaŭ li montr\_\_ al ni horloĝon. Inter lecionoj ni aŭskult\_\_ klasikan muzikon. Se vi ven\_\_ je la ĝusta tempo, ni ne malfru\_\_. Baldaŭ nia popolo dev\_\_ elekti prezidenton. Lern\_\_ bone! Ĵus ekson\_\_ la gitaro. Matene ili gimnastik\_\_. La vazo fal\_\_ sur plankon. Ni kant\_\_ kune. Morgaŭ juristo respond\_\_ al viaj demandoj. La sinjorino ĝoj\_\_, sed venis malbona informo. La suno lum\_\_ ĉiam.

***XI. Посмотрите внимательно на циферблаты часов. Который час? Прочитайте и запомните выражения, обозначающее время:***



kvin minutoj antaŭ la sepa horo



dudek minutoj antaŭ la deka horo



dek minutoj post la dekunua horo



dudek kvin minutoj post la oka horo



la naŭa horo kaj duono



la oka horo kaj kvarono

**XII. Прочитайте и запишите следующие цифры, обозначающие время:**

5.45; 6.20; 8.55; 10.30; 12.10; 14.40; 16.15; 18.30; 20.55; 22.00; 23.40.

**XIII. Переведите письменно, обращая внимание на употребление числительных.**

1. Который сейчас час? Без пяти пять? Я приду в 7 часов вечера. Жди меня в 12 часов дня. Поезд прибывает в полночь. Завтра ученики нашего класса идут в музей в 15 часов 15 минут.

2. Сколько весят четыре банана? Они весят один килограмм. Папа купил пять больших помидоров.

Девочка съела две конфеты. Я вешу 56 килограммов.

3. Мой костюм стоит 768 рублей. У тебя есть 10 рублей? В нашей группе – 25 студентов. 2 500 человек работают на фабрике.



tomatoj

**XIV. Используя аффиксы re-, for-, -et-, -eg- образуйте новые слова и переведите их. Составьте предложения с образованными словами.**

<b>re-</b>	<b>for-</b>	<b>-et-</b>	<b>-eg-</b>
demandi	doni	dormi	peti
presi	manĝi	bela	domo
vidi	tiri	hotelo	vagono
komenco	esto	knabino	granda
lego	iro	muso	bone
veno	veturo	diligenta	varme

**XV. Переведите следующие предложения. Что обозначают выделенные слова?**

En **fora** vilaĝo estas multaj belaj **dometoj**. Ili veturas **foren**. **Ŝi ege** satas teatron. Mia **ega** deziro estas viziti Aŭstralion. Via **eta** fratino bele dancas. **Rea** flugo estis tre agrabla. En koridoro li marŝis tien kaj **reen**.

**XVI. Прочитайте пословицы. Найдите их русский эквивалент.**

Amikon karesu, sed kalkuli ne forgesu!

Ne ŝovu nazon en fremdan vazon.

Ne prediku knabino al sia patrino.

**Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj**

*Задание VI – Tasko VI*

Februaro. Aŭgusto. Novembro.

### *Задание VIII - Tasko VI*

Hieraŭ knabo regalis geamikojn per bombonoj. Venu gaste al ni! Post du horoj mi deĉifros la karton. Hodiaŭ li montras al ni horloĝon. Inter lecionoj ni aŭskultas klasikan muzikon. Se vi venus je la ĝusta tempo, ni ne malfruus. Baldaŭ nia popolo devos elekti prezidenton. Lernu bone! Ĵus eksonis la gitaro. Matene ili gimnastikas. La vazo falis sur plankon. Ni kantas kune. Morgaŭ juristo respondos al viaj demandoj. La sinjorino ĝojis, sed venis malbova informo. La suno lumas ĉiam.

### *Задание X – Tasko X*

5.45 – kvarono antaŭ la sesa horo; 6.20 – sesa horo dudek minutoj; 8.55 – kvin minutoj antaŭ la naŭa horo; 10.30 – duono post la deka horo; 12.10 – dek minutoj post tagmezo; 14.40 – dudek minutoj antaŭ la tria; 16.15 – kvarono post la deksepa horo; 18.30 – duono post la dekoka horo; 20.55 – kvin minutoj antaŭ la dudekuna horo; 22.00 – dudekdua horo; 23.40 – dudek minutoj antaŭ la meznokto.

### *Задание XI – Tasko XI*

1. Kioma horo nun estas? Kvin minutoj antaŭ la deksepa? Mi venos je la sepa horo. Atendu min tagmeze. Trajno alvenas noktomeze. Morgaŭ gelernantoj de nia klaso iras al muzeo je kvarono post la dekkvina horo.
2. Kiom pezas kvar bananoj? Ili pezas unu kilogramon. Paĉjo aĉetis kvin grandajn tomatojn. Knabino formangis du bombonojn. Mi pesas kvindek ses kilogramojn.
3. Mia kostumo kostas sep cent sesdek ok rublojn. Ĉu vi havas dek rublojn? En nia grupo estas 25 gestudentoj. Du mil kvincent homoj laboras en fabriko.



## УРОК 6 – LECIONO 6

### Грамматика – Gramatiko



– **ind** – суффикс обозначающий «достойный определенного отношения», «достойный чего-либо»: **aŭskultinda** – достойный быть услышанным, **rimarkinda** – достойный быть замеченным, **lerninda** – достойный быть выученным;

**oni** – неопределенно-личное местоимение, которое не переводится; обычно ему сопутствует глагол, который вместе с местоимением **oni** соответствует 3 лицу множественного числа или безличному обороту: **Oni** iras. Идут. **Oni** atendas. Ждут. **Oni** parolu! Пусть говорят. **Oni** devas. Нужно.

– **us** – окончание глаголов в условном наклонении: **Petro volus lerni pli bone**. Петр хотел бы учиться лучше. **Mi restus hejme**. Я остался бы дома.

**Безличные глаголы** употребляются без подлежащего и обозначают явления природы и различные отношения к происходящему: **Hodiaŭ pluvas**. Сегодня идёт дождь. **Utilas ridi**. Полезно смеяться. **Necesas multe labori**. Необходимо много работать. **Eblas promeni en parko**. Есть возможность (возможно) погулять в парке.

### Задания – Taskoj



#### *I. Прочитайте текст «Miĉjo malsanas».*

#### **Miĉjo malsanas**

Hieraŭ estis dimanĉo. Bonega tago! Ĉar venis infanoj. Ili karesis Miĉjon, regaligis ĝin per bongustaĵoj, dancis ĉirkaŭ ĝi. Ankaŭ ĝi dancis!

Sed hodiaŭ estas lundo. Griza tago. Nokte ekpluvis. Miĉjo frostis kaj tremis en sia dometo. Sed oĉjo Boĉjo, la gardisto, ne alportis varman kovrilon. Li ronkis en la kuirejo tutan nokton. Tage Krim donis al li kvin dolarojn. Oĉjo Boĉjo aĉetis kontraŭ tiu mono du botelojn da vodko kaj fortrinkis ĝin.

Do, matene Miĉjo ektusis. Ĉu vi vidis, kiel tudas la mamutoj? Certe, vi ne vidis tion. Miĉjo levas la rostron, dolore kaj profunde enspiras aeron. Poste ĝi fermas la okulojn, malfermas la buŝon kaj tre sopire elmamutas: «Ŭah-Haa!!!». Kompatinda Miĉjo – ĝi ekmalsanis. Ĝi havas altan temperaturon – pli ol tridek ok gradojn. Oni devas urĝe kuraci Miĉjon.

Lidia maltrankvilas. Ŝi vorte mokis Boĉjon. Ŝi eĉ promesis plendi al profesoro Maksim. Se ŝi plendus, oĉjo Boĉjo perdus la laboron. Boĉjo ploretis kaj petis pardonon.

– Nu bone, – diris Lidia, – jen estas aspirino. Dum tagmanĝo donu al la malsanulo dek du tablojdojn.

Ne forgesu – precize dek du!

– Bele! – ekkriis oĉjo Voĉjo. – Bonega okazo! – kaj li kaŝe enmetis la tablojdon de Krim en la skatolon de Lidia. Poste li iris al Miĉjo kaj gratetis ĝian orelon.

– Ŭah-haa!!! – diris la mamutido.

– A-ap-ĉchi!!! – respondis oĉjo Voĉjo. – Nu, karuleto, verŝajne ankaŭ mi bezonas tablojdon...



tablojdoj



## ***II. Ответьте на вопросы.***

Kiu venis dimanĉe al Miĉjo? Kion ili faris? Kia tago estas lundo? Kial frostis Miĉjo? Kion faris oĉjo Voĉjo tutan nokton? Kio okazis matene al Miĉjo? Kiom altan temperaturon havas Miĉjo? Kio okazus al oĉjo Voĉjo, se Lidia plendus al profesoro Maksim? Kiom da tablojdoj transdonis Lidia al Voĉjo? Por kio? Kien Voĉjo metis la tabloidojn de Krim?

***III. Найдите в тексте предложения, в которых описывается болезнь Миши. Прочитайте их и переведите.***

***IV. Переведите письменно, используя текст рассказа.***

В воскресенье дети пришли к Мише. Они угостили его сладостями. Все танцевали. В ночь с воскресенья на понедельник шел дождь. Дядюшка Боря не принес теплое одеяло Мише. Боря храпел в кухне целую ночь. Утром Миша заболел. У него – высокая температура. Лидия обещала Боре пожаловаться Максиму. Боря всплакнул и попросил прощения. Лидия дала Боре аспирин для Миши. Боря обрадовался: «Замечательно! Я спрячу таблетку Крима среди таблеток Лидии».

***V. Передайте устно краткое содержание текста по плану.***

Dimanĉo – bonega tago.

Malbona lunda vetero.

Oĉjo Voĉjo kaj Krim.

Tuso de Miĉjo.

Pardonpeto de Voĉjo.

Aspirinaj tablojdoj.

***VI. Прочитайте предложения и составьте другие по образцу.***

Kia malfeliĉo! Mia patrino (mia avino, mia pliaĝa frato, mia patro, mia amiko...) malsaniĝis (ekmalsanis).

Feliĉe, nun ŝi (li) fartas bone (pli bone), tamen ŝi restas enlite (hejme).

Ŝi (li) malsanas, ĉar ŝi malvarmumiĝis (havas nazkataron).

Ŝi (li) ne fartas bone, ŝi havas kapdoloron (gorĝdoloron, dentdoloron).

Kuracist(in)o observis ŝin (lin) kaj preskribis medikamentojn (vitaminojn).

Kuracist(in)o permesis al ŝi(li) ekstari (iri surstraten, labori, lerni).

Ŝi (li) tre malsanas. Kuracist(in)o ne permesis al ŝi (li) ekstari (iri surstraten, labori, lerni).

Ŝi (li) ne manĝas (nenion).

Certe, necesas ke ŝi (li) kuŝu enlite.

Mi (mia patro, mia fratino) iras al apoteko por aĉeti medikamentojn (vitaminojn).

Feliĉe, ke oni ŝin (lin) ne hospitaligis.

**VII. Составьте небольшой рассказ о своем заболевшем друге (подруге), опираясь на следующие вопросы.**

Kiu malsaniĝis? Pro kio li (ŝi) malsaniĝis? Kiom da tagoj li (ŝi) kuŝas enlite? Ĉu oni vokis kuraciston? Kiel li (ŝi) kuracis sin? Kiel li (ŝi) fartas nun? Kion necesas fari por ne malsaniĝi (malvarmumiĝi)? Kiam li (ŝi) rekomencos labori (studi)?

**VIII. Вставьте вместо точек подходящие по смыслу безличные глаголы: pluvi, necesi, utili, ebli, neĝi, suni.**

Aŭtune ... ofte. ... helpi al maljunaj kaj malsanaj personoj. Mi ŝatas, kiam estas varmege kaj kiam ... . En Rusio multe ... vintre. Matene ... bone kaj sate manĝi. Hieraŭ ... doni kuracilon al infano.

**IX. Прочитайте и переведите следующие словосочетания, обращая внимание на значение суффикса – ind –. Составьте предложения с некоторыми из них:** hontinda konduto, lerninda lingvo, aŭskultinda historio, leginda libro, vizitinda muzeo, aminda junulino, aĉetinda kostumo, kompatinda knabeto, pardoninda misago.

**X. Составьте письменно предложения с неопределенно-личным местоимением oni и переведите их.**

	rapidis	tre	muziko.
	laboras	sen	lernejo.
	enuos	eĉ	malfrue.
Oni	ridis	al	lerni Esperanton.
	pardonas	en	plezuro.
	tagmanĝos	ĉiam	tendaro.
	promesas	kun	malamikojn.



**XI. Прочитайте фрагмент из книги «Mistero ĉe Nigra Lago» шведского писателя Стена Йохансона (Sten Johansson) и скажите, о чём в нем говорится. Обратите внимание на перевод следующих слов:**

admoni – уговаривать  
ĉagreni – огорчать  
fajfi – свистеть  
febroy – лихорадка

ferio – каникулы  
gluti – глотать  
gorĝo – горло  
muta – немой

pluraj – несколько  
skui – трясти  
spiti – действовать наперекор  
suferi – страдать

### **Mistero ĉe Nigra Lago**

...Timo havas febron. De pluraj tagoj lia gorĝo tiel doloras, ke li preskaŭ ne povas gluti. Lia patrino dudekfoje tage admonas lin, ke li trinku, sed li ne volas. Ne eblas trinki sen gluti. Li ne respondas, ĉar eĉ paroli dolorigas lin. Li nur mute skuadas la kapon. Kuracisto diris, ke li suferas de angino. Sekve de tio, li ne povas iri al la lernejo dum la lasta semajno antaŭ la someraj ferioj. Tio tamen ne ĉagrenigas lin. La lernejo ne estas lia plej granda plezuro...

Nun li kuŝas en sia lito kaj enuas... Timo enlite rigardas la televidan muzikokanalon MTV. Panjo malpermesis al li rigardi ĝin dum pli ol horo, sed li fajfas pri tio. Ŝi pensas, ke li havos febron pro MTV!



televidilo

Freneze. Li eĉ devis spiti la gorĝan doloron por demandi, ĉu ŝi neniam aŭdis pri bakterioj. «Kiam mi estis infano, troviĝis nek televido nek bakterioj. Kaj neniuj doktoroj loĝis en la vilaĝo, do ni estis sanaj. Kaj nia sola medikamento estis – la saŭno»...



*Ответьте на вопросы.*

Kiu malsanas? De kio suferas Timo? Kial la malsano ne ĉagrenas Timo-n? Kie kuŝas Timo? Kion pensas panjo pri febro de Timo? Kia sola medikamento ekzistis dum antaŭaj tempoj en Finnlando? Ĉu vi ofte malsanas? Kiam vi malvarmumiĝas, kion vi faras por

resaniĝi?

**XII. Прочитайте следующие пословицы и поговорки. Найдите их русский эквивалент.**

Ne helpas ploro al doloro.

Akvo kaj pano servas al sano.

Ne doloras frapo sur fremda kapo.

La tempo estas la plej bona kuracisto.

## **Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj**

### *Задание IV – Tasko IV*

Dimanĉe infanoj venis al Miĉjo. Ili regalis Miĉjon per bongustaĵoj. Ĉiuj dancis. Nokte de dimanĉo al lundo pluvis. Oĉjo Boĉjo ne alportis kovrilon por Miĉjo. Boĉjo ronkis en la kuirejo tutan nokton. Matene Miĉjo ekmalsanis. Li havas altan temperaturon. Lidia promesis plendi al Maksim. Boĉjo ekplorete kaj petis pardonon. Lidia donis aspirinon por Miĉjo. Boĉjo ekĝojis: «Bele! Mi kaŝos tablojdon de Krim inter tablojdoj de Lidia».

### *Задание VIII – Tasko VIII*

Aŭtune pluvigas ofte. Necesas helpi al maljunaj kaj malsanaj personoj. Mi ŝatas, kiam estas varmege kaj kiam sunas. En Rusio multe neĝas vintre. Matene utilas bone kaj sate manĝi. Hieraŭ utilis doni kuracilon al infano.

## УРОК 7 – LECIONO 7

### Грамматика – Gramatiko



– **aĉ** – суффикс обозначающий «презрение», «плохое качество»: knabaĉo – плохой мальчик, vivaĉo – дрянная жизнь, babilaĉi – скверно болтать;

– **ar** – суффикс обозначающий собрание однородных предметов или лиц, образующих одно целое: arbo (дерево) – arbaro (лес), vagono (вагон) – vagonaro (поезд), infano (ребёнок) – infanaro (дети), haro

(волос) – hararo (волосы);

– **ad** – суффикс обозначающий длительность действия: marŝi (шагать) – marŝadi (шагать долго), studo (учение) – studado (учёба);

**ĉi** – частица обозначающая близость; она может употребляться вместо **tiu**  
**ĉi**:

tiu **ĉi** taso = **ĉi** taso – эта чашка

tiun **ĉi** tason = **ĉi** tason

tiuj **ĉi** tasoĵ = **ĉi** tasoĵ – эти чашки

tiujn **ĉi** tasojn = **ĉi** tasojn

**ĉi** vespere – этим вечером

**ĉi** semajne – на этой неделе

**ĉi** minuta – сиюминутный

**je** – предлог с неопределённым значением; применяется в тех случаях, когда ни один из предлогов, имеющих определённое значение, по своему логическому смыслу не подходит, но не следует злоупотреблять этим предлогом: malsana je gripo – больной гриппом, inda je rido – достойный смеха, pli peza je tri kilogramoj – тяжелее на три килограмма, je via sano! – за ваше здоровье! Je kioma horo vi tagmanĝas? В котором часу вы обедаете?

**ju (mal)pli ... des (mal)pli** – союзы, которые переводятся на русский язык «чем больше/меньше ... тем больше/меньше». Ju pli ni laboras, des pli bonan rezulton ni havas. Чем больше мы работаем, тем лучший результат мы имеем. Ju malpli li fumas, des pli sana li estas. Чем меньше он курит, тем он здоровее.

### ТАБЛИЦА ВОПРОСИТЕЛЬНЫХ, УКАЗАТЕЛЬНЫХ И НЕОПРЕДЕЛЕННЫХ МЕСТОИМЕНЕЙ и НАРЕЧИЙ

Начальными словообразовательными элементами местоимений являются слова, начинающиеся с **ki**– вопросительно-относительные; **ti**– указательные; **I**– неопределённые;

	<b>ki–</b>	<b>ti–</b>	<b>i–</b>
лицо или предмет	<b>kiu</b> – кто	<b>tiu</b> – тот	<b>iu</b> – кто-то
неопределённый предмет	<b>kio</b> – что	<b>tio</b> – то	<b>io</b> – что-то
качество	<b>kia</b> – какой	<b>tia</b> – такой	<b>ia</b> – какой-то
место	<b>kie</b> – где	<b>tie</b> – там	<b>ie</b> – где-то
время	<b>kiam</b> – когда	<b>tiam</b> – тогда	<b>iam</b> – когда-то
образ действия	<b>kiel</b> – как	<b>tial</b> – так	<b>iel</b> – как-то
причина	<b>kial</b> – почему	<b>tial</b> – потому	<b>ial</b> – почему-то
количество	<b>kiom</b> – сколько	<b>tiom</b> – столько	<b>iom</b> – сколько-то
принадлежность	<b>kies</b> – чей	<b>ties</b> – того (принадлежащий тому)	<b>ies</b> – чей-то

Слова с исходом на – **iu** могут употребляться самостоятельно и принимать окончания – **n** и – **j**. Слова с окончанием на – **io** могут употребляться самостоятельно и принимать лишь окончание –**n**. *Maria rimarkis iun en malhela strato.* Мария заметила кого-то на темной улице. *Iuj venas, aliaj foriras.* Кто-то приходит, другие уходят. *Io subite aperis antaŭ li.* Что-то внезапно появилось перед ним. *Ni lernas ion novan ĉiutage.* Каждый день мы учим что-то новое. *Le kantas birdo.* Где-то поёт птица. *Ial ŝi ne venis.* Почему-то она не пришла. *Kies kajero kuŝas sur la tablo?* Чья тетрадь лежит на столе? *Kiam vi aĉetos al mi bombonojn?* Когда вы купите мне конфет? *Kiel vi fartas?* Как вы поживаете? *Tio estas skribilo.* Это – ручка. *Tian historion mi aŭdis de la avino.* Эту историю я слышал от бабушки. *15 eŭroj – tiom kostas la florbukedo.* 15 евро – столько стоит букет цветов.

## Задания – Taskoj



*1. При чтении текста «Ombroj en nokto» обратите внимание на значение следующих слов: elektra, efika, eĥi, parko, ŝnuri (ŝnuro), «Chappy», «Whiskas».*

### **Ombroj en la nokto**

Estas la oka post tagmezo. Kies aŭto venis al la parko? Ĝi estas la aŭto de Maksim. Por efika kuracado li decidis preni Miĉjon por nokto en pli varman lokon – en la hejmon de Lena. Miĉjo levas la rostron salute. Oĉjo Boĉjo kviete dormas en sako da fojno. Miĉjo mem eniras en la aŭton, kaj la aŭto forveturas.

Je la dua nokte sub arboj de la parko ekbruis argano. Du ombroj saltis de sur ĝi kaj komencis esplori la parkon.

– Diablo! Mil diabloj! Terura mallumo! Kie dormas tiu ĉi bestaĉo?! – flustris unu ombro.

– Miaŭ! Jen! Jen! – flustris la dua.

– Aha! Jen ĝi ronkas – granda... mola. Ŝnuru ĝin kaj donu al mi la hokon. Atente... Silente! Jen estas la truo. Levu.



– Fino. Ĝi kuŝas en la aŭto. Nun ni fuĝu. Kaj ju pli rapide, des pli bone!



skatolo da  
«Whiskas»

...La aŭto haltis en densa arbaro ĉe bordo de lago. La du ombroj ektumultis apude.

– Atentu, aĉulo! – kriis Krim. – Mi malfermos la kaĝon. Movu, movu pli proksimen... jen, ĉi tie haltu... mallevu... halt! Bone, forprenu la hokon; mi fermos la kaĝon... en ordo.

– Murr...miaŭ! – kontente reeĥis Graf.

Krim viŝis de la frunto ŝviton, donis al Graf skatolon da «Whiskas» kaj mem prenis botelon.

– Nia estos la miliono! Morgaŭ nokte venos submara ŝipo kaj... Je via sano! Kaj nun ni rigardu la bestaĉon pli proksime. Jen – ronkas ĝi nun!

Krim tiris el la poŝo elektran lanternon...

## ***II. Прочитайте и найдите предложения, соответствующие тексту.***

1. Je la oka horo post tagmezo venis aŭto de Krim. Je la oka horo post tagmezo venis aŭto de Maksim.
2. Miĉjo veturos en la hejmon de Lena. Miĉjo veturon en la zooĝardenon.
3. Oĉjo Boĉjo plezure promenas en la parko. Oĉjo Boĉjo kviete dormas en sako da fojno.
4. Nokte ekbruis argano. Nokte ekŝtormis uragano.
5. Kvar ombroj esploris la ĝardenon. Du ombroj esploris la parkon.
6. Graf ŝnuris la bestaĉon. Krim ŝnuris la bestaĉon.
7. «Mil diabloj!» – kontente reeĥis Graf. «Mil diabloj!» – flustris unu ombro.
8. Krim donis al Graf skatolon de «Whiskas». Krim donis al Graf skatolon de «Chappy».
9. Morgaŭ matene venos mara ŝipo. Morgaŭ nokte venos submara ŝipo.
10. Krim tiris el la poŝo elektran lanternon. Krim metis en la poŝon elektran lanternon.

## ***III. Найдите начало следующих предложений.***

- \_\_\_\_\_ li decidis preni Miĉjon por nokto en la hejmon de Lena.  
\_\_\_\_\_ en la aŭton, kaj la aŭto forveturas.  
\_\_\_\_\_ saltis de sur argano.  
\_\_\_\_\_ en densa arbaro ĉe bordo de lago.  
\_\_\_\_\_ la frunto ŝviton kaj prenis botelon.  
\_\_\_\_\_ la bestaĉon pli proksime.

## ***IV. Расставьте в нужном порядке пункты плана прочитанного текста.***

Revoj de Krim. Ĉe bordo de lago. Je la dua horo nokte. Alveno de Maksim. Nokta festeno kun «Whiskas» kaj botelo. Forfuĝo kun «la bestaĉo». Forveturo de Miĉjo.



## V. Перескажите текст, опираясь на следующие слова:

aŭto – parko – Maksim – Miĉjo,  
nokto – oĉjo Voĉjo – sako da fojno,  
parko – argano – du ombroj,  
mallumo – bestaĉo – aŭto,  
arbaro – bordo de lago – kaĝo,  
Krim – botelo – Graf – «Whiskas»,  
miliono – bestaĉo – submara ŝipo.

## VI. Внимательно ознакомьтесь с таблицей в грамматической части урока.



1. Ответьте на вопросы, употребляя указательные слова.

Пример: **Kiu** knabino bele kantas? **Tiu** knabino bele kantas.

Kio estas interesa? Kia jupo estas longa? Kies ĝardeno estas eksterurbe? Kie li estas? Kien ŝi iras? Kiam ni dormos? Kiel vi fartas? Kiom pezas la mamutido?

2. Переведите, обращая внимание на употребление вопросительных слов.

Что это? Это – парк. Что вы делаете? Сколько детей играет во дворе? На каком стуле он сидит? – Он сидит на том стуле, который стоит у окна. Что в этой книге? – В этой книге то, что и в другой книге. Куда ты едешь? Какой Вы человек? Где стоит дом? – Дом стоит там. Я сделал столько, сколько я смог. Почему ты плачешь? Чей ботинок?

## VII. Прочитайте предложения.

1. Переведите, объясняя значение суффиксов –ad–, –aĉ–.

Se ofte ridaĉi, mankas tempo por maĉi. Antaŭ tagmezo mi lernadas. La lernado estas interesa. La aĉetado de ŝuoj daŭris la tutan horon. Ĉi hundaĉo vagas sola. Mi ne ŝatas tiun ĉi kaĉaĉon. Kiu estas aĉa junulo? Kiu ludados kun infanoj? Ili restadis en kuracloko. Feliĉe la kantaĉo daŭris nelonge.

2. С помощью суффикса –ar– образуйте новые слова и переведите их: arbo, delegito, homo, junulo, kampo, vorto.

3. Составьте письменно по 2 предложения со словами, содержащими суффиксы –aĉ–, –ad–, –ar–.

4. Выучите наизусть четверостишие венгерского писателя István Szerdahelyi.

**F**ihomo, se estas  
morala difekt’.  
**H**omaĉo, se ŝokas  
malplaĉa aspekt’.



Istvan Szerdahelyi

**VIII. *Прочитайте и переведите следующие предложения. Обратите внимание на употребление частицы ĉi.***

Mi ne legis tiun ĉi libron. Tiu ĉi knabino estas bela. Kiu venas ĉi tien? Ĉi jara vintro estis varma. Ĉi tiuj gelernantoj estas diligentaj. Ĉi tion vi ne manĝu! Ĉi matene mi ne gimnastikos. Ĉi homo estas honesta. Ĉi pomoj estas bongustaj.

**IX. *С помощью словаря переведите следующие выражения и запомните их. Составьте предложения с некоторыми из переведенных выражений:***

поднять хобот, поднять шум, поднять на смех, поднять флаг, поднять крик, поднять зарплату, поднять тревогу, поднять вопрос.

**X. *Составьте письменно предложения, правильно соединив части А и В.***

<b>A</b>	<b>B</b>
Ju pli mi lernas	des pli vi estas trankvila.
Ju malpli vi riskas	des pli li ŝatas aŭdi ĝin.
Ju pli li aŭskultas la muzikon	des pli malmulte oni gajnas.
Ju pli suno brilas	des pli mi komprenas, ke mi malmulte scias.
Ju malpli oni laboras	des pli la naturo reviviĝas.

**XI. *Прочитайте и переведите следующие пословицы и поговорки. Дайте их русский эквивалент.***

**Ju pli** granda la deziro, **des pli** kara la akiro.

**Ju pli** frua veno, **des pli** bona preno.

**Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj**

*Задание VI – Tasko VI*

2) Kio ĝi estas? – Ĝi estas parko. Kiom da infanoj ludas en korto? Sur kiu seĝo li sidas? – Li sidas sur tiu seĝo, kiu staras ĉe fenestro. Kio estas en tiu ĉi libro? – En tiu ĉi libro estas tio, kio estas en alia libro. Kien vi veturas? Kia homo Vi estas? Kie staras domo? – Domo staras tie. Mi faris tiom, kiom mi povis. Kial vi ploras? Kies estas boteto?

*Задание IX – Tasko IX*

поднять хобот – levi rostron, поднять шум – fari bruon, поднять на смех – ridindigi, поднять флаг – hisi flagon, поднять крик – ekkrii el la tuta gorĝo, поднять зарплату – plialtigi salajron, поднять тревогу – krei alarmon, поднять вопрос – levi demandon

*Задание X – Tasko X*

1. Ju pli mi lernas, des pli mi komprenas, ke mi malmulte scias.

2. Ju malpli vi riskas, des pli vi estas trankvila.

3. Ju pli ŝi aŭskultas la muzikon, des pli ŝi ŝatas aŭdi ĝin.

4. Ju pli suno brilas, des pli la naturo reviviĝas.

5. Ju malpli oni laboras, des pli malmulte oni gajnas.

## УРОК 8 – LECIONO 8

### Грамматика – Gramatiko



– **ebi** – суффикс, который означает «возможность». Ĉi tie la akvo estas trinkebla. Здесь вода – питьевая. Somere ni pasigis la neforgeseblajn tagojn ĉe la maro. Летом мы провели незабываемые дни у моря. Eble, post unu jaro ni veturos al Parizo. Возможно, через год мы поедem в Париж.

– **ig** – суффикс, который означает «сделать, заставить сделать (что-либо или каким-либо), привести в состояние»; глагол с суффиксом – **ig** – требует после себя слова в винительном падеже. Например: kuraĝigi – подбодрить, bonigi – улучшить, igi – заставить, skribigi – заставить написать, aligi – присоединить. Patrino preparis supron kaj poste manĝigis bebon. Мать приготовила суп и потом накормила ребёнка. La knabino ploris kaj mi trankviligis ŝin. Девочка плакала, и я её успокоил. La kefiro estas acida, dolĉigu ĝin. Кефир – кислый, подсласти его.

– **iĝ** – суффикс, который обозначает «стать, становиться, делаться». Mi esperantistiĝis en 1999. Я стал эсперантистом в 1999 году. Nia urbo plibeliĝas ĉiun jaron. Наш город становится краше с каждым годом. Pro la ekonomia krizo la prezoj plialtiĝis. Из-за экономического кризиса цены поднялись.

**Отрицательные слова** образуются от вопросительно-относительных путём замены начальной буквы **k**– на **nen**–. Они не влияют на употребление падежа. В отрицательных предложениях употребляется лишь одно отрицание:

<b>neniu</b>	никто
<b>nenio</b>	ничто
<b>nenia</b>	никакой
<b>nenie</b>	нигде
<b>neniam</b>	никогда
<b>neniel</b>	никак
<b>nenial</b>	без всякой причины
<b>neniom</b>	несколько
<b>nenies</b>	ничей

**Neniu** estas en la ĉambro. Никого нет в комнате. **Nenio** interesas lin. Ничто его не интересует. Mi elektis nenian robon. Я не выбрала никакого платья. Knabino **nenie** povas trovi libron. Девочка нигде не может найти книгу. Ni forgesos **neniam** ŝian helpon. Мы никогда не забудем её помощь. Vi **neniel** helpas al mi. Вы никак мне не помогаете. Li venis **nenial**. Он не пришёл без всякой причины. **Neniom** bedaŭru pri hieraŭa tago! Несколько не жалеете о вчерашнем дне! La benko estas **nenies**, ankaŭ vi povas sidi sur ĝi. Скамейка – ничья, вы тоже можете сидеть на ней.

## Задания – Taskoj



*I. Прочитайте текст «Нејме ĉе Lena». Найдите русские эквиваленты следующим словам: aspekti, glati, informo, kafo, kameno, konfitaĵo, krii, krom, litro, unika.*

### Нејме ĉе Lena

Ĉifrogramo:

$$1 + 1 = 0; \quad 7 - 7 = 1;$$
$$1\ 000\ 000 \times 0 = 0$$

Krim kuŝas ĉe kamentubo sur tegmento. Li deĉifras freŝan informon de la sultano: «Azenoj estas vi ambaŭ! Ĝis fino de la semajno venigu la beston! Ne forgesu pri via miliono».

...Verŝajne Miĉjo fortrinkis ok litrojn da varma lakto kun kilogramo da mielo. Tre agrabla kuracilo estis, do Miĉjo tuj ekdormis ĉe la enira pordo. Ĝi apenaŭ lokiĝis tie, apud sia amiko Klajd. La nokto pasis nerimarkeble. Ekkantis birdoj en la korto. Ekbojis Klajd al la sonoro – venis Maksim kun la filo.

– Ni rigardu nian infanon, – diris li post salutoj. – Malfermu la buŝon, Miĉjo, kaj diru: «A-a-a!» Perfekte. Nenion danĝeran mi vidas. Mi kredas, ke ĉio estas en ordo.

– Matenmanĝu ni, poste iru promeni, – proponis Anna. – Lena kaj Marko jam ordigis la tablon. Anton baldaŭ devas eklabori.

Por matenmanĝo Miĉjo ricevis teleron da dolĉaj pomoj. Klajd – supon kun viando. Sed la kvin homoj sidiĝis sur la seĝojn en la larĝa ĉambro. Ili trinkis kafon kun sukero el belaj tasoĵ kaj manĝis buterpanojn. Ankaŭ tre bongustan ĉerizan konfitaĵon.

– Amikoj miaj, ĉu vi nenion suspektas? – demandis Anton. – Nia Miĉjo estas unika en la mondo. Oni devus pli bone gardi ĝin.

– Mi opinias, – respondis Maksim, – ke Miĉjo estas utila nur por scienco. Neniu, krom sciencistoj, bezonas ĝin. Cetere, ni havas gardiston...

Subite aŭdiĝis stranga bruoj en la kameno. Klajd kolere ekbojis. En la kamenon falis kato.

– Tenu la hundon! – ekkriis Anna.

La kato elsaltis en la ĉambro. Ĝi estis nigra kun malpure blanka kravato kaj kun flavaj okuloj. Ĝi aspektis tre malfeliĉa.

– Miaŭ! – diris la kato, proksimiĝis al Miĉjo kaj karese frotis sin ĉe ĝia gambo.

– Oj! Ĝi estas malsata! – ekkriis Lena. Ŝi glatis la katon kaj donis al ĝi buterpanon. La kato ekmanĝis.



**kameno**

– Ni prenu ĝin en la parkon, – proponis Marko. – Ĝi gardos Miĉjon kontraŭ musoj.

– Bona propono, – subtenis Anna.

– Ne plaĉas al mi tiu kato, – diris Anton.

## ***II. Найдите в тексте предложения. Прочитайте и запишите их.***

Крим лежит на крыше. Он расшифровывает информацию от султана. Миша выпил теплого молока с медом и заснул около своего друга Клайда у двери. Утром пришел Максим с сыном. «Все в порядке», – сказал он. На завтрак Миша получил тарелку яблок, а Клайд – суп с мясом. Остальные пили кофе и ели бутерброды, а также очень вкусное вишневое варенье. «Наш Миша – единственный в мире», – сказал Антон. Вдруг Клайд сердито залаял. Послышался странный шум в камине. Туда упал кот, который выпрыгнул в комнату. Кот был грязный и выглядел очень несчастным. Он ласково терся о ногу Миши. Лена дала коту бутерброд. Марк предложил взять кота в парк погулять.



## ***III. Ответьте на вопросы.***

Kiun ĉifrogramon ricevis Krim de la sultano? Kion fortrinkis Miĉjo por resaniĝi? Kie ekdormis Miĉjo? Kial ekbojis Klajd? Kion diris Maksim? Kion ricevis Miĉjo kaj Klajd por la matenmanĝo? Kie sidiĝis kvin homoj? Kion ili manĝis? Kial oni devas pli bone gardi Miĉjon? Kio okazis subite? Kia estis la kato? Kion donis Lena al la kato? Kien oni volas preni la katon?

## ***IV. Найдите в тексте описание завтрака наших героев. Прочитайте их. Подготовьте небольшой рассказ о завтраке вашего друга (подруги), используя лексику всех предыдущих уроков.***

## ***V. Переведите и запишите на Эсперанто план рассказа «Нейте ĉе Lena».***

Новая шифровка. Приятное лекарство. Приход Максима. Завтрак Миши. Единственный в мире. Странный шум в камине. Несчастный кот.

## ***VI. Передайте содержание рассказа по плану.***

***VII. Вставьте вместо точек подходящие по смыслу глаголы:*** pasi, tumulti, kredi, kuŝi, proponi, subteni, aspekti, brui, kanti, rigardi, fortrinki.

Ni ...as sur la plaĝo. Ĉevalo ...as la akvon el sitelo. Infanoj ...as bone post la ferio. Artisto ...os la rusajn romancojn. Mi ...as al vi: vi estas prava. La ekzameno ...is sukcese. Oni ...is promeni en ĝardeno. Ne ...u nokte! La homoj ...as ĉe la butiko. Ŝi ...is filmon kun granda emocio. La ĉefo ...is min en nova projekto.

### **VIII. Переведите, употребляя отрицательные слова.**

Я никогда не забуду мои детские годы. Пожилой человек никак не может заснуть. Ничто нам не чуждо. Дорога ведет в никуда. Никто ее не замечает. Никакие слова вам не помогут. Нигде не растут деревья. Чьи часы хорошо идут? – Ничьи.

### **IX. Из слов, выделенных курсивом, образуйте глаголы и вставьте их в предложения:**

#### **1) с суффиксом –ig–**

1. Sonas *kanto*. La gitaristo \_\_\_\_ 1.a infanojn. 2. Sur la bildo estas *flava* suno. La knabo \_\_\_\_ ĝin per la krajono. 3. Mi *aŭdas* la bruon. Ĝin \_\_\_\_ motoro de aŭto. 4. La patrino *dormis*. Sed pli frue ŝi \_\_\_\_ la gefilojn. 5. La paciento estas *trankvila*. La doktoro \_\_\_\_ lin. 6. Artisto *ridas* kaj \_\_\_\_ la publikon. 7. La profesoro havas bonan *memoron*. Li \_\_\_\_ al ĝelernantoj malkovrojn de la homaro.

#### **2) с суффиксом –iĝ–**

1. Post la operacio ŝia vizaĝo *estas perfekta*. Post la operacio ŝia vizaĝo \_\_\_\_\_. 2. Tiu virinaĉo ofte *estas kolera*. Tiu virinaĉo ofte \_\_\_\_\_. 3. En arbaro *oni aŭdas* la kanton de kukolo. En arbaro \_\_\_\_ la kanto de kukolo. 4. La patro *fermas* la butikon. La butiko \_\_\_\_ je la 20-a horo. 5. Mi havas *ekzamenojn*. Mi \_\_\_\_ pri historio. 6. Maljunulo aspektis *strange*. Li \_\_\_\_ post la malsano. 7. La fervora esperantisto volas veturi *al* Universala E-Kongreso. Li devas \_\_\_\_ al la UK-o.

#### **3) с суффиксом –ebl–**

1. Mi *vidas* la urbon. La urbo \_\_\_\_\_. 2. La fraŭlino *aĉetos* la jupon. La jupo \_\_\_\_ en proksima vendejo. 3. Li *portas* la malgrandan magnetofonon. Ĝi \_\_\_\_\_. 4. En hospitalo oni *kuracas* la gripon. Ĝi \_\_\_\_ facile. 5. Mi *legas* interesan libron. La libro facile \_\_\_\_\_. 6. La grupo *abonis* E-revuon. La E-revuo \_\_\_\_ ĉe la redaktoro. 7. La studento ne *komprenas* la matematikan taskon. La matematika tasko ne \_\_\_\_\_.

### **X. Образуйте глаголы с нижеприведенными словами. Что они обозначают? Составьте предложения с некоторыми из них:**

1) с суффиксом –ig–: duono, nulo, malbona, ĉirkaŭ;

2) с суффиксом –iĝ–: forta, studento, sub, (el)lito, interesi, sidi.

### **XI. Вставьте, где нужно, окончание –n. Обратите внимание на функции предлогов в каждом предложении.**

1. Ni sidas en la domo\_. Ni iras en la domo\_. 2. La libron mi metis sur la tablo\_. La libro kuŝas sur la tabl\_. 3. La knabo kaŝis la katon sub la lito\_. La kato sidas sub la lito\_. 4. Antaŭ mi\_ estas la kampo. La ĉevalo galopis antaŭ mi\_. 5. Venu ĉe mi\_ je la 14a horo. Ĉe mi\_ estos gastoj. 6. Vi ne povas trairi inter ili\_: ili

staras tre dense. 7. La frato loĝas trans la rivero\_. La birdoj flugas trans la rivero\_. 8. Dimanĉe oni kutime iras ekster la urbo\_. Nia somerdomo troviĝas ekster la urbo\_. 9. La fiŝoj elsaltis super la akvo\_. Super la akvo\_ brilis la suno. 10. La knabino havas rubandon ĉirkaŭ la kolo\_. La knabino metis la brakojn ĉirkaŭ la kolo\_ de la patrino.



*XII. Прочитайте и переведите стихотворение еврейского поэта Овсей Дриц «En metroo». Объясните значение выделенных предлогов и аффиксов. Выучите стихотворение наизусть.*

### En metroo

**En** metroo

**Avineto**

Sidis

**Kun malnova** sak'

Jen, subite, kokerikis

**Iu**

En vagona klak'.

Kaj **eklumis**

**Sur** vizaĝoj

Gaja rido

Bona sent'-

Kvazaŭ venis **mateniĝo**

**Al** metroo

Por moment'.

Esperantigis M.Bronŝtejn

*XIII. Прочитайте и запомните пословицы и поговорки с неопределенными, указательными и отрицательными словами. Найдите их русский эквивалент.*

**Neniu** sanktulo estas sen makulo.

Kie estas sano, **tie** estas belo.

Kia demando, **tia** respondo.

Nur **tiu** ne eraras, kiu **neniam ion** faras.

Ankaŭ al nia nesto venos **iam** festo.

### Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj

#### *Задание VII – Tasko VII*

Ni kuŝas sur la plaĝo. Ĉevalo fortrinkis la akvon el sitelo. Infanoj aspektas bone post la ferio. Artisto kantas la rusajn romancojn. Mi kredas al vi: vi estas prava. La ekzameno pasis sukcese. Oni proponis promeni en ĝardeno. Ne bruu nokte! La homoj tumultas ĉe la butikoj. Ŝi rigardis filmon kun granda emocio. La ĉefo subtenis min en nova projekto.



### Задание VIII – Tasko VIII

Mi neniam forgesos miajn infanjarojn. Nejuna homo (viro) neniel povas ekdormi. Nenio al ni fremdas. Vojo kondukas nenien. Neniu ŝin rimarkas. Neniuĵ vortoj helpas al vi. Nenie kreskas arboj. Kies horloĝo bone funkcias? – Nenies.

### Задание IX – Tasko IX

1) с суффиксом –**ig**–

1. Sonas *kanto*. La gitaristo kantigas 1.a infanojn. 2. Sur la bildo estas *flava* suno. La knabo flavigis ĝin per la kraĵono. 3. Mi *aŭdas* la bruon. Ĝin aŭdigas motoro de aŭto. 4. La patrino *dormis*. Sed pli frue ŝi dormigis la gefilojn. 5. La paciento estas *trankvila*. La doktoro trankviligis lin. 6. Artisto *ridas* kaj ridigas la publikon. 7. La profesoro havas bonan *memoron*. Li memorigis al ĝelernantoj malkovrojn de la homaro.

2) с суффиксом –**iĝ**–

1. Post la operacio ŝia vizaĝo *estas perfekta*. Post la operacio ŝia vizaĝo perfektigis. 2. Tiu virinaĉo ofte *estas kolera*. Tiu virinaĉo ofte koleriĝas. 3. En arbaro *oni aŭdas* la kanton de kukolo. En arbaro aŭdiĝas la kanto de kukolo. 4. La patro *fermas* la butikon. La butiko fermiĝas je la 20a horo. 5. Mi havas *ekzamenojn*. Mi ekzameniĝas pri historio. 6. Maljunulo aspektis *strange*. Li strangiĝis post la malsano. 7. La fervora esperantisto volas veturi *al* Universala E-Kongreso. Li devas aliĝi al la UK-o.

3) с суффиксом –**eb**l–

1. Mi *vidas* la urbon. La urbo videblas. 2. La fraŭlino *aĉetos* la jupon. La jupo aĉeteblos en proksima vendejo. 3. Li *portas* la malgrandan magnetofonon. Ĝi porteblos. 4. En hospitalo oni *kuracas* la gripon. Ĝi kuraceblas facile. 5. Mi *legas* interesan libron. La libro facile legeblas. 6. La grupo *abonis* E-revuon. La E-revuo aboneblas ĉe la redaktoro. 7. La studento ne *komprenas* la matematikan taskon. La matematika tasko ne kompreneblas.

### Задание XI – Tasko XI

1. Ni sidas en la domo. Ni iras en la domon. 2. La libron mi metis sur la tablon. La libro kuŝas sur la tablo. 3. La knabo kaŝis la katon sub la liton. La kato sidas sub la lito. 4. Antaŭ mi estas la kampo. La ĉevalo galopis antaŭ min. 5. Venu ĉe min je la 14a horo. Ĉe mi estos gastoj. 6. Vi ne povas trairi inter ili: ili staras tre dense. 7. La frato loĝas trans la rivero. La birdoj flugas trans la riveron. 8. Dimanĉe oni kutime iras ekster la urbon. Nia somerdomo troviĝas ekster la urbo. 9. La fiŝoj elsaltis super la akvon. Super la akvo brilis la suno. 10. La knabino havas rubandon ĉirkaŭ la kolo. La knabino metis la brakojn ĉirkaŭ la kolon de la patrino.

## LECIONO 9

### Gramatiko



– **er** – суффикс, обозначающий частицу, элемент чего-либо: neĝo (снег) – neĝero (снежинка), polvo (пыль) – polvo (пылинка), mono (деньги) – monero (монета). La plej malgranda monero de la rusa rublo estas unu kopeko. Самая маленькая монета российского рубля – одна копейка.

– **an** – суффикс, обозначающий жителя города или страны, члена какого-либо коллектива или чьего-либо последователя:

Moskvo – moskvano	Москва – москвич
Usono – usonano	США – житель США
klubo – klubano	клуб – член клуба
Mahometo – mahometano	Магомет – магометанин

Слово **alia** и его производные: **alia** – другой, прочий; **alio** – иное, **alie** – иначе, по-другому; **alii** – отличаться; **aliulo** – кто-то другой; **aliigi** – сделать что-то другим, изменить; **aliigi** – делаться другим, изменяться. Сейчас существует тенденция присоединить **ali** к табличным словам.

**Обобщительные слова** образуются от вопросительно-относительных путём замены начальной буквы **k**– на **ĉ**–:

<b>ĉiu</b>	каждый
<b>ĉio</b>	всё
<b>ĉia</b>	всякий
<b>ĉie</b>	езде
<b>ĉiam</b>	всегда
<b>ĉiel</b>	всячески
<b>ĉial</b>	по всякой (любой) причине
<b>ĉiom</b>	любое количество, целиком
<b>ĉies</b>	всех (принадлежащий всем)

En nia lando **ĉiuj** rajtas studi. В нашей стране все имеют право учиться. **Ĉio** estas trankvila. Всё – спокойно. **Ĉia** objekto havas sian lokon. Всякая вещь имеет своё место. **Ĉie** regas malordo. Везде царит беспорядок. Mia frato **ĉiam** studas bone. Мой брат всегда учиться хорошо. Li **ĉiel** volis ekplaĉi al ŝi. Он всячески хотел понравиться ей. Nia ĉefo **ĉial** koleras lunde. По понедельникам наш начальник сердится по любой причине. **Ĉiom** da floroj li aĉetus al sia fianĉino. Любое количество цветов он купил бы своей невесте. Tiu ĉi parko estas **ĉies**. Этот парк принадлежит всем.

## Taskoj



*I. Tralegu la tekston «Promeno en la urbo» kaj atentu, kiel urbanoj reagis al la mamutido.*

### **Promeno en la urbo**

La septembra mateno estas ĉarma. Ne estas multaj homoj en la stratoj. La aero estas freŝa, super arboj brilas ne tro varma aŭtuna suno. Gaja kompanio paŝas laŭ la strato. La unuaj iras Maksim kaj Anna, kiu kondukas la hundon. Sekvas Lena kaj Marko kun tekoj en la manoj. Post unu horo ili devas kuri en la lernejon. Inter la geknaboj tute libere paŝas Miĉjo. Kaj fine kuras la kato, kiun Lena nomis Graf pro la nigra vesto kun eleganta blanka kravato sur la kolo. Estas ankaŭ alia viro en granda ĉapelo kaj nigraj okulvitroj. Li iras malrapide je dekkvin paŝoj malantaŭ la kompanio. Li sekvas la kompanion dum la tuta vojo. Sed neniu rimarkas lin.

La urbanoj, kiuj iras preter ili, konas Miĉjon. Multaj gazetoj kaj televido komunikis pri la mamutido. Homoj salutas la kompanion, iras flanken por liberigi la vojon. Kelkaj petas permeson regali Miĉjon, karesi ĝiajn brunajn harojn. Ankaŭ Miĉjo salutas ĉiujn – ĝi levas la rostron kaj svingas per ĝi.

Ĉe la pordego de la parko la kompanion renkontas oĉjo Boĉjo. Al lia jako, ankaŭ al la pantalono gluiĝis fojneroj; liaj ŝuoj estas malpuraj.

– Mi ne kulpas! Mi ne kulpas! – ripetas li.

– Certe vi ne kulpas, – Maksim frapetas lian ŝultron. – Simple, ĝis la vintro ni devas konstrui varman dometon por Miĉjo.

Krim spektas, kiel la kato eniras en la parkon post ĉiuj aliaj. Li kontente frotas la manojn, turnas sin kaj malaperas post angulo.



**Parko. Aŭtuna suno**

### *II. Trovu en la teksto la sekvajn frazojn.*

Сентябрьским утром на улицах немного народу, воздух свеж. Не очень теплое солнце светит над деревьями. Веселая компания идет по улице. Максим ведет собаку. Между Леной и Марком шагает Миша. Позади бежит кот Граф. Он – черный, с элегантным белым галстуком на шее. На расстоянии пятнадцати шагов от компании медленно идет некий мужчина в большой шляпе и черных очках. Его никто не замечает. Мимо компании идут горожане. Они знают о Мише из газет. Некоторые приветствуют мамонтенка, другие просят разрешения угостить Мишу и погладить его. У ворот парка компания встречает дядю Борю. Его обувь – грязная, к пиджаку и к брюкам прилипли соломинки. Кот Граф входит в парк за компанией. Крим – доволен, он потирает руки.



### **III. Respondu al la sekvaj demandoj.**

Kie kaj kiam okazis la promeno? El kiuj konsistis la kompanio? Kiu sekvas la kompanion? Kiu kaj kiel salutas la kompanion? Kiun oni renkontas ĉe la pordego de la parko?

### **IV. Priskribu la renkonton de Miĉjo kun urbanoj.**

**V. Kompilu kaj surpaperigu planon de la rakonto. Skize rerakontu ĝian enhavon.**

### **VI. Metu anstataŭ punktoj kaj aŭ kun:**

Li manas kotleton ... pano. Mi vidas aŭton sur la ŝoseo ... Petro en ĝi. La artistoj kantis romancojn ... kupletajn. La viro ricevis leteron ... bildkarton. Jen estas familio ... ĝia infanaro. La bibliotekistino metis librojn ... revuojn sur la supran breton. Junulo plantis arbon ... arbustojn en sia gardeno.

**VII. Tralegu kaj traduku la sekvajn vortojn. Kompilu frazojn kun ili:** eŭropano, familiano, kamparano, klubano, moskvano, parizano, partiano, urbano.

### **VIII. Traduku vortkombinojn kaj faru frazojn kun ili:**

вести беседу, вести собаку, вести автомобиль, вести дела (хозяйствовать), вести заседание, вести занятия, вести борьбу, вести пропаганду, вести переговоры, вести переписку, вести протокол, вести себя, это ни к чему не приведет.

### **IX. Kompilu frazojn ligante korekte la partojn A, B kaj C.**

A	B	C
Aŭtuno		korpoparto.
Jako		frukto.
Ŝultro		besto.
Butero		sepa tago de la semajno.
Azeno	estas	familiano.
Taso		vestaĵo.
Pomo		mangaĵo.
Filo		manĝilaro.
Dimanĉo		sezono de la jaro.

**X. Elektu laŭsence konvenajn adverbojn kaj metu ilin en la frazojn:** hieraŭ, ankoraŭ, apenaŭ, morgaŭ, baldaŭ.

\_\_\_ mi iros al urba biblioteko. Studentino ne prezentis \_\_\_ la tezon al sia ĉefo. Ni estis en teatro \_\_\_ vespere. Gesamideanoj veturos \_\_\_ al E-kongreso. Tiu junulo eklaboris, \_\_\_ li atingis 18-jariĝon.

### ***XI. Kion signifas la sekvaj vortoj?***

1. *Atentu la vortojn, en kiuj troviĝas silabo simila al sufikso: acero, afero, inĝeniero, modera, numero, opero.*

2. *Helpe de sufikso –er– faru novajn vortojn. Kompilu frazojn kun kelkaj el ili: fajro, sablo, mono, pano, polvo, akvo, pluvo.*

### ***XII. Tralegu la tekston helpe de vortaro, atentante la uzadon de kaj kaj kun.***



#### **Mia naskiĝurbo**


Mi naskiĝis en la urbo N., kiun apenaŭ eblas trovi en la mapo de la mondo. Tamen ĝi estas sufiĉe granda por nia lando, unu el centroj de industrio, komerco kaj kulturo. Ĝia loĝantaro nombras ĉirkaŭ 300 mil personojn. La urbo estis fondita antaŭ pli ol 200 jaroj. Mallarĝa rivereto trafluas mian naskiĝurbon. Sur ĝiaj bordoj videblas la konstruaĵoj de malnovaj teksaj fabrikoj, kiuj estas rekonstruataj. Nun en la urbo abundas maŝinkonstruaj uzinoj kaj diversbranĉaj entreprenoj. La urbo havas antikvajn stratojn, kie ĉiu domo memorigas historiplenan pasintecon. Estas tre agrable promeni laŭ la stratoj kun privataj lignaj domoj (izboj), kurioze kaj bele ornamitaj.

En la urbo oni vidas multajn gestudentojn, kiuj studas en universitatoj, superaj kaj mezgradaj profesiaj lernejoj. Estontaj instruistoj kaj inĝenieroj, kemiistoj kaj konstruistoj, kuracistoj kaj agrikulturistoj diligente trastudas sciencajn librojn en urbaj bibliotekoj kaj per

interreto. Por ripozi ili venas en kafejojn kaj dancejojn

aŭ en teatrojn. La urbanoj ŝatas vesperumi en drama teatro. La spektakloj de la muzika teatro inde konkurencas kun la ĉefurba. La pupteatro pli allogas infanojn.

Se iu gasto venas al nia urbo, oni nepre vizitigas al li placojn kaj ĉefstratojn, muzeojn kaj monumentojn. Vizitindas somere parkoj kaj skvaroj kun multjaraj arboj kaj kun floroj de diversaj koloroj. Tie eblas agrable ripozeti post promeno tra nia urbo, pri kiu mi tre fieras.



**Provinca urbo de Rusio**



#### ***1. Respondu al la sekvaj demandoj.***

Kie troviĝas la urbo N.? Kiom granda ĝi estas? Kiam la urbo estis fondita? Kio trafluas la urbon? Kio situas sur ĝiaj bordoj? Kiajn uzinojn kaj entreprenojn havas la urbo? Kio en la urbo memorigas la historiplenan pasintecon? Ĉu multas gestudentoj sur la stratoj? Kie eblas ilin renkonti? Kiuj teatroj funkcias en la urbo? Kio estas vizitinda en la urbo?

2. Rakontu pri via naskiĝurbo, uzante la sekvajn vortojn:

naskiĝurbo – en Rusio – loĝantoj,  
malnova – malgranda – antikva,  
rivero – bordoj – pontoj,  
industria – kultura – komerca,  
uzinoj – fabrikoj – entreprenoj,  
ĉefstratoj – stratetoj – placoj,  
monumentoj – muzeoj – preĝejoj,  
studentoj – universitatoj – bibliotekoj,  
pupteatro – drama – muzika,  
parkoj – aleoj – skvaroj.



**XIII. Ni kantu la ĉeĥan popolkanton: «Kukolo», E-teksto de J.Cink.**

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin.
2. Klarigu ĉiun markitan gramatikajon.

**Kukolo**

1. **Dezirante** trinki, haltis mi  
De fonteto ĉe rand’.  
Jen aŭdiĝis el arbara fon’  
De kukolo la kant’.

Refreno: Holala! Holala tiria, holala kuku,  
holala tiria holala kuku.  
Holala tiria, holala kuku,  
holala tiria ho!

2. Diru **al** mi, kara kukolet’,  
**Kial** kaŝas vi vin’,  
Diru al mi, **kie** estas nun  
Mia koramatin’.

Refreno: Holala!... (kuku – 2 foje)



3. Kaj denove kantas la kukol’,  
Respondante al mi:  
Amatino via, juna knab’,  
Jen atendas jam **vin**.

Refreno: Holala... (kuku – 3 foje)

De - zi - ran - te trin - ki, hal - tis mi, ĉe fon -  
di - ĝas el ar - ba - ra for' de ku -  
te - to de rand', jen aŭ- // kant'. A...  
ko - lo la  
Hoj la - la, ti - ri - la, hoj la - la, ku - ku.  
Hoj la-la, ti - ri - la, hoj la-la, ku - ku. Hoj la-la, ti - ri - la,  
hoj la - la, ku - ku. Hoj la - la, ti - ri - la, hoj.

### Ŝlosiloj al la taskoj

#### *Tasko VI*

Ŝi manĝas kotleton kun pano. Mi vidas aŭton sur la ŝoseo kun Petro en ĝi. La artistoj kantis romancojn kaj kupletojn. La viro ricevis leteron kun bildkarto. Jen estas familio kaj ĝia infanaro. La bibliotekistino metis librojn kaj revuojn sur la supran breton. Junulo plantis arbon kaj arbustojn en sia ĝardeno.

#### *Tasko VIII*

вести беседу – konversacii, вести собаку – konduki hundon, вести автомобиль – stiri (konduki) aŭton, вести дела (хозяйствовать) – mastrumi, вести заседание – prezidi kunsidon, вести занятия – gvidi kurso(j)n, вести борьбу – batal(ad)i, вести пропаганду – propagandi, вести переговоры – (inter)trakti, вести переписку – korespond(ad)i, вести протокол – protokoli, вести себя – sin teni (kondukti), это ни к чему не приведет – tio nenion rezultigos

#### *Tasko IX*

Aŭtuno estas sezono de la jaro. Jako estas vestaĵo. Butero estas mangaĵo. Ŝultro estas korpoparto. Azeno estas besto. Taso estas manĝilaro. Filo estas familiano. Pomo estas frukto. Dimanĉo estas sepa tago de la semajno.

#### *Tasko X*

Morgaŭ mi iros al urba biblioteko. Studentino ne prezentis ankoraŭ la tezon al sia ĉefo. Ni estis en teatro hieraŭ vespere. Gesamideanoj veturos baldaŭ al E-kongreso. Tiu junulo eklaboris, apenaŭ li atingis 18-jariĝon.



## LECIONO 10

### Gramatiko



**bo** – приставка, обозначающая родство в результате брака; она предшествует приставке **ge**: patro (отец) – **bo**patro (свекор, тесть), patrino (мать) – **bo**patrino (свекровь, тёща), **bo**gepatroj (родители мужа, жены). **Bo**frato estas frato de edzino. Шурин – брат жены.

**dis** – приставка глаголов, обозначающая «раз»: porti (нести) – **dis**porti (разнести), doni (дать, давать) – **dis**doni (раздать, раздавать). Gastoj **dis**iris malfrue. Гости разошлись поздно.

– **em** – суффикс, обозначающий «склонность к чему-либо»: timi (бояться) – timema (боязливый), servi (служить) – servema (услужливый). Li estas tre dankema al vi. Он вам очень благодарен.

– **ĉj** –, – **nj** – с помощью этих суффиксов образуются ласкательные имена существительных, обозначающих одушевленные существа: Anna (Анна) – Anjo (Аня), Sofia (София) – Sonjo (Соня), Petro (Пётр) – Peĉjo (Петя), patro (отец) – paĉjo (папа), filino (дочь) – filinjo (дочка), katino (кошка) – katinjo (кошечка). Mi donacas belajn florojn al mia kara panjo. Я дарю красивые цветы моей дорогой мамочке. Mia amiko Peĉjo ŝatas ludi pilkon. Мой друг Петя любит играть в мяч.

После глагола **bonvoli** в повелительном наклонении всегда употребляется инфинитив. Bonvolu doni al mi la libron! Пожалуйста, дай(те) мне книгу! Bonvolu veni morgaŭ! Приходи(те), пожалуйста, завтра!

### Taskoj



*I. Tralegu la tekston «Sekreta telefonparolo». Traduku nekonatajn vortojn helpe de vortaro.*

#### **Sekreta telefonparolo**

– Ha lo, ha lo! Ĉu nulo sep? Fraŭlino, mi ŝatus paroli kun Limpopo. Jes, tuj. Ne, la kodo mankas. Kial postmorgaŭ? Mi havas gravan aferon! Lia moŝto... pardonu, la kosto ne gravas. Mia bofrato... li ne povas atendi... Komprenu, li kolektas elefantojn! Nature, jes – poŝtmarkojn... kun elefantoj. Dankon, dankon, fraŭlino!

– Bonan tagon, via moŝto... kara bofrato! Aĥ, tie jam estas nokto... do, bonan nokton! Pardonu, se mi malhelpis vian ripozon. Pardonu, mia kara boavo... bofrato. Mi ne perdis mian lastan saĝon, komprenu... mi bezonas vian konsilon... Via poŝtmarko fartas bone! Ha lo! Jes, la poŝtmarko... ho, kia forgesema vi estas, kara boedzo... bofrato! La poŝtmarko kun elefanto! Jam 450 kilogramojn. Jes, la

poŝtmarko. Ĝi bone manĝas. Fruktojn... legomojn... Jes, la poŝtmarko! Same, en la parko. Jes, mi okupiĝas pri tio. Unu el ni jam servas. Unu el ni du, sed ne mi. Mi disdonis multe da mono, kara bopatro... bofrato! Necesas aldoni por havi ĝin... Ja estas valora... poŝtmarko...

– Ne, kara bo... mi pensas... tage-nokte mi pensas. Mi havas eĉ kvin planojn... Ho, se vi havas vian propran planon, estas bonege! Ĉu vi sendos fiŝon? Aĥ – muŝon!! Pardonu, kara bofraĉjo, mi ne komprenas, bonvolu ripeti. Ĉu muŝo-on? Por preni la poŝtmarkon? Genie! Do, ni flugos. Sed ne lunde! Ne, ankaŭ en merkredo estas frue. Jes, ĵaŭde. Bele! Ni atendos. Sendube, kun la poŝtmarko. Ĉu kvin mil? Nur?!!! Ho, dankon... kara bofrato! Vi estas riĉa, sed ne avara. Ĝis la revido!

– Dankon, fraŭlinjo! Kiom da? Ok minutoj?!! Diablo! Ne, ne vi – vi estas tre bonkora. Adiaŭ!



telefono

## II. Trovu en la teksto la sekvajn frazojn.

Я тотчас хотел бы поговорить с Лимпопо. Там уже ночь? Извините, если я помешал вашему отдыху. Мне нужен ваш совет. Какой вы забывчивый! Нужно добавить еще денег, чтобы занять его (мамонта). Очень хорошо, что у вас есть собственный план. Повторите, пожалуйста, я не понял. Мы полетим в четверг.



## III. Respondu al la demandoj.

Kien volas telefoni la sekreta agento? Ĉu li povas atendi ĝin postmorgaŭ? Kiam la sekreta agento sukcesis telefonatingi «Lian moŝton»? Kion li bezonas de «Lia moŝto»? Kiel nomas la sekreta agento «Lian moŝton»? Pri kiu parolas la sekreta agento, kiam li mencias 450 kilogramojn? Kiom da planoj havas la sekreta agento? Kiom da tempo parolis la sekreta agento kun «Lia moŝto»? Pri kio ili interkonsentis? Kiel vi opinias?

## IV. Rerakontu la tekston laŭ la sekva plano.

Grava afero de Krim.

Mendo de telefona alvoko.

La poŝtmarko kun elefanto.

Genia plano de la sultano.



V. Tralegu la telefonan interparolon kaj traduku ĝin helpe de vortaro. En la dialogo troviĝas dek kvar spacoj. Enskribu en ĉiun spacon unu el sekvaj vortoj: adiaŭi, aferoj, bonvolu, grava, fartas, flugis, fruktojn, helpis, konsili, kostoj, legomojn, mankas, necese, ripozis.

*Marta* – Halo! Ĉu estas vi, Paŭlo?

*Paŭlo* – Jes! Mi aŭskultas.

*Marta* – Saluton, kara mia! Estas Marta, kiu vokas vin.

*Paŭlo* – Bonan tagon, bofratinjo!

*Marta* – Mi delonge nek vidis vin, nek aŭdis pri vi! Kiel vi \_\_\_?

*Paŭlo* – Dankon, sufiĉe bone. Mi prepariĝas nun al ekzamenoj. Mi devas multe ripeti. Eĉ unu liberan tagon mi ne havas. Post finstudaj ekzamenoj en liceo min atendas ekzameniĝo en Universitato. Tempo \_\_\_ al mi. Kaj vi, ĉu ĉio bonordas?

*Marta* – Jes, dankon. Kaj vi havas vere streĉajn tagojn!. Mi imagas viajn zorgojn. Kio koncernas min, do antaŭnelonge mi \_\_\_ kun la gepatroj ĉe la avo apud marbordo. Ni \_\_\_ tien en moderna aviadilo.

*Paŭlo* – Vi estas vere feliĉaj. Mi ankaŭ pensas pri ferio. Mi ankaŭ ŝatus libertempojn ĉe la maro. Mi revas trankvile kuŝi sur la strando kaj rigardi la maron. Kiel vi pasigis la tempon?

*Marta* – Frumatene la paĉjo fiŝkaptadis. Pro sia \_\_\_ kormalsano la panjo vizitadis la lokan faman kuraciston. Ofte ni iris al bazaro por aĉeti \_\_\_ kaj \_\_\_. Ankaŭ mi sunbruniĝis sur la plaĝo kaj naĝis en la maro. Poste mi \_\_\_ al la gepatroj kuiru manĝojn.



maro kaj strando

*Paŭlo* – Bonvolu diri al mi, ĉu la \_\_\_ por fruktoj estis altaj?

*Marta* – Ili dependis de la tago de semajno. La avo \_\_\_ al ni fari aĉetojn fine de labortago aŭ ĵaŭde, kiam bazarvendistoj malaltigas la prezojn.

*Paŭlo* – Tutcerte, estas bone kaj \_\_\_ scii la lokajn morojn. Kion vi faris posttagmeze?

*Marta* – Ni ŝatis promeni en arbaro kaj kolekti avelojn. Tiu ĉi \_\_\_ tre plaĉis al ni. Se vi veturos al la maro, vi nature admiros la pejzaĝon, kaj, kompreneble, ĝuos la ripozon.



arbaro

*Paŭlo* – Ni ne vane parolis. Mi jam sopiras pri la vojaĝo.

Bedaŭrinde, nun mi devas \_\_\_. Min atendas gravaj \_\_\_ .

*Marta* – Sukcesojn al vi! Kaj ĝis revido aŭ reaŭdo!

*Paŭlo* – Ĝis! Ĉion bonan al vi!



### *1. Respondu al la demandoj.*

Kiel interparolas Paŭlo kaj Marta? En kia sezono? Kial Paŭlo restas en la urbo? Pro kio al li mankas tempo? Kie ripozis Marta? Pri kio ŝi okupiĝis? Kion faris ŝiaj gepatroj? Kion novan eksciis Paŭlo el la rakonto de Maria?

*2. Voĉlegu la dialogon esprimplene kaj atentem vian prononcon.*

*3. Dialogu kun via samkurso(in)no pri viaj ferioj (someraj aŭ vintraj).*

## **VI. Tralegu la demandojn. Respondu ilin, uzante n-vortojn.**

Ĉu ies vizaĝo estas sur la fotoĵo? Ĉu ie sur la strato estas panvendejo? Ĉu vi iam vizitis Berlinon? Ĉu vi havas iom da konfitaĵo en poteto? Ĉu estas iu malantaŭ ŝi?

Ĉu estas io en lia teko? Ĉu ia birdo kantas bele? Ĉu iel helpi al vi? Ĉu vi iros ien vespere?

**VII. Kun helpo de sufiksoj –ĉj– kaj –nj– formu novajn vortojn kaj faru frazojn kun ili:** frato, onklo, Petro, Maria, fratino, patrino.

**VIII. Traduku, uzante la prefikson bo– .**

Мой свекор живет в деревне. Родители ее мужа уехали вчера вечером. Его шурина очень любит петь и танцевать. Теща Павла хорошо готовит. Дядя моего мужа серьезно болен. Ее деверь учится в университете. Моя золовка чувствует себя хорошо после лечения.

**IX. Kompilu la vortparojn kaj faru frazojn kun ili:**

A	B
disvastigi	taskojn
disdividi	paperon
disŝiri	vivi
dispecigi	frue
disdoni	novaĵon
disaŭdigi	en diversajn flankojn
dise	pomojn
disiĝi	radioprogramon
disiri	panon

**X. Helpe de la sufikso –em–**

1) faru novajn vortojn kaj traduku ilin: danki, helpi, heziti, obei, kolekti, labori, paroli, pensi, sporti;

2) daŭrigu laŭ la modelo:

**Modelo:** Li emas mangi – li estas mangema.

Mi emas legi – ... , lia edzino emas forgesi – ... , ni emas kritiki – ... , mia kolego emas ŝerci – ... , ilia infano emas plori – ..., tiu-ĉi studentino emas legi – ... , patrino emas ŝpari – ... , virinoj emas babili – ... , knaboj emas ludi – ... .

**XI. Enmetu anstataŭ punktoj sence konvenajn adjektivojn:** avara, gaja, genia, grava, eleganta, kulpa, libera, malfrua, necesa, propra, riĉa, saĝa, valora.

Dormo estas ... . En muzeo vi ekvidos unikan kaj ...n eksponaĵon. Tiu ... viro aĉetis belan vilaon ĉe Lazura marbordo. Via ... veno povas esti riska. Ĉiuj laŭdas mian fraĉjon: li estas tre ... . En sia ... domo la mastro mem faris la meblaron. La avinjo neniam donas monon al sia nepo, ĉar ŝi estas ... . Morgaŭ vi devas trovi ...n dokumenton. La ... ideo venis ĵus al talenta sciencisto. En teatro oni ofte povas vidi ...jn gesinjorojn. ... rido de infanoj sonis ĉie. La policanoj haltigis sen... n preterpasanton. Post divorco la eksedzo sentis sin ... .

## ***XII. Traduku en Esperanton.***

Подумайте, пожалуйста, ещё раз о моём предложении. Пожалуйста, проводите эту женщину домой. Угостите нас, пожалуйста, фруктами из вашего сада. Говорите проще, пожалуйста. Сообщите нам, пожалуйста, о его здоровье. Пожалуйста, повторите это стихотворение. Следуйте, пожалуйста, за мной. Пожалуйста, поблагодарите нашего доктора.

## ***XIII. Sanĝu la lokon de sekvaj vortoj, kaj vi havos la proverbojn verkitajn de L. Zamenhof. Kion ili signifas?***

1. Trankvilo, bona, post, venas, konsilo, dorma.
2. Ne, aĝo, plezura, tro, estas, matura.
3. Manĝi, instruas, sen, panon, mizero, butero.

## **Ŝlosiloj al la taskoj**

### *Tasko VIII*

Mia bopatro loĝas en vilaĝo. Ŝiaj bogepatroj forveturis hieraŭ vespere. Lia bofrato tre ŝatas kanti kaj danci. Bopatrino de Paŭlo bone kuiras. Onklo de mia edzo estas grave malsana. Ŝia bofrato lernas en universitato. Mia bofratino fartas bone post kuracado.

### *Tasko IX*

disvastigi novajon, disdividi taskojn, disŝiri paperon, dispecigi panon, disdoni pomojn, disaŭdigi radioprogramon, dise vivi, disiĝi frue, disiri en diversajn flankojn

### *Tasko XI*

Dormo estas necesa. En muzeo vi ekvidos unikan kaj valoran eksponaĵon. Tiu riĉa viro aĉetis belan vilaon ĉe Lazura marbordo. Via malfrua veno povas esti riska. Ĉiuj laŭdas mian fraĉjon: li estas tre saĝa. En sia propra domo la mastro mem faris la meblaron. La avinjo neniam donas monon al sia nepo, ĉar ŝi estas avara. Morgaŭ vi devas trovi gravan dokumenton. La genia ideo venis ĵus al talenta sciencisto. En teatro oni ofte povas vidi elegantajn gesinjorojn. La policanoj haltigis senkulpan preterpasanton. Post divorco la eksedzo sentis sin libera. Gaja rido de infanoj sonis ĉie.

### *Tasko XII*

Bonvolu pripensi ankoraŭfoje mian proponon. Bonvolu akompani tiun ĉi virinon hejmen. Bonvolu regali nin per fruktoj el via ĝardeno. Bonvolu paroli pli simple. Bonvolu informi nin pri lia sano. Bonvolu ripeti tiun ĉi versaĵon. Bonvolu sekvi min. Bonvolu danki nian kuraciston.

### *Tasko XIII*

1. Post dorma trankvilo venas bona konsilo.
2. Aĝo tro matura ne estas plezura.
3. Instruas mizero manĝi panon sen butero.

## LECIONO 11

### Gramatiko



– **ad** – суффикс, обозначающий длительное действие, процесс: *kanti* (петь) – *kantado* (пение), *lerni* (учиться) – *lernado* (учеба). *Lia tro longa parolado estis enua*. Его слишком длинная речь была скучной. *Enmanigado de premioj daŭris unu horon*. Вручение премий длилось час.

– **um** – суффикс без определённого значения, служащий для образования слов, отношение которых к корневому слову не может быть выражено с помощью суффиксов с определённым значением: *pazo* (нос) – *pazumo* (пенсне), *proksime* (близко) – *proksimume* (приблизительно). *Mi malpurigis miajn manumojn*. Я испачкал свои (мои) манжеты. *Vi bone plenumas vian laboron*. Вы хорошо выполняете свою (вашу) работу.

**nek ... nek** – сложный сочинительный союз, который обозначает «ни ... ни»: *Mia praaŭvino sciis nek skribi, nek legi*. Моя прабабушка не умела ни писать, ни читать. *Li konsentis nek al petoj, nek al persvadoj*. Он не согласился ни на просьбы, ни на уговоры.

– **ant** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения действительного залога настоящего времени: *amanta patrino* – любящая мать, *plorante pro doloro* – плача от боли, *lernanto* – ученик;

– **int** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения действительного залога прошедшего времени: *dirinta laŭte* – сказавший громко, *forgesinte pro danĝero* – забыв про опасность, *vizitinto* – бывший посетитель;

– **ont** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения действительного залога будущего времени: *sekvonta ekzemplo* – пример, которому будут следовать, *tremonte pro frosto* – дрожа от холода (перед тем, как будет дрожать от холода), *legonto* – будущий читатель.

### Taskoj



*I. Tralegu la tekston «Lecionoj por Miĉjo» kaj trovu en vortaro la signifon de jenaj vortoj:*

*aĝo, almenaŭ, eduki, konsenti, laŭte, miro, plene, plenumi, plezuro, preskaŭ, serĉi, ŝovi, sufiĉi, sukcesi, verki.*



## Lecionoj por Miĉjo

– Kiom estas unu kaj unu? Respondu! – laŭte diris Anton, staranta antaŭ Miĉjo. Li tenis po unu pomo en la manoj. La mamutido prenis pomon el la dekstra mano kaj formanĝis. Poste ĝi prenis pomon el la maldekstra mano, formanĝis kaj ŝovis la rostron en la poŝon de Anton, serĉante plu.



– Nu, karaj miaj, tio estas preskaŭ katastrofo! Konsentu! – kriis Anton al Lena kaj Marko, venintaj kun li. – Nia Miĉjo estas en la aĝo de lernanto, ĉu ne? Tamen ĝi povas nek kalkuli, nek danci, nek plenumi kelkajn ordonojn. Vi tute ne zorgas pri ĝia estonto! Rememoru, kiel ambaŭ niaj familioj edukadis Klajd-on. Nun ĝi estas klera hundo. Komparu...

– Ekzistas speciala kurso por hundoj, oĉjo Anton, – respondis Marko. – Sed ni ne havas la kurson por mamutoj.

– Ĉu nur pro tio vi ne instruas ĝin? – Anton rigardis kun miro. – Se vi dezirus, vi povus verki la kurson.

– Vere, paĉjo, – diris Lena. – Ni instruos Miĉjon. Kun plezuro. Sed ni ne havas multe da tempo por tio.



ŝipo

– Ha, se vi dufoje en ĉiu semajno restos ĉi tie almenaŭ por unu horo – tio plene sufiĉos! Daŭrigu la instruadon dum aŭtuno, vintro kaj printempo – kaj al la venontra somero Miĉjo sukcesos ellerni ĉion necesan. Ĝi estas kapabla lernanto. Vi scias, ke postmorgaŭ mia ŝipo fornavigas kun ekspedicio al foraj landoj. Por ses monatoj! Reveninte, mi

kontrolos Miĉjon kaj vidos vian laboron. Estos ekzameno ankaŭ por vi.

– Murr! Porr ses monatoj! Perrrfekte! – murmuris Graf en la kata lingvo, frotante sin ĉe la piedo de Miĉjo.



### *II. Respondu al la sekvaj demandoj.*

Kion faris Anton staranta antaŭ Miĉjo? Kie serĉis Miĉjo pomojn? Kian konkludon faris Anton ekzameninte Miĉjo-n? Kion respondis Marko al rimarkoj de Anton? Ĉu ekzistas kurso por mamutoj? Kiu pretas instrui Miĉjo-n? Kiujn konsilojn donis Anton al Lena kaj Marko? Kiom daŭros instruado de Miĉjo? Kien forveturas Anton kaj lia ŝipo? Kiam devos reveni Anton? Por kiu estos ekzameno? Kiel kaj kion murmuris Graf?

**III. Trovu en la teksto frazojn, kiuj montras la konsilojn de Anton en edukado kaj klerigo de Miĉjo.**



**IV. Kompilu frazojn kunligante sinsekve vortojn el partoj A, B, C, Ĉ kaj D sekvante la enhavon de la teksto.**

A	B	C	Ĉ	D
Miĉjo	ne havas	Miĉjon	en	infanojn.
Ĝi	fornavigas	la instruadon	al	manko de tempo.
Anton	ne instruas	la rostron	dum	formanĝis.
Ni	prenis	kun ekspedicio	kaj	foraj landoj.
Lena kaj Marko	ekzamenos	la kurson	pro	la poŝon de Anton.
Ili	daŭrigos	pomon	por	mamutoj.
La ŝipo de Anton	ŝovis	Miĉjon	kaj	aŭtune, vintre kaj printempe.

**V. Bonordigu la planon kaj resumu laŭ ĝi kurte la tekston.**

Planata ekzameno por ĉiuj.  
Ekspedicio al foraj landoj.  
Instruprogramo por Miĉjo.  
Malklera Miĉjo.  
Unua ekzameno en kalkulo.  
Manko de kurso por mamutoj



**VI. Tralegu la rakonton «Dum Esperanto-leciono» sen uzo de vortaro. Trovu la frazojn, kiuj atestas pri la profesiaj kvalitoj de la instruistino.**

**Dum Esperanto-leciono**

En malgranda kaj komforta kursejo sidas grupo de personoj diversaĝaj kaj diversprofesiaj: inĝenieroj, instruistoj, laboristoj, pensiuloj kaj lernantoj. Ĉiun lundon kaj ĵaŭdon ili venas al la kursejo. Ili lernas diligente la internacian lingvon. Ĉiu kursano havas skribilon kaj kajeron. La gekursanoj atente aŭskultas instruistinon. Ŝi estas sperta kaj multjara esperantistino. La instruistino staras ĉe nigra tabulo.

Ŝi instruas vortojn kaj klarigas skribe gramatikaĵojn. La gekursanoj lernas kalkuli en Esperanto, respondi demandojn, belsone legi tekstojn. La instruistino paroligas la gekursanojn: kun fervoro ili priskribas bildojn. La instruistino bele kantas kaj bone ludas pianon. Ŝi ŝatas kantigi la gekursanojn kaj instrui la lingvon helpe de kantoj. Ne mankas ankaŭ versaĵoj kaj proverboj. La gekursanoj regule venas al la lecionoj kaj plezure lernas Esperanton.



skribilo



### *1. Respondu al la demandoj.*

Kie sidas la gekursanoj? Kiuj ili estas? Kiam ili venas al E-kurso? Kiel la gekursanoj aŭskultas kaj lernas? Kia estas instruistino? Kie ŝi staras dum la leciono? Kion ŝi faras? Kion lernas la gekursanoj? Kiun rolon havas la kantoj en lernoprocezo? Kiel la gekursanoj lernas la Internacian lingvon?

2. *Priskribu la lecionon de via E-kurso.*

3. *Dialogu kun via samkursan(in)o pri iu E-leciono.*

4. *Imagu vin ministro pri klerigo: kiun koncepton pri ĝenerala klerigo vi proponus?*

### **VII. Helpe de la sufikso –um–**

1) *faru novajn vortojn kaj traduku ilin:* plena – (verbo), malvarma – (verbo), folio – (verbo), aero – (verbo), cerbo – (verbo), gusti – (verbo), kolo – (substantivo), kalkano – (substantivo), proksima – (adverbo);

2) *enmetu la novfaritajn vortojn en sekvajn frazojn:*

Mi neniam manĝis artiŝokon. Mi volonte ...os ĝin. Por trovi ĝustan lokon en teksto li komencis rapide ...i libron. Multaj homoj longe kunsidas en malgranda ĉambro. Dum paŭzo oni ...os ĝin. Vintre lia fratino ofte ...as. La distanco ĝis la Nigra lago egalas ... al 3 kilometroj. Solvante ĉi komplikan krucenigmon ni ...is la tutan tagon. Tiu ĉi taĉmento bonege ...as sian profesion laboron. Junaj virinoj preferas surmeti ŝuojn je altaj ...j. Somere ...j de ĉemizoj ofte malpuriĝas.

### **VIII. Traduku en Esperanton uzante nek ... nek .**

В классе нет ни мела, ни карты. Мальчик не купил ни хлеба, ни молока. У неё нет ни братьев, ни сестер. Я не хочу говорить ни с тобой, ни с ним, ни с ней. Они не были ни на Майорке, ни на Гавайских островах.

### **IX. Plenumu la sekvajn ekzercojn.**

1. *Transformu la verbojn al aktivaj participoj atentante ilian tempoformon:*

**Modelo:** Matematikistoj kalkulas perfekte – perfekte kalkulantaj matematikistoj.

Knabo ĉiam promesas. Naturo aŭtune ekdormos. Fraŭlino restis sur la benko. Studento komparis verbajn formojn. Ŝipo navigos al Hindio. Birdoj deziras trinki de la fonto. Poeto verkas multe. Virinoj zorgas pri sia beleco.

2. *Enmetu en la frazojn la ĝustajn aktivajn participajn sufiksojn –ant–, –int–, –ont–:*

Mi renkontis surstrate kolegon aĉet...an ĵurnalon. Sid...a en angulo knabeto senĉese ploris. La sinjoro cedis lokon al enir...a maljunulino. Gimnastik...e ĉiumatene vi plisveltiĝos kaj plisaniĝos. Reve...e hejmen patrino tuj komencis kuiri tagmanĝon. Antoni Grabovski, fond...o de Ivanova E-klubo, estis komence tinkturisto en teksta fabriko. Rigard...e tra la fenestron de la trajno la pasaĝeroj mansvinge adiaŭis kun siaj parencoj. Parol...e Esperanton ne forgesu pri via ebla akĉento! La star...a en korto karuselo altiras multajn infanojn.

## X. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:

полный стакан, полным-полно, полное собрание сочинений, полное ничтожество (о человеке), в полной безопасности, в полном рассудке, полный человек, полная луна, в полном составе, полный успех, полное затмение, полное невежество.

## XI. Tralegu kaj memorfiksitu proverbojn. Ĉu ekzistas iliaj ekvivalentoj en la rusa lingvo?

Lecionoj al profesoro estas vana laboro. Kia demando, tia respondo. Disputu pri ĉio, sed sen garantio (atingi la veron). El popola cerbo venas la proverbo.



## XII. Ni kantu la kanton «Komencantoj» de ukraina aŭtoro V. Soroka.

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin helpe de vortaro.

2. Klarigu ĉiun markitan gramatikaĵon.

### KOMENCANTOJ

Versoj kaj muziko de V. SOROKA

§

A, B, C, Ĉ, D, E... 1. La u-nu-an le-ci-o-non  
A, B, C, Ĉ, D, E...  
jam ko-men-cis kurs-gvi-dan-to, ko-men-can-toj lin aŭs-kul-tas  
kun tre gran-da in-te-res'. Flan-ke si-das pre-zi-dan-to,  
ni-a ka-ra pre-zi-dan-to, kaj ri-gar-das ko-men-can-tojn  
kaj ri-gar-das ko-men-can-toj, -can-toj,  
ko-men-can-toj, bo-ne ler-nu Es-pe-ran-ton,  
ko-men-can-toj, bo-ne ler-nu Es-pe-ran-ton,  
kaj a-ki-ros vi a-mi-kojn  
kaj a-ki-ros vi a-mi-kojn  
en la land' Es-pe-ran-tuj', Ko-men-//  
en la land' Es-pe-ran-tuj'.

2. §

A, B, C, Ĉ, D, E...  
A, B, C, Ĉ, D, E...

A B C Ĉ D E - 2 foje

La unuan lecionon jam komencis kursgvidanto.  
Komencantoj lin aŭskultas kun tre granda interes'.  
Flanke sidas prezidanto, nia kara prezidanto,  
Kaj rigardas komencantojn kun espero kaj kares'.

Refreno: Komencantoj, komencantoj  
Bone lernu Esperanton,  
Kaj akiros vi amikojn  
En la land' Esperantuj'.

Ni ja iam ankaŭ estis nur timemaj komencantoj,  
Sed malfortaj ni ne estis, tiam junaj estis ni.  
Kaj ĝis nun ni ŝatas kantojn, tiujn la plej belajn  
kantojn,  
La unua leciono ŝajnas rava simfoni'.

Refreno:  
Baldaŭ iĝos vi la samaj spertaj gesamideanoj,  
Kaj la vasta verda mondo estos via por ĉiam'.  
Plivastiĝu nia rondo, plimultiĝu niaj vicoj,  
Por fidelaj geamikoj Esperanto estu am'.



alfabeto

A B C Ĉ D E – 2 foje

### Ŝlosiloj al la taskoj

#### *Tasko VII (2)*

1) plenumi, malvarmumi, foliumi, aerumi, cerbumi, gustumi, kolumo, kalkanumo, proksimume.

#### *Tasko VIII*

En klaso estas nek kreto, nek mapo. Knabo aĉetis nek panon, nek lakton. Ŝi havas nek fratojn, nek fratinojn. Mi volas paroli nek kun vi, nek kun li, nek kun ŝi. Ili estis nek en Majorko, nek en Gavajaj Insuloj.

#### *Tasko IX*

1. Knabo ĉiam promesas – ĉiam promesanta knabo. Naturo aŭtune ekdormos – aŭtune ekdormonta naturo. Fraŭlino restis sur la benko – restinta sur la benko fraŭlino. Studento komparis verbajn formojn – studento komparinta verbajn formojn. Ŝipo navigos al Hindio – ŝipo navigonta al Hindio. Birdoj deziras trinki de la fonto – birdoj dezirantaj trinki de la fonto. Poeto verkas multe – multe verkanta poeto. Virinoj zorgas pri sia beleco – virinoj zorgantaj pri sia beleco.

2. Mi renkontis surstrate kolegon aĉetantan ĵurnalon. Sidanta en angulo knabeto senĉese ploris. La sinjoro cedis lokon al enirinta maljunulino. Gimnastikante ĉiumatene vi plisveltiĝos kaj plisaniĝos. Reveninte hejmen patrino tuj komencis kuiri

tagmanĝon. Antoni Grabovski, fondinto de Ivanova E-klubo, estis komence tinkturisto en teksa fabriko. Rigardinte tra la fenestron de la trajno la pasaĝeroj mansvinge adiaŭis kun siaj parencoj. Parolante Esperanton ne forgesu pri via ebla akĉento! La staranta en korto karuselo altiras multajn infanojn.

### *Tasko X*

полный стакан – plena glaso, полным-полно – plen-plene, полное собрание – сочинений – kompleta verkaro, полное ничтожество (о человеке) – kompleta nulaĵo, в полной безопасности – en plena sekuresco, в полном рассудке – sanmense (en sana menso), полный человек – korpulentata homo (pufulo), полная луна – (plena) luno, в полном составе – en plena komplekto, полный успех – plena sukceso, полное затмение – eklipso, полное невежество – kompleta malklereso (profaneco)

## LECIONO 12

### Gramatiko



– **em** – суффикс, обозначающий «склонный к определенному действию»: *timi* (бояться) – *timema* (боязливый), *fidi* (доверять) – *fidema* (доверчивый), *danki* (благодарить) – *dankema* (благодарный);

– **at** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения страдательного залога настоящего

времени: *estimata kolego* – уважаемый коллега, *sciate* – известно, *nekonato* – незнакомец;

– **it** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения страдательного залога прошедшего времени: *ricevita letero* – полученное письмо; *farite hieraŭ* – сделано вчера; *arestitoj* – арестованные;

– **ot** – суффикс, обозначающий причастия, деепричастия и существительные причастного происхождения страдательного залога будущего времени: *lernota lingvo* – язык, который будет выучен; *tio estos malpermesote* – это будет запрещено; *persono, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto* – человек, которого должны судить, будет обвиняемым;

– **u** – окончание глаголов повелительного наклонения, которое применяется во всех лицах единственного и множественного числа; все эти формы, кроме 2 лица, переводятся при помощи частиц «пусть», «да» и глагольного окончания «те»: *Pi promenu, kie ili volas!* Пусть они гуляют, где хотят! *Ni iru hejmen!* Идёмте домой! *Vivu la demokratio!* Да здравствует демократия! *Prenu libron!* Возьми(те) книгу! *Laboru!* Работай(те)!

### Taskoj



*I. Tralegu la tekston «Eksterlanda doktoro» kaj atentu signifon de sekvaj vortoj:* *bukedo, ĉefo, doktoro, ekzotika, foti, gasto, ideo, kolekti, minuto, ordinara, profesoro, protesti, publiko, rimeno, taksio, zoologia.*

#### **Eksterlanda doktoro**

– Onklo Boĉjo, bonvolu lavi kaj kombi Miĉjon, – diris matene Maksim. – Je la dekdua venos Lena kaj Marko. Ili helpos al vi. Sed je la dua post tagmezo ni akceptos profesoron el iu ekzotika lando. Li estas doktoro pri zoologiaj sciencoj. Informita pri la mamutido, li petis permeson veni. Mi konsentis akcepti lin. Do, mi esperas je vi!

– Estu trankvila, ĉefo! – raŭkis Boĉjo. – Ĉion mi ordigos.



La geknaboj, venintaj precize je la dekdua kun Klajd, helpis al oĉjo Boĉjo prepari ĉion por la gasto. Eĉ bukedon da floroj kolektis Lena. Je dek minutoj post la dua al la parko proksimiĝis taksio. Venis la atendata gasto. Li havis orientan veston, longan nazon, nigran barbeton kaj malhelajn okulvitrojn.

– Saluton, sinjoro profesoro! – prononcis li, montrinte orajn dentojn. – Saluton, nepetoj, – dolĉe diris li al la infanoj.

– Saluton kaj bonvenon! – respondis Maksim.

– Bonan tagon, sinjoro! – respondis Lena kaj Marko.

– R-r-r! – suspekteme respondis Klajd, kaj la doktoro



florbukedo

paliĝis.

– Ne timu, ĝi estas sufiĉe pacema hundo, – diris Lena streĉante la rimenon.

Proksimiĝis Miĉjo kaj etendis al la doktoro florbukedon en la rostro.

– Ho, kia miraklo! Kia afabla animalo! – prononcis ravite la doktoro. – Mi legis plurajn artikolojn pri ĝi, pri via sukceso, sinjoro Marsim. Sed, ĉu vi volas por ĉiam lasi ... Miĉjon en ĉi tiu parko ... sen vasta publiko?

– Miĉjo servas por scienco, – respondis Maksim. – Sed kion vi preferus?

– Ho, vi devas prezenti la mamuton al la mondo. Eventuale mi havas kelkajn pretajn ideojn. Unue, la mamuton vi povas vendi ... kontraŭ tre bona pago ...

– Ne, tio ne taŭgas, – diris Maksim.

– Do, la mamuto povas vojaĝi tra la mondo. Ja ĝi ne estas ordinara besto. Vi povas montri ĝin kontraŭ pago. Tio estas bona komerco.

– Ne, Miĉjo dume ne estas forta por vojaĝoj ... ĉefe al sudaj landoj. Ĝi estas norda animalo...

– Bonvolu trinki teon! – aperis oĉjo Boĉjo. Li alportis glasojn, sukeron, kuketojn. Ekvidinte la doktoron, li preskaŭ faligis ĉion.

– Dankon, onklo Boĉjo, – ridetis Maksim. – metu ĉion sur la tablon. Komence ni invitas estimatan gaston fotiĝi kun Miĉjo.

Marko preparis fotilon, sed la gasto ekprotestis:

– Ne, ne! Mi ... ne ŝatas fotojn. Ni trinku teon, – li levis la kapon kaj rigardis supren. Tie, sur arbo, sidis la kato Graf. Ĝi kvazaŭ palpebrumis al la doktoro.



fotilo

**II. Trovu en la teksto vortojn de Maksim kaj de la doktoro, kiuj priskribas la mamuton kaj ĝiajn kapablojn.**

**III. Resumu, kiel prepariĝis niaj herooj al alveno de eksterlanda gasto?**



**IV. Respondu al la demandoj.**

Kion devas fari oĉjo Boĉjo matene? El kiu lando estas profesoro? Kiu helpis al oĉjo Boĉjo? Kian aspekton havis la atendata gasto? Kiel estis akceptita la gasto? Pri kio raviĝis la doktoro? Kiujn proponojn li faris al Maksim? Kiel agis oĉjo Boĉjo ekvidinte la doktoron? Al kio invitis Maksim la gaston? Kion preferis la gasto?



**V. Dividu la tekston je partoj kaj titoligu ĉiun. Rerakontu unu el ili.**



**VI. Tralegu kun helpo de vortaro la rakonton «Gastoj el foraj landoj» kaj diru, kie troviĝas landoj, kiujn reprezentas ĝiaj herooj.**

**Gastoj el foraj landoj**

Dum la lastaj jaroj en Rusion venas multaj eksterlandaj gastoj. Ili alvenas ankaŭ en nian urbon kaj nian E-klubon: homoj de diversaj landoj, aĝoj kaj profesioj. Unua estis altstatura franco el Avignon (Avinjon), eksinstruisto pri matematiko. Li akceptis plezure la inviton al unu el urbaj lernejoj, kie li ĉeestis la feston de la lasta lernotago. El la vizitindaĵoj aparte ĉarmis nian gaston baniĝo en rusa banejo, situanta en la korto de privata ligna domo de nia samklubano en ĉirkaŭaĵoj de la urbo. La geedzoj el Bordeaux (Bordo) kun granda intereso esploris la funkciadon de limonada uzino kaj de mebla kombino. Impresis la paron la vizito al tipa rusa vilaĝo, kie oni neniam antaŭe renkontis eksterlandanojn, kaj la unuaj el ili estis akceptitaj larĝanime, bonkore kaj gastamece. Iun vintron vizitis nian urbon juna nederlandano, kiu ŝategis rusajn frostojn kaj eĉ kuraĝis partopreni la regionskalan glitkonkuron. Belsone parolanta kaj ŝatanta kanti sperta itala esperantisto rakontadis pri siaj travivaĵoj kaj sia ĉarma lando. Eleganta angla sinjoro el Birmingham (Birmingem), profesia aktoro, kiun konis kelkaj el ni, estis netipa brito kaj multe ŝercis. Finna maresploristo ŝatas sanan vivmanieron kaj estas vegetarano. Li aktive partoprenis la prezentiĝon de nia E-klubo en unu el urbaj lernejoj okaze de la Tago de Lingvoj. Dum la Tria Lingva Festivalo ĉina kuracisto prezentis al ĝiaj partoprenantoj siam gepatran lingvon. Li mirigis nin per sia volo ellerni la rusan lingvon.



**rusa  
samovaro**

Volonte ni vizitigas al niaj gastoj nian urbon, ĝiajn muzeojn, ekspoziciojn kaj, tutcerte, la fame konatajn antikvajn urbojn de la regiono: Suzdal, Paleĥ, Kostroma, Pljos. Ĉe Volga ili admiras larĝecon de la rivero kaj ne preterlasas eblecon navigi per ŝipeto.

Promenoj tra betula bosko ravas niajn gastojn. Aparte neforgeseblaj por ili estas la renkontiĝoj en amika E-rondo kun niaj klubanoj ĉe rusa samovaro. Aroma teo kaj bongusta kuko vigligas la interparolon. Iom post iom eksonas la gitaro. Kaj la komuna E-kantado kronas la forirantan vesperon. Ĝis revido, karaj geamikoj!

**1. Provu transdoni la enhavon de la rakonto laŭ jenaj helpvortoj:**

lastaj jaroj – Rusio – urbo – E-klubo – gastoj;

vizitoj – urboj – rivero – ŝipo;

franco – instruisto – lernejo – rusa banejo;

geedzoj – mebla kombino – limonada uzino – rusa vilaĝo;

nederlandano – vintro – rusaj frostoj – glitkonkuro;

italo – sperta – varma lando – travivaĵoj;

anglo – eleganta – ŝercema – netipa;  
finlandano – maresploristo – vegetarano – Tago de Lingvoj;  
E-rondo – ĉe samovaro – interparolo – kantado.

2. *Preparu la skriban rakonton respondante al la demandoj.*

Ĉu vi ŝatus inviti eksterlandajn gastojn al via urbo? Kion vi vizitigus al ili? Pri kio vi dezirus demandi viajn gastojn?

### **VII. Jen kelkaj landoj kaj ĉefurboj. Ligu ĉiun landon al ĝia ĉefurbo.**

<b>lando</b>	<b>urbo</b>	<b>lando</b>	<b>urbo</b>
Irano	Lisbono	Japanio	Brazilio
Ĉinio	Kanbero	Portugaliao	Pekino
Brazilio	Havano	Usono	Tokio
Svedio	Bonaero	Aŭstralio	Vilno
Litovio	Vaŝingtono	Argentino	Taŝkento
Kubo	Dakaro	Senegaliao	Teherano
Uzbekio	Jerusalemo	Izraelo	Stokholmo

### **VIII. Plenumu la sekvajn ekzercojn.**

1. *Transformu la verbojn al pasiva participo atentante la tempoformojn:*

**Modelo:** trinkis akvon – trinkita akvo.

Legas libron – ... , skribos leteron – ... , riparos seĝojn – ... , atendis gastojn – ... , pendigos bildon – ... , malfermitaj fenestroj – ... , amas junulinon – ... .

2. *Uzu la ĝustajn pasivajn participajn sufiksojn –it–, –at–, –ot–.*

Li ricevis neatend...an leteron. Matene komenc...a laboro devas esti fin...a morgaŭ. La surglu...a poŝtmarko kostas 2 eŭrojn. La vend...a ĉokolado estas produkt...a en Svisio. Ne plaĉis al aŭtoro lia verk...a poemo. En lumig...a ĉambro regis malordo. La lern...a lingvo bezonas praktikon. La vizit...a urbo allogas nin. La filatelistoj kolektas nur la nedifekt...ajn poŝtmarkojn. Kuirarto estas mia dezir...a temo. Ĉiu prezent...a filmo estis plaĉa al publiko.

### **VIII. Plenumu la sekvajn ekzercojn.**

1. *Transformu la verbojn al pasiva participo atentante la tempoformojn:*

**Modelo:** trinkis akvon – trinkita akvo.

Legas libron – ... , skribos leteron – ... , riparos seĝojn – ... , atendis gastojn – ... , pendigos bildon – ... , malfermitaj fenestroj – ... , amas junulinon – ... .

2. *Uzu la ĝustajn pasivajn participajn sufiksojn –it–, –at–, –ot–.*

Li ricevis neatend...an leteron. Matene komenc...a laboro devas esti fin...a morgaŭ. La surglu...a poŝtmarko kostas 2 eŭrojn. La vend...a ĉokolado estas produkt...a en

Svisio. Ne plaĉis al aŭtoro lia verk...a poemo. En lumig...a ĉambro regis malordo. La lern...a lingvo bezonas praktikon. La vizit...a urbo allogas nin. La filatelistoj kolektas nur la nedifekt...ajn poŝtmarkojn. Kuirarto estas mia dezir...a temo. Ĉiu prezent...a filmo estis plaĉa al publiko.

### ***IX. Traduku en Esperanton uzante la volutivan finaĵon –u.***

Закройте дверь! Съешь хотя бы кусочек сыра! Идите к кассе! Не читайте плохих газет и не говорите плохих слов! Будьте внимательны при переходе улицы! Изучайте Эсперанто! Живите долго и счастливо!

***X. Enskribu la sekvajn verbojn en taŭgaj formoj:*** akcepti, etendi, esperi, flori, foti, preferi, prepari, protesti, suspekti, taŭgi, timi, vojaĝi.

Homoj devas ... kontraŭ maljusteco. Parencoj ... je resaniĝo de la etulo. Lernantino ... siajn hejmtaskojn diligente. Policano ... la arestitan viron je ŝtelo. Ni ŝatas ... pertrajne kaj ... vidindaĵojn de urboj. Tiu ĉi ĉemizo ne ... al vi: ĝi estas tro granda. Ne ... la dresitan hundon! Mi ... abrikotojn al ĉerizoj. Printempe ... multaj arboj kaj arbustoj. Antaŭ alveno de gastoj la mastrino ... la diverskoloran tablotukon sur tablon. Ni ... morgaŭ gastojn en la klubo. Necesas ĉiam ... je homoj.

### ***XI. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:***

принимать гостей, принять российское гражданство, принять на работу, принять решение, принять закон, принять меры, принять участие, принять к сведению, принять лекарство, принять (за кого-либо).

***XII. Tralegu kaj ellernu la proverbojn. Trovu ekvivalenton de ĉiu proverbo en via nacia lingvo.***

Dirite, farite.

Vojon batitan herbo ne kovras.

Malbone akirita, baldaŭ perdita.

Edzin' admirata – edzo malsata.

Kredite aĉetita porko gruntas la tutan jaron.

### ***XIII. Ni kantu «Vivu la stel'» de Agnes B. Deans.***

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin.

2. Klarigu ĉiun markitan gramatikaĵon.



## Vivu la stel'

Gaje

1. Ple - ni - gu la gla - son ho ĉi - u bo - nul', vi - vu la ver - da  
stel! Kaj kan - tu la ho - moj el ĉi - u an - gul' -  
*Refreno*  
vi - vu la ver - da stel! Ho, vi - vu la, vi - vu la,  
vi - vu la stel', vi - vu la, vi - vu la, vi - vu la stel',  
vi - vu la stel', vi - vu la stel', vi - vu la ver - da stel!

Plenigu la glason, ho, ĉiu bonul',  
Vivu la verda stel',  
**Kaj** kantu la kanton **en ĉiu** angul',  
Vivu la verda stel'.

Refreno: Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel',  
Vivu la, vivu la, vivu la stel',  
Vivu la stel', vivu la stel',  
Vivu la verda stel'.

Plenigu la glason kaj tostu **kun** ni,  
Vivu la verda stel',  
La lingvon kreitan **por** ĉiu naci',  
Vivu la verda stel'.

Refreno: Ho, vivu ...

**Per** voĉoj **de** nia kunbatalantar',  
Vivu la verda stel'.  
Resonu la voĉoj **sur** tero kaj mar',  
Vivu la verda stel'.

Refreno: Ho, vivu ...

## Ŝlosiloj al la taskoj

### Tasko VIII

2) Li ricevis neatenditan leteron. Matene komencita laboro devas esti finota morgaŭ. La surgluita poŝtmarko kostas 2 eŭrojn. La vendata ĉokolado estas produktata en Svisio. Ne plaĉis al aŭtoro lia verkita poemo. En lumigita ĉambro regis malordo. La lernata lingvo bezonas praktikon. La vizitota urbo allogas nin. La filatelistoj kolektas nur la nedifektitajn poŝtmarkojn. Kuirarto estas mia dezirata temo. Ĉiu prezentita filmo estis plaĉa al publiko.

### *Tasko IX*

Fermu pordon! Formanĝu almenaŭ peceton da fromaĝo! Iru al kasejo! Ne legu malbonajn ĵurnalojn kaj ne diru (ne elparolu) malbonajn vortojn! Estu atentemaj je trapaso de strato! Lerne Esperanton! Vivu longe kaj feliĉe!

### *Tasko X*

Homoj devas protesti kontraŭ maljusteco. Parencoj esperas je resaniĝo de la etulo. Lernantino preparas siajn hejmtaskojn diligente. Policano suspektas la arestitan viron je ŝtelo. Ni ŝatas vojaĝi pertrajne kaj foti vidindaĝojn de urboj. Tiu ĉi ĉemizo ne taŭgas al vi: ĝi estas tro granda. Ne timu la dresitan hundon! Mi preferas abrikotojn al ĉerizoj. Printempe floras multaj arboj kaj arbustoj. Antaŭ alveno de gastoj la mastrino etendis la diverskoloran tablotukon sur tablon. Ni akceptos morgaŭ gastojn en la klubo.

### *Tasko XI*

принимать гостей – akcepti gastojn, принять российское гражданство – iĝi rusia civitano, принять на работу – dungi al laboro, принять решение – decidi, принять закон – akcepti leĝon, принять меры – uzi rimedojn, принять участие – partopreni, принять к сведению – konsideri, принять лекарство – preni (engluti) kuracilon, принять за кого-либо – opini (iun iu)

## LECIONO 13

### Gramatiko



– **end** – суффикс, обозначающий долженствование, необходимость, обязанность: *subtenenda* ideo – идея, которую необходимо поддержать; *farenda* laboro – работа, которую нужно сделать (выполнить); *aĉetenda* lernolibro – книга, которая должна быть куплена;

– **uj** – суффикс, имеющий несколько значений:

1) для образования наименования предмета, в котором что-либо хранится, вместилища чего-либо: *lakto* (молоко) – *laktujo* (молочник), *lavi* (мыть) – *lavujo* (умывальник);

2) для образования наименования страны, в которой проживает преимущественно одна нация: *Francujo* – Франция, *Ĉinujo* – Китай. Сейчас более употребительным для образования наименования страны является суффикс **-i-** или слово *lando*: *Britio* – Великобритания, *Koreio* – Корея, *Pollando* – Польша;

3) для образования наименования плодового дерева или кустарника: *citrono* (лимон) – *citronujo* (лимонное дерево), *romo* (яблоко) – *romujo* (яблоня), *gozo* (роза) – *gozuj* (розовый куст);

**la** – определённый артикль является неизменяемым служебным словом одинаковым для всех родов, падежей и чисел и ставится перед именами существительными или другими словами, играющими роль существительных.

**Он употребляется:**

1) если речь идёт об определенном предмете или лице, известном или ранее упомянутом: *La sperta instruisto pri Esperanto en la ŝtata universitato*. Опытный преподаватель (учитель) эсперанто в государственном университете. – *Jen strato. En la strato staras domoj. La domoj estas multetaĝaj*. Вот улица. На улице стоят дома. Дома – многоэтажные.

2) перед названием объектов единственных в своём роде: *La Suno*. Солнце. *La Tero*. Земля. *La Luno*. Луна. *La ĉuvaŝa kaj la tatara estas la lingvoj de la popoloj, vivantaj ĉe Volga*. Чувашский и татарский являются языками народов, живущих у Волги.

3) если речь идёт о предмете (лице) в единственном числе, представляющем весь класс или категорию предметов (лиц): *La besto (ĉiu) havas kvar piedojn*. Животное (каждое) имеет четыре ноги. *La papero estas blanka, sed la neĝo estas pli blanka*. Бумага – белая, но снег белее.

4) перед именами собственными, с определяющим прилагательным или существительным: *la Balta maro* – Балтийское море, *la Suda Ameriko* – Южная Америка, *la antikva Romo* – Древний Рим, *la rivero Volgo* – река Волга, *la venonta dimanĉo* – следующее воскресенье, *la reĝo Salomono* – царь Соломон,

la larĝa Dnepro – широкий Днепр, la nekonata Ivanov – неизвестный Иванов, la fama Anna Pavlova – знаменитая Анна Павлова.

5) при обозначении дат: Mia avino alvenos la 28an de februaro. Моя бабушка придет 28 апреля. La solena ceremonio okazos la 14an de julio. Торжественная церемония состоится 14 июля.

6) вместо личного местоимения первого лица: Mi levos la manon (mian manon). Я поднимаю руку (мою руку, т.е. свою).

**Артикль не употребляется:**

1) перед названием языка эсперанто;

2) перед именами собственными: Eva, Irina, Aleksandr, Ivan, Volter, Stradivari;

3) перед титулами, степенями, званиями и словом «господин» и т.п., если они примыкают к имени собственному: Docento Petrov. Доцент Петров. Sinjorino Ebel. Госпожа Эбель.

4) перед названиями стран и городов: Rusio. Hispanio, Nov-Jorko, Ho-Ŝi-Min-urbo;

5) при обращении к одному или к нескольким лицам. Geamikoj! Lernu Esperanton! Друзья! Изучайте эсперанто!

Гласная – **а** – в артикле может быть заменена апострофом в целях благозвучия: L'arbaro estas bela. Лес – красивый. Ni vagas tra l'mondo. Мы бродим по миру.

Рассмотрение некоторых других случаев (не)использования артикля отнесено в курс эсперанто повышенного уровня.

## **Taskoj**



***I. Tralegu la tekston «Letero de Lena» kaj dividu ĝin je senchavaj partoj.***

### **Letero de Lena**

Mia amata paĉjo,

jam pli kaj pli da sekaj folioj falas sur teron en la parko. Vento pelas ilin, kaj Miĉjo ludas per ili. Venis laboristoj kaj konstruas varman lignan dometon por ĝi. Ankaŭ mi vestis varmajn ŝtrumpojn.

Ni ofte vizitadas Miĉjon. Preskaŭ ĉiutage post la lecionoj. Ni edukas ĝin. Ĝenerale, Miĉjo estas bona lernanto. Imagu paĉjo, ĝi tre ŝatas muzikon, dancas kaj eĉ provas kanti! ĝi jam komprenas multajn vortojn, ekzemple: «peco da sukero». Se mi demandas: «Ĉu vi volas sukeron?» – ĝi kapjesas. Mi demandas: «Kiom da pecoj mi havas?» – kaj mi montras du. La saĝulo Miĉjo dufoje batas teron per piedo! Ĝi povas kalkuli ĝis kvin, sed post kvin ĝi ofte eraras. Sed ni atingos nian celon – Miĉjo nepre kalkulos ĝis dek. Ni donas al ĝi kelkajn sportajn taskojn. Jen – ĝi povas paŝi nur per du malantaŭaj piedoj! Kaj turni ringon per la rostro. Tio ja estas vere videnda!





nigraj okulvitroj

Onklo Maksim venigis en la parkon iun universitatan profesoron. Ŝajnas, ke el iu orienta lando. Mi konfesu, ke mi ne ŝatas lin. Li portas dikan paperujon, sed li neniam uzis paperojn el ĝi. Li kaŝas la okulojn post nigraj okulvitroj. Li pli ofte parolas pri mono, ol pri scienco. Ial mi opinias, ke nia oĉjo Boĉjo konas kaj timas la profesoron.

Ankaŭ tiu kataĉo Graf... Ĝi ne volas paciĝi kun Klajd, ĝi ŝtelas viandon... Kvankam ĝi bone kaptas musojn...

Ni vivas normale. Nur tempo ne sufiĉas por ĉio. Iom da libera tempo restas vespere por spekti televidon aŭ por legi. Panjo aĉetis por mi belan robon kaj jupon kun butonoj.

Panjo kaj mi – ni deziras al vi sukcesan vojaĝon tra fremdaj maroj. Ni atendas vin. Ankaŭ la familio de Marko. Ankaŭ Miĉjo.



robo

Mi kisas vin forte  
Lenjo.

## ***II. Trovu la komencon kaj la finon de ĉiu parto konsiderante la jenan planon.***

1. Alvenanta aŭtuno.
2. Edukado de Miĉjo:
  - a) diversflankaj mensaj sukcesoj;
  - b) sportaj atingoj.
3. Orientlanda universitata profesoro.
4. Malamiko de Klajd.
5. Ĉiutaga vivo de Lena.

## ***III. Tralegu la frazparojn. El ĉiu paro elektu tiun, kiu rilatas al la teksto.***

1. Maksim venigis lernejan instruiston. Maksim venigis universitatan profesoron.
2. Li estas el orienta lando. Li estas el okcidenta lando.
3. Li portas malgrandan valizon. Li portas dikan paperujon.
4. Li pli ofte parolas pri mono. Li pli ofte parolas pri scienco.
5. Klajd ŝtelis viandon. Graf ŝtelis viandon.
6. Ĝi bone kaptas musojn. Ĝi bone kaptas muŝojn.
7. Tempo mankas por ĉio. Tempo sufiĉas por ĉio.
8. Panjo aĉetis por mi belan robon. Mi aĉetis por panjo belan robon.
9. Ni atendas Miĉjon. Ni atendas vin.
10. Mi kisas vin forte. Mi ĉirkaŭprenas vin forte.

## ***IV. Trovu en la teksto frazojn, kiuj priskribas novajn scipovojn de Miĉjo.***

## ***V. Uzante la leksikon de la teksto, traduku skribe en Esperanton.***

Миша играет с сухими листьями, которые падают на землю. Почти каждый день Лена навещает Мишу. Он – хороший ученик. Миша любит танцевать и

пробует петь. Он – умница и не ошибается, считая до пяти. Стоит посмотреть, как Миша выполняет спортивные задания: хождение на задних ногах и вращение кольца хоботом.

**VI. Diru unuvorte, trovante signifon de sekvaj vortoj:**

- 1) jupo, ĉemizo, mantelo – ... ;
- 2) muziko, pentraĵoj, arkitekturo – ... ;
- 3) televido, radio, gazeto – ... ;
- 4) futbalo, teniso, gimnastiko – ... .

**VII. Formu laŭ modelo laŭeble multajn vortojn el la literoj de la sekvaj:** universitato, ekzemple, normale, esperantisto.

**Modelo:** provi – vori, povi, pro, piro, viro, vi.



**VIII. Tralegu fragmenton de la rakonto «Bela» el la libro «Bato» de rusdevena germanino Lena Karpunina.**

**Bela**

... Ni ambaŭ tiam havis dekunu jarojn kaj lernis en la sama klaso. Ŝi (Bela – red.) estis senespere malbona lernantino. Ekzistis neniu fako, en kiu ŝi havis pli malpli akcepteblan noton: eĉ en korpekzercado ŝi «sukcesis» ricevadi negativajn poentojn: dum ludado ŝi ne povis rapide ĵeti la pilkon al la alia ludanto, por ne paroli pri trafo de la pilko en la golejon. Ŝi ne povis trakuri distancon en necesa tempo, ŝi povis salti nek longen, nek alten sen faligi la laton – ŝi povis nenion. Kaj post ĉiu malsukcesa provo ŝi konfuzite svingis la manojn kaj kun kulpa rideto iris flanken... .



**golejo kaj pilko**



**1. Respondu al la demandoj.**

Kiom da jaroj havis Bela? Kia lernantino ŝi estis? En kiu fako Bela havis la akcepteblan noton? Kiajn poentojn ŝi ricevadis en korpekzercado? Kiujn «sukcesojn» havis Bela? Kiel reagis Bela al siaj malsukcesoj?

**2. Komparu sportajn atingojn de mamudido Miĉjo kaj de Bela: kiu el ili estas pli lerta? Kaj kial?**

**3. Rakontu pri viaj sportaj atingoj laŭ jena plano.**

Ĉiutaga matena gimnastiko.

Sana vivmaniero sen malbonaj kutimoj.

Preferata sporto kaj amaskomunikiloj.

Regula trejnado en sportejo (stadiono, sporta halo, naĝejo).

Partopreno en sportaj konkuroj.

Sporto kaj viaj gepatroj (geamikoj).

**IX. Multaj gejunuloj nuntempe sportumas. Sed ne ĉiuj iĝas ĉampionoj. Tamen ili daŭre praktikas sporton la tutan vivon.**

1. Kompilu frazojn, kiuj respegulas vian opinion.

		en bona sanstato.
		forta.
Oni sportumas	por esti	eleganta.
		bela.
		svelta.

2. Demandu vian samkursan(in)on.

Ĉu li (ŝi) interesiĝas pri sporto? Ĉu li (ŝi) estas sportema? Ĉu li (ŝi) faras matenan gimnastikon? Kiun sporton li (ŝi) praktikas vintre (somere)? Ĉu li (ŝi) povas naĝi? Ĉu li (ŝi) partoprenas sportajn konkurojn? Ĉu li (ŝi) legas sportajn gazetojn (artikolojn pri sporto)? Ĉu li (ŝi) rigardas sportajn programojn en televido?

**X. Helpe de la sufikso –end–**

a) faru novajn vortojn kaj traduku ilin: fari, protesti, prezenti, foti, spekti, suspekti, deziri, kolekti, konstrui;

b) transformu la frazojn laŭ la modelo:

**Modelo:** Vi devas legi ĉi librojn – ili estas legendaj. Oni devas plani tion – tio estas planenda.

Mi devas aĉeti la skribilon. Oni devas konstrui domon. Karlo devas akcepti gaston. Panjo devas kuiri supon. Ni devas plenumi hejmajn taskojn. Ili devas kalkuli siajn poentojn. Oni devas kompari regulojn.

**XI. Uzante la sufikson –uj–**

a) formu novajn vortojn (kion ili signifas?) kaj faru frazojn kun ili: cindro, cigaredo, sukero, papero;

b) traduku en Esperanton.

В нашем саду цветут все яблони. В этом году мы соберем со сливового дерева хороший урожай. Будапешт – столица Венгрии. Эсперантида – страна, которой нет на карте. В солонке нет соли. Он забыл свой кошелек дома. В пенале лежали ручки и карандаши. Необходимо убирать спичечные коробки от детей. Пчелы живут в ульях.

**XII. Metu, kie necesas, la difinitan artikolon la. Klarigu ĉiun kazon.**

Mi legas ... libron en ... biblioteko sidante ĉe ... tablo. ... franca kaj ... hispana estas ... lingvoj de ... romana grupo. ... Esperanto estas ... lingvo por ... tuta mondo. Jen ... seĝo. Sur ... seĝo sidas kato. ... kato estas nigra. Estu ĉiam ... ĉielo, estu ĉiam ... suno. ... Adamo kaj ... Eva estas mondfame konataj personaĵoj. Li estas ... doktoro pri historio. ... hundo, kiu bojas, ne mordas. ... Anna kaj ... beleta Manjo promenas

en ... arbaro. ... oro estas ... valora metalo. Antaŭe mi ŝatis ripozi ĉe ... bordo de ... Balta maro.

**XIII. Traduku la sekvajn esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:**

пустая бочка, пустой человек, пустые слова, с пустыми руками, пустая отговорка, пустые мечты, пустая беседа, пустое дело.

**XIV. Voĉlegu la fragmenton de la versaĵo de hungara aŭtoro J. Baghy.**

1. Traduku ĝin helpe de vortaro.
2. Diru, kiujn kvalitojn devas havi vera esperantisto?
3. Parkerigu la versaĵon.

**Estas mi esperantisto**

Verda stelo sur la brusto  
iom palas pro la rusto.  
mi ne estas purigisto;  
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas  
kaj gazeton ne abonas... .  
Librojn legu la verkisto;  
Estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:  
«Bonan tagon! Ĝis revido!»  
Ĝi sufiĉas por ekzisto;  
Estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,  
sed nenion mi oferas.  
Mi ne estas ja bankisto;  
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia  
staros «rondo familia»,  
nekrologos ĵurnalisto:  
estis li esperantisto.



verda E-stelo

**Ŝlosiloj al la taskoj**

*Tasko VI*

- 1) jupo, ĉemizo, mantelo – vestoj;
- 2) muziko, pentraĵoj, arkitekturo – artoj;
- 3) televido, radio, gazeto – amaskomunikiloj;
- 4) futbalo, teniso, gimnastiko – sportoj.

### *Tasko XI*

En nia ĝardeno floras ĉiuj pomujoj. En tiu ĉi jaro ni havos bonan rikolton de prunujo. Budapeŝto estas ĉefurbo de Hungarujo. Esperantujo estas lando, kiu mankas sur mapo. En salujo ne estas salo. Li forgesis sian monujon hejme. En plumujo troviĝis skribiloj kaj krajonoj. Necesas kaŝi alumetujojn de infanoj. Abeloj vivas en abelujoj.

### *Tasko XII*

Mi legas libron en biblioteko sidante ĉe la tablo. La franca kaj la hispana estas la lingvoj de la romana grupo. Esperanto estas la lingvo por la tuta mondo. Jen seĝo. Sur la seĝo sidas kato. La kato estas nigra. Estu ĉiam la ĉielo, estu ĉiam la suno. Adamo kaj Eva estas mondfame konataj personaĵoj. Li estas doktoro pri historio. La hundo, kiu bojas, ne mordas. Anna kaj la beleta Manjo promenas en arbaro. Oro estas valora metalo. Antaŭe mi ŝatis ripozi ĉe la bordo de la Balta maro.

### *Tasko XIII*

пустая бочка – malplena barelo, пустой человек – frivola homo, пустые слова – vanaj vortoj, с пустыми руками – kun malplenaj manoj, пустая отговорка – senbaza preteksto, пустые мечты – iluzioj, пустая беседа – senenhava konversacio, пустое дело – negrava (vana) afero

## LECIONO 14

### Gramatiko



– **ec** – суффикс, обозначающий «свойство, качество»: blanka(белый) – blankeco (белизна), frato (брат) – frateco (братство). Mi aprecas lian amikecon. Я ценю его дружбу.

– **fi** – приставка, обозначающая индивидуальное презрение или чувство отвращения говорящего: odoro (запах) – fiodoro (вонь). Li estas fikomercisto: li ofte trompas. Он –

отвратительный коммерсант: он часто обманывает.

**Korelativaj vortoj.** Табличные слова состоят из трёх элементов, из которых стержневым является – **i** –. Начальными элементами, кроме нулевого, являются также **k**–, **t**–, **ĉ**–, **nen**–. Конечными –**o**, –**u**, –**a**, –**e**, –**om**, –**el**, –**am**, –**es**, –**al**. Из этих элементов можно образовать 45 основных слов. Половина этих слов по своим функциям являются местоимениями, а другая половина – наречиями. Только табличные слова, заканчивающиеся на –**u** и –**a**, могут принимать окончания –**j** и –**n**.

	вопрос	Ответ			
		неопределённый	указательный	собирательный	отрицательный
предмет неопр.	kio?	io	tio	ĉio	nenio
лицо (предмет)	kiu?	iu	tiu	ĉiu	neniu
качество	kia?	ia	tia	ĉia	nenia
место	kie?	ie	tie	ĉie	nenie
направление	kien?	ien	tien	ĉien	nenien
число	kiom?	iom	tiom	ĉiom	neniom
образ действия	kiel?	iel	tiel	ĉiel	neniel
время	kiam?	iam	tiam	ĉiam	neniam
принадлежность	kies?	ies	ties	ĉies	nenies
причина	kial?	ial	tial	ĉial	nenial

### Taskoj



**I. Antaŭ ol legi la tekston «Fluganta maŝino» traduku helpe de vortaro jenajn verbojn:** aranĝi, bedaŭri, degeli, descendi, dubi, grimpi, ĝeni, kroĉi, leki, ŝanĝi, toleri, vagi.

## Fluganta maŝino

Ĉifrogramo:

EN ĝanŝu al nonpla.  
Ŝomu sevon netame.  
Uga.

Krim deĉifras: NE ŝanĝu la planon. Muŝo venos matene. Agu.

Dio mamuta! Kia bona mateno! Klajd dormis apud mi en mia dometo. Nun nebulo degelis, aero estas klara, kaj ni eliris en la parkon. Graf ie vagas. Mi bedaŭras, ke ne estas amikeco inter ĝi kaj Klajd... . Jen oĉjo Boĉjo aperas kun broso kaj kun peco da salo. Mi ŝatas leki salon... . Baldaŭ venos Lena, Marko. Eble ili banos min – kia plezuro! Sed ili nepre aranĝos novan lecionon. Tion mi ne tre ŝatas. Ili montras al mi literojn en kajero. Mi bone memoras ĉion, sed mi ne povas paroli home! Mi dubas, ĉu mi iam sukcesos. Domaĝe... Hura! Mi scias, kion fari! Ili desegnis literojn per fingro sur sablo – mi povus per rostro!

Ĝus aperis tiu profesoro. Kun tiu leda fiadora ujo. Li eble estas bona viro, sed lia vizaĝo estas ruza, kiel tiu de Graf... Jen



paperujo

ankaŭ ĝi venis.

Ĉu mi volas bananon? Mi ĝenas, sed mi neniam gustumis... . La doktoro malfermas sian ujon, donas al mi tiun bananon. Bonguste! Ankaŭ por Klajd li havas oston.

Ĉu mi volas flugi kiel birdo? Mi kapjesas – estas mia revo flugi kiel birdo! Kion li faras? Li tiras el la ujo du rimenojn ... ŝovas sub mian ventron, ligas sur la dorso... . Ne tre oportune estas – sed por flugi mi toleros. Aperas en la ĉielo iu zumanta maŝino! Ĝi proksimiĝas, descendas... . Falas el ĝi ŝtuparo kaj hoko. Graf saltas en la ledan ujon. La doktoro kroĉas la hokon al miaj rimenoj kaj grimpas laŭ la ŝtuparo. Klajd bojas – ankaŭ ĝi volas flugi. Per dentoj ĝi kaptas unu rimenon... . Ho, ni



helikoptero

leviĝas... ni flugas!

Frumatene multaj loĝantoj de la urbeto kaj apudaj vilaĝoj aŭdis bruon de helikoptero. Elirinte el la hejmo ili povus vidi neripeteblan bildon: sub la helikoptero flugas elefanto kaj granda nigra hundo, kaptinta ĝin per dentoj...

**II. Traleginte la tekston «Fluganta maŝino» diru, je kies nomo ĝi estas rakontata.**



**III. Kompilu skribe la frazojn, kiuj koincidas al enhavo de la teksto.**

M A M U T I D O	revas matene pri	- manĝo.
		- flugo.
		- banado.
	bedaŭras, ke	- nebulo degelas.
		- ne estas amikeco inter Graf kaj Klajd.
		- forestas Lena kaj Marko.
	ne ŝatas	- promeni en la parko.
		- leki salon.
		- lecionojn de Lena kaj Maksim.
	rimarkis, ke	- la vizaĝo de la profesoro estas ruza.
		- Graf emas lerni.
		- Klajd ŝatas bananojn.
M I Ĉ J O	volas	- tiri du rimenojn.
		- flugi kiel birdo.
		- ligi la profesoron per remenoj.
vidas	- helikopteron.	
	- ŝipon.	
	- trajnon.	
estas kontenta, ke	- Klajd flugas kun ĝi.	
	- la doktoro grimpas.	
	- ĝi flugas per aviadilo.	

**IV. Trovu frazojn en la teksto, kiuj montras ĉiuspecajn preferojn kaj malŝatojn de Miĉjo. Kion novan vi eksciis pri Miĉjo?**

**V. Resumu kurte la tekston laŭ la sekva plano.**

Nova ĉifrogramo.

Dia mateno.

Banana tento.

«Rimenaj» flugiloj.

Neripetebila bildo.

**VI. Helpe de la sufikso –ec–**

a) faru novajn vortojn kaj traduku ilin:

**a – eco**

bela

granda

facila

sola

regula

**o – eco**

amiko

infano

**o - eca**

vitro

silko

*b) enmetu la novfaritajn vortojn en sekvajn frazojn:*

Pro timo lia rigardo iĝis ... . Ŝiaj ...j haroj mirigas ĉiujn. Iam necesas pruvi sian ... per multaj amikaĵoj. La ... de tiu ĉi junulino ravis la multestimatajn ĵurianojn de konkurso. La ecoj de Esperanto estas ... kaj ... . La multjara ... ŝanĝis negative lian karakteron. En ... oni ne pensas pri morto. La vera ... estas modesta.

**VII. Divenu la sencon de sekvaj vortoj kaj faru frazojn kun ili:** fia, fiafero, fihomo, fiaĵo, fivortoj, fiaventuro.

**VIII. Enmetu anstataŭ punktoj sence konvenajn substantivojn:** fingro, ledο, litero, nebulo,odoro, revo, sablo, vilaĝo, vizaĝo.

Nur maljunuloj nun vivas en tiu ĉi fora ... . La infana ... efektiviĝis post 20 jaroj. Por lerni la fremdan lingvon necesas konatiĝi kun ĝiaj ...j. Bongusta ... venis el la kuirejo. La nomo de dika ... estas polekso. Tiu ĉi ... ŝajnas al mi konata. Estas agrable kuŝi ĉe marbordo sur varma ... kaj sunbruniĝi. La virino aĉetis belan nigran palton el ... . Tra densa ... apenaŭ videblis proksimaj domoj.

**IX. Traduku en Esperanton.**

Действуйте быстро и смело! Я должен устроить свои дела. Мать купает малыша каждый вечер. Снег тает быстро. Ученики художественной школы часто рисуют городские пейзажи. Спортсмены спустились с вершины горы. Никто не сомневается в его профессиональных знаниях. Можно прикрепить эту картинку на стену. Не лижи лёд, а то заболеешь. Юноша учится завязывать узел на галстукe. Мои родители мечтают обменять квартиру. Они не терпят шума машин и трамваев. Они предпочитают бродить по лесам и полям, слушать, как жужжат пчелы.

**X. Tralegu kaj memorfiksi kiel «parolas» bestoj. Ĉu vi konas nomojn de ĉiuj bestoj? (laŭ Baghy Gyula «Eszperanto»)**

Abelo, birdo, vespo, muŝo zumas.	La meleagro grululuas.
Azeno, kapro, ŝafo, kapreolo blekas.	La mevo krias.
Bovo, bubalo, bizono muĝas.	La lupο, leono hurlas.
Cikonio klakas.	La alaŭdo, najtingalo kantas.
Ĉevalo henas.	La porko, apro gruntas.
Elefanto trumpetas.	La pigo babilas.
Kato miaŭas.	La pasero, vanelo kvikas.
Koko kikerikas.	La kanario, turdo (merlo, oriolo) fajfas.
Kokino klukas.	La turto kveras.
Kokido pepas.	La ansero gagas.
Korvo, korniko grakas.	La strigo, gufo ululas.
Kolombo rukulas.	La urso grumblas.
Kukolo kukuas.	La rano kvakas.
La hundo, hieno, ŝakalo bojas.	La serpento siblas.
La grilo ĉirpas.	La akcipitro, vulturo kriĉas.

## ***XI. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:***

открыть кран, открыть зонтик, открыть всю правду, открыть (о научных открытиях), открыть памятник, открыть огонь, открыть военные действия, открытый (искренний), открытое заседание, открытое судебное разбирательство, открытое голосование, открытый урок, открытое море, на открытом воздухе, под открытым небом.



***XII. Tralegu fragmenton de la rakonto «La unua eksterlanda vojaĝo» el la libro «La kruĉo da saĝeco» de rusa aŭtoro V. Eroŝenko kaj diru, kun kies helpo li vojaĝis tra Eŭropo.***

### **La unua eksterlanda vojaĝo**

Miaj amikoj-esperantistoj volis, ke mi skribu ion pri mia vojaĝo Anglion... Laŭ mia programo mi atendis unuan renkonton de samideanoj en Varsovio; tie ili povus helpi al mi ĉe la ŝanĝo de vagonaro kaj iom «kuraĝigi» min, kiel diris unu el miaj amikoj... .

Mi alvenis Berlinon frumatene. Mi prenis mian pakaĵon kaj ekrapidis eliri. Dum tiu februara, malvarma mateno ĉiu estus tute prava ne alveni renkonti eĉ la plej bonan amikon. Postuli ke tion faru iu nekonato – estus kruele. Mi surpaŝis decide peronon kun preparita parolado al tiu, kiu povas kompreni nekompreneblan, sed – Dio! Ĉu mi ne songas? Mi aŭdas mian nomon, mi aŭdas korajn salutojn, ĝojajn ekkriojn, oni premas miajn manojn, demandas pri mia sano, kaj deziras scii pri ĉiuj detaloj de mia vojaĝo... . La verda steleto brilis ne vane: ili (du novaj amikoj – red.) venis renkonti min, en tiu malvarma, februara mateno. Mi ilin petis viziti kun mi la instituton por blinduloj en *Steiglitz*. Kaj ni iris.

Je la 2-a horo posttagmeze mi estis jam en *Calais*; kaj kun helpo de du portistoj mi trovis loĝejon de s-ro *Perrin* (vicdelegito en *Calais*), kiu kun franca ĝentileco aŭ pli vere kun esperantista delikateco sidigis min sur vaporŝipon kaj petis la ŝipestron zorgi pri mi speciale. Mi estis tre lacigita kaj la finon de mia vojaĝo mi memoras malklare, sed noblan voĉon de s-ro *Finez* en *Dover*, lian afablecon, tason da teo kun li kaj lian koran manpremon oni ne povas facile forgesi. Li telegrafis al s-ro *Blaise* (delegito en *London*), ke li renkontu min, kaj ni disiĝis.

Post tri monatoj de mia ĉeesto en Anglujo, laŭ peto de unu esperantistino, oni konsentis min akcepti, kiel lernanton en la plej bonan anglan instituton por blinduloj. Kaj nur en septembro mi min turnis ree al la helpo de *Peterburg*'aj, petante ilin helpi al mi dum mia reveno Ruslandon. Ili akceptis min kun vera rusa simpleco kaj gastameco.

Jes, mi nun povas diri, ke la lampo de Aladeno ne povus helpi al mi pli ol la verda esperantista steleto; mi estas certa, ke neniuj geniulo de arabaj fabeloj povus fari por mi pli, ol la geniulo de reala vivo Doktoro Zamenhof, kreinto de «Esperanto».



**Doktoro Zamenhof**



### *1. Respondu al la demandoj.*

En kiu lando komencis sian vojaĝon V.Eroŝenko? Kien li veturis? En kiu urbo devis okazi lia unua renkonto de samideanoj? Kiam venis V.Eroŝenko al Berlino? Kiu lin renkontis sur perono? Kion vizitis rusa esperantisto en Berlino? Kiu helpis al V.Eroŝenko en Calais? Kion faris s-ro Finez por la vojaĝanto? Kiom da tempo restis V.Eroŝenko en Anglio? Pri kio li okupiĝis tie? Ĉu la lampo de Aladeno helpis al blinda esperantisto vojaĝi tra Eŭropo? Kiu kreis Esperanton? Ĉu vi ŝatus vojaĝi tra Eŭropo pere de Esperanto?

### *2. Rerakontu la tekston laŭ la plano.*

La unua renkonto de samideanoj en Varsovio.

Koraj salutoj en Berlino.

Esperantista ĝentileco de s-ro Perrin.

Neforgesebla afableco de s-ro Finez.

Lernado en Anglio.

Reveno al Ruslando.

Verda steleto kaj Doktoro Zamenhof.



**XIII. Voĉlegu kaj traduku helpe de vortaro kelkajn strofojn de la versaĵo «La vojo» de L. Zamenhof kaj diru, kiujn trajtojn de lia karaktero ili montras.**

### **La vojo**

Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
Nek batoj de l'sorto, nek mokoĵ de  
l'homoj,

Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita

Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante

Ni iru la vojon celitan!

Eĉ guto malgranda, konstante  
frapanta,

Traboras la monton granitan.

L'espero, l'obstino kaj la pacienco –

Jen estas la signoj, per kies potenco

Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,

Atingos la celon en gloro.



### *1. Respondu al la demandoj.*

Kiun ne timigas la noktaj fantomoj? Kia estas la voj' elektita? Kiel oni iru la vojon celitan? La vojo celita, kio ĝi estas? Kio povas trabori la monton granitan? Kiel eblas atingi la celon en gloro?

### *2. Parkerigu la prezentitan parton de la versaĵo.*

## Ŝlosiloj al la taskoj

### *Tasko VI*

2) Pro timo lia rigardo iĝis vitreca. Ŝiaj silkaj haroj mirigas ĉiujn. Iam necesas pruvi sian amikecon per multaj amikaĵoj. La beleco de tiu ĉi junulino ravis la multtestimatajn ĵurianojn de konkurso. La ecoj de Esperanto estas facileco kaj reguleco. La multjara soleco ŝanĝis negative lian karakteron. En infaneco oni ne pensas pri morto. La vera grandeco estas modesta.

### *Tasko VIII*

Nur maljunuloj nun vivas en tiu ĉi fora vilaĝo. La infana revo efektiviĝis post 20 jaroj. Por lerni la fremdan lingvon necesas konatiĝi kun ĝiaj literoj. Bongustaodoro venis el la kuirejo. La nomo de dika fingro estas polekso. Tiu ĉi vizaĝo ŝajnas al mi konata. Estas agrable kuŝi ĉe marbordo sur varma sablo kaj sunbruniĝi. La virino aĉetis belan nigran palton el ledo. Tra densa nebulo apenaŭ videblis proksimaj domoj.

### *Tasko IX*

Agu rapide kaj kuraĝe! Mi devas aranĝi miajn aferojn. Patrino banas etulon ĉiun vesperon. Neĝo degelas rapide. Gelernantoj de artlernejo ofte desegnas urbajn pejzaĝojn. Sportistoj descendis de montopinto. Neniu dubas pri liaj profesiaj scioj. Eblas alkroĉi tiun ĉi bildon al muro. Ne leku glacieron, alimaniere vi malsaniĝos. Junulo lernas ligi nodon de kravato. Miaj gepatroj revas ŝanĝi loĝejon. Ili ne toleras bruon de aŭtoj kaj tramoj. Ili preferas vagadi tra arbaroj kaj kampoj, aŭskulti, kiel zumas abeloj.

### *Tasko XI*

открыть кран – malfermi kranon, открыть зонтик – streĉi ombrelon, открыть всю правду – malkovri la tutan veron, открыть (о научных открытиях) – malkovri, открыть памятник – inaŭguri, открыть огонь – ekpafi, открыть военные действия – komenci militoperaciojn, открытый (искренний) – sincera, открытое заседание – publika kunsido, открытое судебное разбирательство – publika juĝo, открытое голосование – malsekreta voĉdonado, открытый урок – modela leciono, открытое море – alta maro, на открытом воздухе – en libera aero, под открытым небом – sub libera ĉielo

## LECIONO 15

### Gramatiko



### **Komplikaj (kompleksaj) tempoformoj de verboj.**

Сложные времена глаголов образуются с помощью временных форм вспомогательного глагола **esti**, который теряет в этом случае своё собственное значение, и причастия основного глагола настоящего, прошедшего или будущего времени в действительном или страдательном залоге. Девять сложных форм выражают одновременность, предшествование или последовательность действия, в основном, в письменной речи. Все сложные времена «отягощают» предложения, поэтому их редко используют, за исключением необходимых форм прошедшего и будущего времени совершенного вида. Рассмотрим сложные времена на примере рассказа.

### **En teatro**

Mia amiko invitis min al teatro, kie li aktoras. Sabate li devas ĉefroli *Princon* en nova spektaklo. Mi nepre iros al teatro.

#### **Sabate mi iros al teatro. Kion mi vidos?**

Komence mi vidos, ke mia amiko *estos ludonta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estos ludota* de mia amiko

Poste mi vidos, ke mia amiko *estos ludanta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estos ludata* de mia amiko.

Fine mi vidos, ke mia amiko *estos ludinta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estos ludita* de mia amiko.

#### **Nun mi estas en teatro Kion mi vidos?**

Komence mi vidos, ke mia amiko *estas ludonta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estas ludota* de mia amiko.

Poste mi vidos, ke mia amiko *estas ludanta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estas ludata* de mia amiko.

Fine mi vidos, ke mia amiko *estas ludinta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estas ludita* de mia amiko.

#### **Spektaklo finiĝis. Mi forlasis teatron. Kion mi vidis?**

Komence mi vidis, ke mia amiko *estis ludonta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estis ludota* de mia amiko.

Poste mi vidis, ke mia amiko *estis ludanta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estis ludata* de mia amiko.

Fine mi vidis, ke mia amiko *estis ludinta* la ĉefrolon, kaj la ĉefrolo *estis ludita* de mia amiko.

Se mi *estus havinta* talenton, mi ankaŭ *estus ludinta* en teatro. Tamen mi restis tre kontenta pri la *vidita* spektaklo.

## Taskoj



***I. Tralegu la tekston «La heroa hundo Klajd» kaj diru, je kies nomo ĝi estas rakontata.***

### **La heroa hundo Klajd**

Nur du pensoj akompanis min dum la flugo. Unue, mi pensis, ke en tia situacio mi devas firme teni la rimenon por ne fali. Por resti kun Miĉjo. Kaj due, mi pensis, ni estas trompitaĵ! Tiu «profesoro», senĉese babilanta pri vendoj... Tiu kataĉo! R-r-r! Mi formordos ĝian voston! Mi havas r-r-raĵton! Kaj oĉjo Boĉjo! Li estis dungita por gardi Miĉjon. Tio estas lia ofico. Sed fakte li senhonte forkuris! R-r-r!

Ni flugis super ebenoj-kampoj, super montoj kaj riveroj. Ventego blovis en miajn orelojn. Freneza ventego! Subite mi eksentis, ke mi glitas malsupren. Tiu fiulo-profesoro elŝovis la kapon kaj kriis: «Pli akurate! Atentu! Ne difektu la beston!» Kaj efektive, ni estis mole metitaj en iun freŝe fositan kavon. Kompatinda Miĉjo ne povis elsalti de tie. Do, mi decidis militi sola. Ja mi devis savi mian amikon! Mi lekis ĝian rostron, saltis sur ĝian dorson kaj de tie sur la herbon.

Ĉirkaŭ mi estis densa arbaro. Super mi pendis laflugmaŝino. Laŭ ŝnura ŝtuparo estis descendantaj tiuj «Graf» kaj «doktoro». Mi ne povis min deteni. Mi saltis kaj mordis voston de la kataĉo. «Mia-aŭ» – naŭze ekjelpis ĝi. «Kaptu la hundon!» Du aŭ tri viroj en maskoj ĵetis sin al mi, sed mi jam estis forkuranta inter arbojn. Mi transkuris cirkle kaj revenis en arbustojn por aŭdi ĉion. Mi aŭdis voĉon de la «doktoro»: «Fiuloj! Vi ne kaptis la hundon! Tamen ĝi nenion malhelpos. Ni estas ĉe la ŝtata limo. Ĉi tie ni ŝargos petrolon por la helikoptero kaj nokte ni estos flugontaj trans la maron».

Jen kion intencis fari la aĉuloj! Mi kuris for, longe-longe tra la arbaro. Mi estis malsata kaj soifa. Sed mi kuris. Finfine mi estis vidinta herbejon, kie estis multaj ĉevaloj kaj bovinoj. Flanke sidis paŝtisto, aŭskultanta radion.



ĉevaloj kaj bovinoj sur herbejo

«Krimuloj ŝtelis la mamutidon Miĉjon! – anoncis la radio. – Kun ĝi estas ŝtelita la hundo Klajd – nigra, vila, granda. La krimuloj direktis sin al sud-okcidento. Ĉiuj civitanoj estas petataj helpi la serĉadon!»

Mi proksimiĝis al la patisto kaj tuŝis lian brakon.

– Klajd? – ekkriis li, kaj mi lekis lian vangon.

***II. Difinu signifon de la sekvaj vortoj kaj faru la frazojn kun ili:*** akompani, akurate, anonci, difekti, efektive, fakto, masko, ofico, situacio.

***III. Trovu en la legita teksto la frazojn, kiuj montras rilaton de Klajd al fiherooj kaj iliaj agoj.***



**IV. Kompilu 10 frazojn sekvante la enhavon de la teksto kaj korekte ligante la partojn A, B, C, D kaj E.**

A	B	C	D	E
Mi Oĉjo Boĉjo Ni Graf kaj «doktoro» Hundo Klajd Ĉiuj civitanoj	estas	descendantaj flugontaj ŝtelita metitaj trompita vidinta malsata kaj soifa petataj forkuranta dungita	en kun laŭ por trans inter	herbejon la maron arboj ĝi ŝtuparo helpi la serĉadon fositan kavon gardi Miĉjon

**V. Traduku en Esperanton.**

В этой ситуации Клайд должен был не упасть, чтобы остаться с Мишей. Они – обмануты. Клайд намеревался откусить хвост этому противному коту. Дядюшка Боря не охранял Мишу. Бешеный ветер дул в уши. Их мягко и плавно поместили в какую-то свежевыврытую яму, откуда Миша не мог бы выбраться. Клайд решил спасти Мишу. Клайд лизнул хобот своего друга и прыгнул на траву. Над густым лесом висел вертолёт. По верёвочной лестнице спускался Граф, хвост которого укусил Клайд. Мужчины в масках бросились к собаке, но Клайд уже убежал в лес. «Доктор» намеревался ночью улететь на вертолете за море. По радио объявили поиск мамонтёнка Миши и большой лохматой собаки Клайда.

**VI. El kiom da partoj konsistas la teksto? Titoligu kaj resumu kurte ĉiun parton.**

**VII. Faru frazojn laŭ la modeloj en kursivo:**

**Modelo:** Dum trejnado sportisto laciĝas. Trejnante, sportisto laciĝas.

Dum dormo homo ripozas. Dum festo ĉiuj dancas. Dum veturo pasaĝero legas.

**Modelo:** Sportisto dum trejnado laciĝas. Trejnanta sportisto laciĝas.

Turisto dum ekskurso vizitas muzeon. Amiko dum parolo rakontas anekdoton.

**Modelo:** Dum vizito al kuracisto vi nervoziĝas. Vizitante kuraciston vi nervoziĝas.

Dum rigardo de spektaklo oni ĝuas. Dum studo de Esperanto homoj ne haltas.

**Modelo:** Mastrino dum preparo de manĝo malsatas. Mastrino preparanta manĝon malsatas.

Maljuna ŝuisto dum riparo de botoj laciĝas. Raketo dum flugo forbrulas.

**Modelo:** Post danco mi ripozas. Dancinte mi ripozas.

Post edziĝo li pli feliĉas. Post ferio mi laboras. Post sunbruniĝo gejunuloj naĝas.

**Modelo:** *Virino post danco ripozas. Dancinta virino ripozas.*

Paŭlo post edziĝo feliĉas. Inĝeniero post ferio laboras. Junulo post sunbruniĝo naĝas.

**Modelo:** *Antaŭ studo Maja aĉetas lernolibron. Studonte Maja aĉetas lernolibron.*

Antaŭ konkuro sportisto trejnas. Antaŭ vojaĝo turisto aĉetas trajnbileton.

**Modelo:** *Antaŭ invito de gastoj ŝi ordigas ĉambron. Invitonte gastojn ŝi ordigas ĉambron.*

Antaŭ trapaso de ekzameno studento prepariĝas. Antaŭ manĝi fruktojn ni lavas ilin.

**Modelo:** *Ĉefo antaŭ komenco de kunveno telefonas. Ĉefo komenonta kunvenon telefonas.*

Sekretariino antaŭ tajpi tekston legas ĝin. Homo antaŭ fari ion pripensas rezulton.

### **VIII. Legu subajn frazojn. Traduku ilin kaj klarigu uzon de komplikaj tempoformoj de verboj.**

La kampo estis kovrita per densa arbustaro. Kaj, kvazaŭ nenio estus okazinta, li daŭrigis la vojon. La besto estas rigardanta min rekte en la okulojn. La grandegaj arboj estis interplektitaj per longaj branĉoj. Kiam ni rikoltos ĉi-fruktojn, ni estos ĝuantaj veran delikataĵon. Estu konvinkita, ke mi plenumos vian peton. La novaĵo estis alvenanta antaŭ nia apero. Se ŝi estus povinta sendi kelkvortan saluton, ŝi nepre tion farus. Mi ne povis paroli, la gorgo estis premita de emocio. Li baldaŭ estas forlasonta la geamikojn. Nun la truo de ilia ŝipo estis riparita. Post sukcesa ĉasado, la turistoj estos provizitaj minimume por kelkaj tagoj. Verŝajne, niaurbaj eksterlandaj gastoj estos loĝontaj en kvinstela hotelo.

### **IX. Transformante la subajn frazojn:**

1) *uzu aktivajn adjektivojn participajn.*

La sonorilo sonis, ĝuste kiam mi *eniradis* en la klason. Li ricevos premion, kiam li *finos* sian laboron. Dum gastoj dancis, *ekpaneis* magnetofono. Kiam la ĝusta tempo *venos*, tiam ili ekagos. Morgaŭ la junulino *studos* la tutan tagon. Viaj okuloj *esploradas* la maron, sur kiu malproksime videblas ŝipeto. Se ni pliproksimiĝus al lignofajro, ni riskus bruligi niajn vestojn.

2) *uzu pasivajn adjektivojn participajn.*

Kiam oni satas, oni ne *bezonas* manĝon. Kie ajn li koncertis, oni *aplaŭdis* lian majstrecon. Dum ni ripozis, oni *kuiris* vespermanĝon. Mi eklegis, post kiam mi *skribis* leteron. Blovegis vento kaj ĝi *rompis* multajn arbojn. Baldaŭ al zooĝardeno oni *venigos* novan loĝanton – afrikan papagon. Ĉi tie oni *parolas* Esperanton.

### **X. Kompletigu la sekvajn frazojn uzante participajn adverbojn**

1) *aktivajn:* Traleginte la revuon, ... . Malfermante la pordon, ... . Vojaĝonte al Brazilo, ... .

2) *pasivajn:* Inspirite de nova ideo, ... . Serĉate ĉie, ... . Dirite «jes», ... .

### **XI. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:**

широкие планы, широкая юбка, широкая публика, жить на широкую ногу, в широком смысле слова, в широком масштабе, в широких размерах, широко вещание.



## XII. *Tralegu fragmenton el la libro «Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo» de jugoslavia aŭtoro T. Sekelj.*

### **Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo**

Ni estis revenantaj al la bivako, padelante kontraŭ la riverfluo... Post unuhora padelado ni atingis la ŝipeton kiu nun, je nia surprizo, troviĝis tre proksime al la riverbordo, kaj kun sia plej granda parto ekster la akvo. Do, la riparlaboroj estis progresantaj


– La tagmanĝo estas preta! – ekkriis post iom da tempo unu el la sinjorinoj. Kvazaŭ sekvante nerezisteblan odoron, subite ĉiuj forlasis la laboron, kune kun la ŝipestro, kaj alkuris al la fajrujo, de kie allogaodoro de rostaĵo etendiĝis.

La testudovoj kaj la dazipviando estis bone distribuitaj, dum la birdoj restis por esti manĝataj vespere.

La viando de la dazipo estis blanka kaj mola. Malgraŭ tio, ke neniu el ni estis manĝinta ĝin antaŭe, ĉiuj trovis ĝin bongusta.

Posttagmeze ni daŭrigis la laborojn pri la eltiro de la ŝipo. Kiam la pruo jam estis tre alte levita, ni ligis la ŝnuregon al la poŭpo pot certigi la ekvilibron de la ŝipo.

Je vesperiĝo ankaŭ tiu laboro estis finita. Nun ni povis klare vidi la lokon, kie la subakva trunko estis penetrinta en la flankon de la ŝipeto. Nur du tabuloj estis frakasitaj. La ŝipestro asertis ke la tuto estos facile riparebla dum la sekvanta mateno. Tiel verŝajne ni la sekvantan posttagmezon povos ekveturi...



libro de T. Sekelj

1. *Trovu en la fragmento la participajn vortojn kaj klarigu iliajn formojn.*



2. *Respondu al la demandoj.*

En kiu parto de la mondo, laŭ via opinio, okazas la eventoj de la fragmento? Per kio revenis la herooj al la bivako? Kio surprizis ilin? Kial ĉiuj subite forlasis la laboron? Kio estis preparita por la tagmanĝo? Kiun laboron daŭrigis la herooj posttagmeze? Kiam ĝi estis finita? Kio okazis al la ŝipeto? Kion asertis la ŝipestro?

3. *Rakontu pri viaj aventuraj vojaĝoj laŭ jena plano.*

Zorgoplena prepariĝo al la turista marŝo (tra arbaro, montaro ktp.).

Konsisto de la grupo kaj celo de la marŝo.

Komenco de la (perpieda, perbicikla, pertrajna ktp.) marŝo.

Apero de io surpriza.

Reago de la grupanoj al la neatentita situacio.

Solvo de la survojaj problemoj.

Atingo de la celo.

Feliĉa reveno hejmen.

**XIII. Enmetu anstataŭ punktoj sence konvenajn verbojn:** mordi, soifi, trompi, fosi, gliti, ĉesi, babili, dungi, paŝti.

1. Mi ne ...as vin, mi diras la veron. 2. Bojanta hundo ne ...as. 3. Dum varmega tago infanoj ...is kaj petis akvon. 4. Vintre, kiam frostas kaj estas glacio sur trotuaroj, ekzistas danĝero ... kaj fali. 5. Direktoro de l' entrepreno intencas ... seriozan laboreman junulon. 6. Pro malsaniĝo homo ... is fumi. Antaŭe li fumis multajn jarojn. 7. Renkontiĝante sur la placo dum foira tago virinoj ŝatas longe ... . 8. Antaŭ ol ion planti, necesas ... la teron. 9. En infanaĝo li ...is ĉevalojn en ĉirkaŭaĵoj de sia vilaĝo.

**XIV. Tralegu kaj ellernu proverbojn. Ĉu ekzistas iliaj analogoj en via nacia lingvo?**

Dronanto domon proponis, savito eĉ brikon ne donis.

Al fiŝ' kuirita jam akvo ne helpas.

Ne ĉio brilanta estas diamanto.



**XV. Ni kantu «Ni vojaĝas», E-teksto de V. Ŝilas.**

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin helpe de vortaro.

2. Diru, kien, kielmaniere kaj kiucele vojaĝas gaja kompanio?

**Gaje**

Ni vo - ja - ĝas, ni ser - ĉas ĝoj - on,  
mal - pro - ksi - mo lo - gas nin. Lon - gan, lon - gan ni  
fa - ris voj - on - ne vi - deb - las ĝi - a fin'. (fin', fin', fin'.)  
Lon - gan, lon - gan ni fa - ris voj - on  
ne vi - deb - las ĝi - a fin'. ĉi - am re - me - mo - ros ĝin.

Ni vojaĝas, ni serĉas ĝojon,  
Malproksimo logas nin.  
Longan, longan ni faris vojon,  
Ne videblas ĝia fin' (fin', fin', fin').  
Longan, longan ni faris vojon,  
Ne videblas ĝia fin'.

Bonaj ŝuoj kaj perpiede  
Atingeblas terpolus'.  
Kiam paŝi fariĝas tede,  
Taŭgas samdirekta bus' (bus', bus', bus').  
Kiam paŝi fariĝas tede,  
Taŭgas samdirekta bus'.

Mankas tempo, do, ploru mono,  
Radoj frapas pro enu'.  
Ni veturas en vagono,  
Trajna bru' kaj tiel plu (plu, plu, plu).  
Ni veturas en vagono,  
Trajna bru' kaj tiel plu.

Urboj preter fenestroj kuras,  
Kantas gaja kompani'.  
Vi komprenis, ke ni veturas  
Al tendaro tiu ĉi (ĉi, ĉi, ĉi).  
Vi komprenis, ke ni veturas  
Al tendaro tiu ĉi.

Ni vojaĝis, ni trovis ĝojon,  
Ĉar ni serĉis kun obstin'.  
Kiu estis tendare fojon,  
Ĉiam rememoros ĝin (ĝin, ĝin, ĝin).  
Kiu estis tendare fojon,  
Ĉiam rememoros ĝin.

### **Ŝlosiloj al la taskoj**

#### *Tasko IX*

1) La sonorilo sonis, ĝuste kiam mi estis enirinta en la klason. Li ricevos premion, kiam li estos fininta sian laboron. Dum gastoj dancis, magnetofono estis ekpaneinta. Kiam la ĝusta tempo estos venonta, tiam ili ekagos. Morgaŭ la junulino estos studonta la tutan tagon. Viaj okuloj estas esplorantaj la maron, sur kiu malproksime videblas ŝipeto. Se ni estus pliproksimiĝintaj al lignofajro, ni riskus bruligi niajn vestojn.

2) Kiam oni satas, manĝo ne estas bezonata. Kie ajn li koncertis, lia majstreco estis aplaŭdata. Dum ni ripozis, vespermanĝo estis kuirita. Mi eklegis, post kiam letero estis skribita. Blovegis vento kaj multaj arboj estis rompita. Baldaŭ al zooĝardeno estos venigota nova loĝanto – afrika papago. Ĉi tie Esperanto estas parolata.

#### *Tasko XI*

широкие планы – grandaj (vastaj) planoj, широкая юбка – loza juro, широкая публика – vasta publiko, жить на широкую ногу – vivi lukse, в широком смысле слова – en larĝa senco de la vorto, в широком масштабе – en larĝa skalo, в широких размерах – en granda dimensio, широковещание – disaŭdigo, широкоплечий – larĝaŝultra

### *Tasko XIII*

1. Mi ne trompas vin, mi diras la veron. 2. Bojanta hundo ne mordas. 3. Dum varmega tago infanoj soifis kaj petis akvon. 4. Vintre, kiam frostas, kaj estas glacio sur trotuaroj, ekzistas danĝero gliti kaj fali. 5. Direktoro de l'entrepreno intencas dungi seriozan laboreman junulon. 6. Pro malsaniĝo homo ĉesis fumi. Antaŭe li fumis multajn jarojn. 7. Renkontiĝante sur la placo dum foira tago virinoj ŝatas longe babilu. 8. Antaŭ ol oni plantu, necesas fosi la teron. 9. En infanaĝo li paŝtis ĉevalojn en ĉirkaŭaĵoj de sia vilaĝo.

## LECIONO 16

### Gramatiko



– **ing** – суффикс, обозначающий предмет, в который частично помещён и зафиксирован другой предмет: kandelo (свеча) – kandel**ing**o (подсвечник). Tubeto, en kiun oni metas cigaredon, kiam oni ĝin fumis, estas cigared**ing**o. Трубочка, в которую кладут сигарету, когда её курят, является мундштуком.

**mis** – приставка обозначающая, что действие производится ошибочно или неверно: kalkuli (считать) – **miskalkuli** (обсчитаться). Ĉu mi ne **misaŭdis**: via antaŭnomo estas Vladimir? Я не ослышался: ваше имя Владимир?

### Taskoj



*I. Antaŭ ol legi la tekston «La eventoj en arbaro» difinu signifon de jenaj vortoj: salono, soldato, atako, cigaredo, deĵori, detala, funkcii, karto, raportoj, regiono, stari.*

#### **La eventoj en arbaro**

La esploristoj, senditaj kun Klajd, facile trovis la lokon. Reveninte, ili raportis al kolonelo, ke la ŝtelistoj preparas ĉion por nokta forflugo. La kolonelo formetis cigaredingon kaj diris al Maksim:

– Ni devas rapidi, profesoro. Miaj soldatoj estas spertaj batalantoj. Mi mem gvidos ilin. Do, ni povas komenci la atakon.

– Tamen, estas la kaŭzo por prokrastigi la atakon, – respondis Maksim. – Inter ili estas la mamutido. Ni ankoraŭ unu fojon ĝustigu ĉion, precipe tion, kio rilatas Miĉjon. Ni ne rajtas misagi.

Ili denove klinis sin al la detala mapo de la regiono.

... Krim sentis sin feliĉa, kvazaŭ li jam gajnis la milionon. La besto apartenis al li. Ĝi estis en la kavo kaj ĝi estis ligita per rimenoj al la helikoptero. Tiu staris super la kavo kaj estis preta por ekflugo. La helpantoj de Krim, armitaj per senbrujaj pistoloj kaj akraj tranĉiloj, deĵoris en la arbustaro. Mem Krim kun la kato Graf kaj kun la pistolo decidis ripozi en salono de la helikoptero.



mapo

– Gardu la lokon atente! – ordonis li al la helpantoj. – Post unu horo ni startos...

Ĉio ŝajnis trankvila, kvankam la kato miaŭis malkontente:

– Tiu hundaĉo kaŝas sin ie en proksimo. Miaŭ! La vosto doloras!

Finfine ankaŭ ĝi trankviliĝis apud la dormanta Krim. Pasis iom da tempo kaj subite iu laŭte vokis:

– Hej vi, en la helikoptero! Levu la manojn kaj eliru!



– Startu ni! – jelpis Krim al la piloto. – Ili ne pafos kontraŭ la besto!

La motoro ekfunkciis, ekbruis, sed la helikoptero restis sur la sama loko. Ĝi estis firme ligita per feraj ŝnuroj al kvar arboj.

– Ne malhelpu! – jelpis Krim, svingante per la brako. – Aliokaze mi mortigos la bestaĉon!

– Eliru, eliru, sinjoro Krim, – pace ridetis la kolonelo, – Miĉjo ne plu estas tie.

Krim ĵetis rigardon en la kavon – tie kuŝis la gardistoj kun ŝnuritaj brakoj kaj kruroj. Tiam li malrapide levis la manojn.



## **II. Traleginte «La eventoj en arbaro» respondu al la demandoj.**

Kion kaj al kiu raportis la esploristoj senditaj kun Klajd? Kio kaŭzis la prokrastigon de la atako? Kial Krim sentis sin feliĉa? Per kio estis armitaj la helpantoj de Krim? Kial la kato Graf miaŭis malkontente? Pro kio la helikoptero ne povis ekflugi? Kiu kuŝis en la kavo anstataŭ la mamutido?

## **III. Trovu en la teksto la frazojn, kiuj atestas pri kuraĝa karaktero de la kolonelo.**

## **IV. Resumu la enhavon de la teksto laŭ jenaj helpvortoj:**

esplorintoj – stelistoj – nokta forflugo,

kolonelo – soldatoj – atako,

besto – kavo – rimenoj,

helpantoj – pistoloj – tranĉiloj,

prokrastigi – ĝustigi – misagi,

Krim – Graf – salono de helikoptero,

levu – eliru – startu ni,

motoro – sama loko – kvar arboj,

gardistoj – brakoj kaj kruroj – manoj.

## **V. Helpe de la sufikso – ing –**

1) faru novajn vortojn kaj traduku ilin: cigaredo, glavo, fingro, ingo, kandelo;

2) enmetu la novfaritajn vortojn en sekvajn frazojn:

Antaŭ ol kudri mia avino ĉiam surmetas sian ...n. Ĉe la muro staris malnova piano kun orumitaj ...j. Unu el ornamaĵoj de tiu ĉi domo estis trofea glavo en ... . Depende de speco de cigaredoj ŝia frato uzis diversajn ...jn: el ligno, sukceso, ostoj. Por ke okulvitroj servu longe necesas meti ilin en ...n.

## **VI. Helpe de la prefikso mis –**

1) faru novajn vortojn kaj traduku ilin: aŭdi, informi, kalkuli, kompreni, konduki, rigardi;

2) enmetu la novfaritajn vortojn en sekvajn frazojn:

Radio ...is pri hodiaŭa vetero: pluvas de mateno. Mi ...is vian nomon, bonvolu ripeti ĝin. Aŭskultu atente la anoncon, por ne ...i. La eta vojo en arbaro ...is infanojn kaj ili perdiĝis. La lernanto estas laca. Li ofte ...as. Tiu pasaĝero ...is horaron kaj maltrafis trajnon.

## VII. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:

завязать пакет, завязать глаза, завязать ботинки, завязать узлом, завязать галстук, завязать разговор, завязать торговые отношения, завязать перестрелку, завязать ссору, завязать переписку, завязать интригу.



## VIII. Tralegu fragmenton el la libro «Nesto de viperoj» de hungara aŭtoro István Nemere kaj diru, kion serĉis policistoj.

### Nesto de viperoj

La eksterordinara grupo polica nur je la unua posttagmeze finis la laboron. Dekduo de uniformitaj kaj civilaj policistoj traserĉis la ĝardenon. Samtempe Lina, Koller kaj aliuloj denove esploris la tutan domon. Ĉiun ĉambron, ĉiun ejon komunan. Ankaŭ la banĉambrojn ... Ili disĵetadis la aĵojn de la domanoj, de gastoj kaj de servistoj, rigardis en la skribotablojn, ŝrankojn, eĉ en valizojn kaj litojn. La domanoj estis jam post la tagmanĝo, kiun Mathilde kaj Betty en tre angora atmosfero servis al

la tablo. La policistoj ricevis tagmanĝon el la urbo; oni liveris ĝin aŭte rekte el la policeja kuirejo. La maljuna ĉefo de Koller kompreneble eluzis la okazon kaj denove telefonis al la inspektoro. La dua murdo – apenaŭ sep horojn post la unua, samloke, en ĉeesto de la polico! – finfine ankaŭ lin nervozigis...

. Eble la ĉefo jam vidis: tiu ĉi murdisto estas pli ruza ol kiu ajn el la lastjare renkontitaj. Tia afero ankoraŭ neniam okazis. La krimfarinto kontinuis sian «laboron» eĉ tiam, kiam sur liaj spuroj iris jam du detektivoj! Do tiu ulo certe estis decidinta je ĉio! – rekonis eĉ laŭte la ĉefo; feliĉe li ne permesis eldoni komunikon al la gazetaro kaj televido. Anstataŭ tio li promesis al la «hienoj», ke eble post du-tri horoj li respondos al iliaj demandoj. Tiamaniere li certigis iom da tempo por trankvila laboro de la kolegoj...



valizoj



### 1. Respondu al la demandoj.

Kiom da policistoj traserĉis la ĝardenon? Kiu esploris la tutan domon? Kiujn ĉambrojn? Kio okazis al la aĵoj de la domanoj, de la gastoj kaj de servistoj? En kia atmosfero oni servis al la tablo por la tagmanĝo? De kie estis liverita la tagmanĝo por la policistoj? Kial la maljuna ĉefo telefonis al la inspektoro? En kies ĉeesto okazis la dua murdo? En kiuj cirkonstancoj «laboris» la krimfarinto? Kion malpermesis la ĉefo? Je kio pretis la ĉefo post du-tri horoj? Por kio li bezonis tiun tempon?

### 2. Elektu la titolon por la legita fragmento aŭ elpensu iun alian.

Senhonta «laboro» de la krimfarinto. Ruza murdisto. Angora kaj nervoziga atmosfero en la domo.

3. Komparu scenon de serĉado en la rakonto de M. Bronŝtejn kaj en la fragmento de I. Nemere laŭ la skemo: loko – objekto de serĉado – celo de serĉado – rezulto.

## ***IX. Tralegu la versaĵon de pola aŭtoro Julian Tuwin en traduko de J.Handzlik.***

- 1. Voĉlegu la tekston de la versaĵo kaj traduku ĝin helpe de vortaro.*
- 2. Trovu en la versaĵo la kunmetitajn vortojn kaj klarigu ilian formigon.*
- 3. Parkerigu la versaĵon.*

### **Okulvitroj**

Okulvitrojn el la oro  
Perdis ie grandsinjoro.  
Tuŝas ambaŭ poŝotruojn,  
Dekstran kaj maldekstan ŝuojn.

Eĉ malfermis la ombrelon,  
Eĉ rigardis sub ĉapelon.  
Laŭte krias je ĉielo:  
«Certe jam okazis ŝtelo!»



ombrello

Ĉie serĉis: sub divano,  
En muŝtruo, en piano.  
Eĉ rigardis kamentruon,  
Ĉar pri tio havis dubon,

Eĉ sciigis pri la manko  
Policejon; ŝiris plankon.  
Kaj subite, nervozulo  
Ekrigardis la spegulon.

Kaj klariĝis turmentkazo:  
Ili estis sur la nazo.

### **Ŝlosiloj al la taskoj**

#### *Tasko V*

2) Antaŭ ol kudri mia avino ĉiam surmetas sian fingrington. Ĉe la muro staris malnova piano kun orumitaj kandelingoj. Unu el ornamaĵoj de tiu ĉi domo estis trofea glavo en glavingo. Depende de speco de cigaredoj ŝia frato uzis diversajn cigaredingojn: el ligno, sukceso, ostoj. Por ke okulvitroj servu longe necesas meti ilin en ingon.

#### *Tasko VI*

2) Radio misinformis pri hodiaŭa vetero: pluvas de mateno. Mi misaŭdis vian nomon, bonvolu ripeti ĝin. Aŭskultu atente la anoncon, por ne miskompreni. La eta vojo en arbaro miskondukis infanojn kaj ili perdiĝis. La lernanto estas laca. Li ofte miskalkulas. Tiu pasaĝero misrigardis horaron kaj maltrafis trajnon.

#### *Tasko VII*

завязать пакет – ligi pakajojn, завязать глаза – vindi la okulojn, завязать ботинки – ŝnuri botetojn, завязать узлом – nodi (nodligi), завязать галстук – nodi kravaton, завязать разговор – lanĉi konversacion, завязать торговые отношения – lanĉi komercajn (inter)rilatojn, завязать перестрелку komenci interpafadon, завязать ссору – ekmalpacigi, завязать переписку – ligi korespondadon (ekorespondi), завязать интригу – ligi (komenci) intrigon

## LECIONO 17

### Gramatiko



– **ajn** – адвербиальная частица, выражающая общую неопределённость и ставящаяся:

1) после относительных местоимений или наречий. *La spertaj Esperantistoj skribas per stilo preskaŭ simila, al kiu ajn nacio ili apartenus.* Опытные эсперантисты пишут почти одинаковым стилем, какой бы нации они не принадлежали. **Kia ajn** penso venu al vi, mi tutegale neos ĝin. Пусть какая угодно мысль придёт к вам, я всё равно буду отрицать её. **Kiom ajn** kostus tiu ĉi libro, mi nepre aĉetos ĝin. Сколько бы ни стоила эта книга, я непременно её куплю.

2) после неопределённых местоимений или прилагательных. *La ĉefo postulas, ke vi akceptu iun ajn decidon.* Начальник требует, чтобы вы приняли какое-либо решение. **Iam ajn** filoj venu, la patrino ĝojos al ili. Когда бы сыновья не пришли, мать будет рада им.

3) после обобщающих местоимений. **Ĉiu ajn** persono povas ellerni Esperanton. Любой человек может выучить эсперанто.

**Principo de NECESO kaj SUFIĈO.** Принцип необходимости и достаточности является логической базой словообразования в Эсперанто, которое основано на включении в состав любого (производного или сложного) слова всех морфем (корни, приставки, суффиксы, окончания), которые необходимы для выражения чёткого и полного значения слова, и изъятии всех морфем, отсутствие которых не влияет на значение слова: *purigi* вместо *puri* (чистить), *kombilo* вместо *kombo* (расчётка), *organizo* вместо *organizaĵo* (организация).

### Taskoj

**I. Difinu la signifon de sekvaj vortoj:** aresti, kostumo, milico, oceano, organizi, palmo, persono, stacio, ŝanco, vagono.



**II. Tralegu la tekston «Donaco por Miĉjo» kaj diru, en kiu parto de la diurno okazas la sceno.**

### **Donaco por Miĉjo**

Kelkaj steloj aperis en vespera sennuba ĉielo. Miĉjo, laca post la ekzercado kun Lena kaj Marko, ĵus ekdormis en sia dometo. Alta baraĵo ĉirkaŭ la parko kaj milicisto ĉe la pordego gardis ĝian kvietan dormon. La milicisto adiaŭis la elirintajn infanojn.

– Jen, panjo venas! – ekkriis Marko. – Ĉu okazis io?

– Sidiĝu en la aŭton, – vokis Lidia, enigme ridetante. – Ni urĝe veturu al la stacidomo. La trajno baldaŭ venos.

– Kial al la stacidomo? Kiu trajno? – scivolis la geknaboj.

– Eniru rapide. Ĉion vi estas vidontaj, – respondis Lidia.

Ili sukcesis veni, kiam la trajno estis aliranta al la kajo. Maksim, Anna kaj kelkaj aliaj homoj jam atendis tie. Saltis el vagono sunbruniĝinta barbulo en ĵinsa kostumo kaj ĉemizo kun palmoj.

– Paĉjo! – ekkriis Lena, ĵetante sin kune kun panjo al Anton.

– Nu-nu, miaj karaj, mi revenis! – feliĉe diris li, brakumante ilin. Poste li ĝoje intersalutis kun la aliaj kaj tiris el la teko iujn paperojn.

– Akceptu la donacon, Maksim, – diris li. – La donaco, tamen, estas ĉefe ne por vi...

– Kion signifas tio? – scivolis Maksim.

– Ni navigis en fora oceano kaj alboridiĝis en la haveno de unu bela insulo...

– Limpopo! – divenis Marko.

– Ĝuste estis Limpopo. Tie renkontis nin unu persono...

– La reĝo! – ekkriis Lena.

– La sultano. Li prezentis al ni sian parkon de elefantoj, la plej faman en la mondo. Li konfesis, ke li havis deziron akiri nian mamutidon por la parko. Kontraŭ ia ajn prezo! Eĉ per malhonesta rimedo.

– Aha! Li ĉion organizis, senhontulo! – diris Maksim – Li certe meritas punon.

– Li diris, ke li tre hontas nun, kaj ke nia veno estas por li la ŝanco malpliigi sian kulpon. Li enmanigis al mi ĉi tiujn dokumentojn. Ili atestas, ke la donaco estas destinita por nia parko. Verdire, iom peza estis la donaceto, tamen ni alveturigis ĝin. Konatiĝu, jen estas Manjo!

Li solene malfermis la pordegon de apuda ŝarĝvagono, kaj sur la kajon singarde elpaŝis juna elefantino Manjo.



sultano

### ***III. Proponu alian titolon de la legita teksto kaj pravigu ĝin.***

### ***IV. Jen estas la respondoj. Faru demandojn.***

Miĉjo kviete ekdormis en sia dometo en la parko. Neatendite venis Lidia. Lidia kaj la infanoj veturis peraŭte al la stacidomo. Maksim kaj Anna atendis tie. Lena kun sia panjo ĵetis sin al Anton. Anton kaj lia ŝipo navigis en fora oceano kaj alboridiĝis unu belan insulon. Tie renkontis ilin unu persono. La sultano prezentis sian parkon de elefantoj. Li konfesis, ke li havis deziron akiri la mamutidon por sia parko. La sultano volis malpliigi sian kulpon per donaco. La donaco estas destinita por la parko. Iom peza estis la donaceto. Manjo estis juna elefantino. Manjo elpaŝis singarde sur la kajon.

### ***V. Trovu en la teksto la frazojn, kiuj atestas pri intencoj de la sultano rilate al Miĉjo? Kiel vi povus karakterizi la sultanon?***

**VI. Enmetu anstataŭ punktoj sence konvenajn adjektivojn:** fama, honesta, kulpa, kvieta, laca, peza, solena.

Post multhora paŝado en montaro ni sentis nin ...j, tamen kontentaj. Al ... malfermo de la ekspozicio kolektiĝas honoraj gastoj. Ni ĝojas la aliĝon de ... persono al nia kolektivo. La knabo estis ..., ĉar formanĝis la bombonon de sia fratino. La ... vira laboro atendis laboristojn en haveno. István Nemere estas ... Esperanta verkisto. La varma kaj ... vespero plilongigis nian promenon en la parko.

**VII. Enmetu anstataŭ punktoj sence konvenajn verbojn:** akiri, bari, destini, diveni, konfesi, meriti, naĝi, signifi.

Subite li rimarkis la falintan arbon, kiu ...is la vojon al vojaĝantoj. Kiu ne scipovas ...i, devas esti singarda en rivero. Post la sukcesa koncerto la juna pianisto ...as varmajn aplaŭdojn. Domaĝe, sed mi ne povas ...i la sencon de ĉi proverbo. Dezirante ...i unikan libron, la studentino vizitis multajn librovendejojn. La hazarda renkonto sur la strato ...is ŝian vivon. Bedaŭrinde, via hobbio nenion ...as por via familio. La arestito ...is siajn krimojn.

**VIII. Kompilu frazojn korekte kunligante la partojn A, B kaj C.**

A	B	C
1. Stelo		a) vira manikhava vesto, portata sub kostumo.
2. Prezo		b) senkompensa dono kiel atesto de bonvolemo, amikeco, favoro.
3. Ekzerco		c) alta trotuaro konstruita laŭlonge de fervojo.
4. Nubo		ĉ) honto pro konscio pri malhonora, malbona, maldeca ago, penso.
5. Ŝanco		d) lertigo per ripetata praktikado.
6. Ĉemizo	estas	e) amaso da densaj akvovaporoj, pendanta en la supra atmosfero kaj kaŝanta la ĉielon.
7. Donaco		f) vendvaloro de objekto.
8. Puno		g) memlumanta ĉiela astro.
9. Kajo		ĝ) tio, kio servas por atingi celon.
10. Honto		h) sufero, kaŭzita malpermesita faro, kun la celo, ke oni ne faru tion plu.
11. Rimedo		ĥ) ebleco, probableco de sukceso.



***IX. Traduku en Esperanton la frazojn sekvante la principon de NECESO kaj SUFIĈO. Atentu la vortojn en kursivo.***

Береги здоровье смолоду! Я проведу свои каникулы в Крыму. Наши знакомые переехали в новую квартиру. Его разговорчивость меня всегда утомляет. Наша организация была создана 9 лет тому назад. Больного ребёнка изолировали в дальней комнате. Мы очарованы её грациозностью. Вахта моряков длится 5 часов. Необходимо соединить этот шнур. Дар портнихи ей перешел от матери. Сконцентрируйте своё внимание на моём задании. Руководство банком – дело не простое. В цивилизованном мире не должно быть войн. В футболе возможна замена одного игрока другим. История России знает имена богатых людей, которые занимались благотворительностью.



***X. Tralegu fragmenton el la libro «La Ŝtona Urbo» de angladevena italino Anna Löwenstein kaj diru, ĉu vi havas iun apartan rememoron pri iu donaco el via infanaĝo?***

**La Ŝtona Urbo**

... La fremduloj portis donacojn ankaŭ por la infanoj. Ili ĵetis al ni kelkajn ĉifonojn, en kiuj estis pluraj rondaj kuketoj. Mi sukcesis kapti nur unu, kaj opiniis ĝin la plej bongusta aĵo, kiun mi iam ajn manĝis. Ĝi estis kraka ekstere sed mola kaj frandinda interne, kun aparta gusto, kiun mi neniam forgesis. Kiam mi alvenis al Romo, mi ĉiam esperis denove gustumi tian kuketon, sed kvankam mi foje ricevas ion, kio memorigas min pri ĝi, nenio poste iam ajn precize rekaptis tiun perfektan kombinon de krakeco kaj fandiĝanta dolĉeco. Kaj cetere, homoj ne kutime malŝparas tiajn frandaĵojn, donante ilin al sklavo...



***1. Respondu al la demandoj.***

Kie kaj kiam, laŭ via supozo, okazas la sceno de la fragmento? Kiu alportis la donacojn? Kiel kaj al kiu estis disdonitaj la donacoj? Kio estis en ĉifonoj? Kia ĝi estis, la bongustaĵo? Kiom forta estis impresoj pri la gusto de la kuketo? Kiun kombinon havis la kuketo?

***2. Komparu grandecojn kaj signifon de donacoj priskribitaj en la teksto «Donaco por Miĉjo» kaj en la fragmento el «La Ŝtona Urbo». Kiu faris la donacojn? Al kiu? En kia formo?***

***3. Rakontu pri la donaco, kiun vi iam ricevis, laŭ la sekva plano.***

Priskribo de la tago, kiam okazis la evento.

Loko de la evento.



En kies ĉeesto (gepatroj, geamikoj, gekolegoj, nekonataj personoj ktp.).  
 En kiu formo (akompano de vortoj, gestoj, agoj).  
 Priskribo de la donaco (ekstera aspekto, formo, utileco ktp.)  
 Via reago al la donaco (modesta danko, kontenta rideto, ĝojkrio ktp.).

*XI. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:*

идти (ходить) в театр, идти вперед, идти вброд, идти мимо, идти назад, идти под руку, прошло много времени, ему идет пятый год, идет снег, идет дождь, идет собрание, пароход ходит по морям, поезд идет по расписанию, эта шляпка ей идет, идти на компромисс, идти в армию, идти ко дну, идти на ум, идет молва, речь идет о ..., лед идет, на платье идет два метра ткани, всё идет как по маслу, это растение идет на приготовление лекарства



*XII. Ni kantu «Karesas koron...», E-teksto de Ludmila Novikova.*

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin.
2. Kio estas kara por la animo de la aŭtoro?
3. Parkerigu la vortojn de la kanto.

Ka - re - sas ko - ron su - na fo - ro sen la ran - doj,  
 vas - ta - ĵoj blu - aj, ak - voj pu - raj de l' pat - ri'.  
 Kaj eb - le es - tas en la mond'pli be - laj lan - doj,  
 sed ne be - zo - nas ja pli be - lan lan - don mi.

Karesas koron  
 Suna foro  
 Sen la randoj,  
 Vastaĵoj bluaj,  
 Akvoj puraj  
 De l'patri'.  
 Kaj, eble, estas en la mond'  
 Pli belaj landoj.  
 Sed ne bezonas ja  
 Pli belan landon mi!

Karesas koron  
Rememoro  
Pri la nomo,  
Okuloj karaj,  
Firmaj manoj  
De l'amik'.  
Kaj, eble, estas en la mond'  
Pli bonaj homoj.  
Sed ne bezonas ja  
Pli bonan homon mi!

Karesas koron  
La sonoro  
De l'motivo,  
De ĉiuj sentoj  
Sakramenta  
Harmoni'.  
Kaj, eble, estas en la mond'  
Pli bona vivo.  
Sed ne bezonas ja  
Pli bonan vivon mi!

### **Ŝlosiloj al la taskoj**

#### *Tasko VI*

Post multhora paŝado en montaro ni sentis nin lacaj, tamen kontentaj. Al solena malfermo de la ekspozicio kolektiĝas honoraj gastoj. Ni ĝojas la aliĝon de honesta persono al nia kolektivo. La knabo estis kulpa, ĉar formanĝis la bombonon de sia fratino. La peza vira laboro atendis laboristojn en haveno. István Nemere estas fama Esperanta verkisto. La varma kaj kvieta vespero plilongigis nian promenon en la parko.

#### *Tasko VII*

Subite li rimarkis la falintan arbon, kiu baris la vojon al vojaĝantoj. Kiu ne scipovas naĝi, devas esti singarda en rivero. Post la sukcesa koncerto la juna pianisto meritas varmajn aplaŭdojn. Domaĝe, sed mi ne povas diveni la sencon de ĉi proverbo. Dezirante akiri unikan libron, la studentino vizitis multajn librovendejojn. La hazarda renkonto sur la strato destinis ŝian vivon. Bedaŭrinde, via hobiaĵo signifas por via familio. La arestito konfesis siajn krimojn.

#### *Tasko VIII*

1 - g	4 - e	7 - b	10 - ĉ
2 - f	5 - ĥ	8 - h	11 - ĝ
3 - d	6 - a	9 - c	

### *Tasko IX*

*Gardu* sanon de junaĝo! Mi pasigis mian *ferion* en Krimeo. Niaj *konatoj* translokiĝis en novan apartamenton. Lia *parolemo* min ĉiam lacigas. Nia *organizo* estis fondita antaŭ 9 jaroj. Oni *izoligis* malsanan infanon en fora ĉambro. Ni estas ĉarmitaj per ŝia *gracieco*. *Vaĉo* de maristoj daŭras 5 horojn. Necesas *kunligi* tiun-ĉi ŝnuron. *Dono* de kudristino *transiris* al ŝi de la patrino. *Koncentru* vian atenton sur mia tasko. *Administro* de banko estas ne facila afero. En *civilizita* mondo ne devas okazi militoj. En futbalo eblas *ŝanĝo* de unu ludanto al alia. Historio de Rusio konas nomojn de riĉaj personoj, kiuj okupiĝis pri *bonfarado*.

### *Tasko XI*

идти (ходить) в театр – viziti teatron, идти вперед – antaŭeniri, идти вброд – vadi, идти мимо – preteriri, идти назад – retroiri (returneniri), идти под руку – iri brak' sub brako, прошло много времени – pasis multe da tempo, ему идет пятый год – li estas en sia kvina jaro, идет снег – neĝas, идет дождь - pluvos, идет собрание – okazas kunveno, пароход ходит по морям – ŝipo navigas en maro, поезд идет по расписанию – trajno veturas laŭ horaro, эта шляпка ей идет – tiu ĉi ĉapeleto konvenas al ŝia vizaĝo, идти на компромисс – kompromisi, идти в армию – rekrutiĝi, идти ко дну – surfundiĝi, идти на ум – encerbiĝi, идет молва – ĉirkaŭiras (cirkulas) famo, речь идет о ... – temas pri ..., лед идет – la glacio flosas, на платье идет два метра ткани – por la robo oni bezonas du metrojn da ŝtofo, всё идет как по маслу – ĉio okazas tre glate, это растение идет на приготовление лекарства – tiu ĉi planto estas uzata por preparo de kuracilo

## LECIONO 18

### Gramatiko



### Tabeloj de konjunktioj kaj subjuktioj, interjektioj kaj partikuloj

(Таблица сочинительных и подчинительных союзов, междометий и частиц)

ankaŭ – тоже; также	kvankam – хотя	ĉu - ĉu – либо-либо, будь-будь
ankoraŭ – ещё	kvazaŭ – будто	jen - jen – то-то
aŭ – или	aŭ...aŭ – или...или	ju - des – чем-тем
ĉar – потому что	ĝis – до; до тех пор, пока	kaj - kaj – и-и
do – ну; итак; следовательно	tamen – однако; всё-таки	nek - nek – ни-ни
dum – в то время как	sed – а; но	ne nur ..., sed ankaŭ – не только ..., а также
kaj – и	se – если	
ke – что, чтобы	nek – ни	


aĥa – ага! ах! а! у! ба! ха!	eĥe! – эхехе!	halo! ha lo! – алло!
aĥem, hm – хм, гм!	ek! – давай!	hola! – эй! алло!
aĥ! – ах! увы!	fi! – тьфу	ĥop! – гоп!
adiaŭ – прощай!	ha ha! – ха! ха-ха-ха!	huŝ! – кш! кыш!
aj! – ай! ой!	halt! – стой!	hura! – ура!
ba! – ба!	ĥe – эй!	nu! – ну!
baj...baj – бай-бай	help! – на помощь!	oho! – ого!
bis! – бис!	hi hi – хи-хи!	stop! – стоп!
ĉit! ŝŝ! ts! – тсс!	ho! – о! ох!	ve – увы! ой-ой-ой!

ĉu – разве, ли	ja – ведь, же	jes – да
eĉ – даже	jen – вот	ne – нет, не
		po – по

### Tabelo de prepozicioj (Таблица предлогов)

lokaĵ	tempaĵ	ceteraĵ
antaŭ	antaŭ	
apud		
al		
ĉe		
ĉirkaŭ	ĉirkaŭ	da
de	de	de

ekster	dum	je
el		krom
ĝis	ĝis	kun
inter	inter	laŭ
kontraŭ	post	malgraŭ
post		per
laŭ		por
sub		pri
super		pro
sur		sen
tra		
trans		



### Kunmetitaj prepozicioj (Составные предлоги)

prefikso + prepozicio	disde, ekde
prepozicio + prepozicio	de sub, de antaŭ, de post, de sur, el inter, el trans, ktp.
prepozicio + tempadverbo	de kiam, de tiam, de nun, ĝis kiam, ktp.
- e + al	proksime al, responde al, rilate al, vidalvide al, ktp.
- e + de	dekstre de, maldekstre de, norde de, sude de, escepte de, helpe de, kaŭze de, komence de, meze de, okaze de, malproksime de, sekve de, najbare de, ktp.
- e + kun	kune kun, kompare kun, interkonsentite kun, ktp.

**I. Difinu la signifon de sekvaj vortoj:** antikva, aŭtobuso, bileto, centro, ekskurso, funkcii, hotelo, ĵongli, komforta, kvalito, nacio, originala, ornami, paro, reklami, rekomendi, rekompenci, sezono, spektaklo, turisto.




**II. Tralegu la tekston «Nepre vizitinda» kaj diru, kiujn novajn scipovojn akiris Miĉjo.**

### **Nepre vizitinda** (Reklampaĝo en turisma revuo)

por eksterlandaj turistoj estas urbeto en la centra Rusio, ne tro for de la ĉefurbo. Ni rekomendas al ĉiu gasto ekskursi tien per aŭtobuso. Egale konvenos por tio iu ajn sezono. La antikvaj preĝejoj, kampaniloj, ornamitaj lignaj dometoj estas logaj same inter profunda blanka neĝo, florantaj pomarboj, verda aŭ flavruĝa foliaro. Vi ĝuos ĉi tie provincan silenton kaj elstaran rusan kuirarton. La komforta hotelo «Mammouth» kun du- kaj unulitaj apartamentoj estas atinginta tristelan kvaliton.

Sed la plej memorinda festo, certe, iĝos por vi la vizito en la urban parkon. Tie atendas vin la unika paro da animaloj – la prahistoria mamuto Miĉjo kaj la ĉarma hinda elefantino Manjo. Ne dubu, aĉetante la biletojn, ĉar la ridindan prezon rekompencos vera plezuro.

Ĉe la suna vetero la paro libere promenas inter plantaĵoj; en okazo de pluvo, neĝo aŭ tro forta frosto ili restas en varma ejo. Tiel aŭ aliel la mastroj proponos al vi neforgeseblan spektaklon. Miĉjo kaj Manjo estas ŝercemaj spertaj artistoj. Ili bone regas arnumerojn por amuzi vin. Vi certe miros, kiam vi ekvidos propraokule, ke Miĉjo kapablas kalkuli, konas aritmetikon kaj eĉ skribas multajn vortojn per kredo sur nigra tabulo. La miraklon vi povas vidi nur ĉi tie! La originala paro allogas amason da homoj de multaj lingvoj kaj nacioj. Tamen oportuna horaro permesas eviti vicojn ĉe kiom ajn granda kvanto da vizitantoj.



Miĉjo kaj Manjo

Dum ekskurso en la parko vi devas obei nur tri postulojn – ne fumi, ne drinki kaj ne kunporti armilojn.

Originalajn bildojn de lokaj pentristoj, suvenirojn, librojn, insignojn kaj poŝtmarkojn vi povas aĉeti en la butikoj, kiuj funkcias en la parko kaj en hotelo.

Bonvenon al ni dum via ferio. Miĉjo kaj Manjo atendas vin!

**III. Trovu la komencon kaj la finon de la sekvaj partoj de la teksto.**

Provinca urbeto en la centra Rusio. Nepre vizitinda urba parko. Neforgesebla spektaklo de spertaj artistoj. Obeendaj postuloj. Ebla butikumado.

**IV. Jen estas la respondoj. Faru la demandojn.**

La urbeto, kie loĝas Miĉjo, troviĝas en la centra Rusio. Tien eblas ekskursi per aŭtobuso. Multaj antikvaj vidindaĵoj logas la eksterlandajn turistojn al la urbeto ajnasezone. En provinco ili ĝuos silenton kaj elstaran rusan kuirarton. La komforta hotelo «Mammouth» estas atinginta tristelan kvaliton.



### **V. Respondu al la demandoj de la dua parto de la teksto.**

Kie promenas la paro ĉe la suna vetero? Kie ili restas en okazo de pluvo? Kian spektaklon proponos al vi la mastroj? Kiaj artistoj estas Miĉjo kaj Manjo? Pri kio miras la vizitantoj ekvidinte ilin? Kiuj homoj venas en la urban parkon? Kiom multas la vizitantoj? Kio permesas eviti vicojn?

**VI. Relegu la obeendajn postulojn dum ekskurso en la parko kaj diru,** kiujn postulojn vi povus aldoni por la vizitantojn de ĉi parko? kiujn postulojn nepras obei vizitante iun teatron, kinejon? ekspozicion? lernejon, universitaton, laborejon? seriozan kunvenon? junularan dancejon?

### **VII. Traduku en Esperanton uzante la adverbon – ajn.**

Мои родители желают, чтобы я отдохнул сколько-нибудь. Зачем он уедет отсюда, где у него есть возможности сколько-нибудь заработать? Ребёнок радуется матери больше, чем кому-либо. Мы справимся с нашей проблемой без чьей-либо помощи. Эта карта может запутать всякого. Зная Эсперанто, легче изучить любой национальный язык. Опытные эсперантисты хорошо понимают друг друга, к какой бы нации они не принадлежали. Что бы я не сказал, всё кажется правдой. Как бы они не хитрили, они будут пойманы. Куда бы моряки не смотрели, они видели лишь воду и небо. Какую бы цену Вам не предложили, не продавайте свой дом. Сколько бы не длилась ночь, всё равно наступает новый день.

**VIII. Metu en la spacojn sekvajn verbojn:** drinki, fumi, ĝui, konveni, obei, pentri, postuli, preĝi, regi, serĉi.

La fraŭlino kapricis dirante, ke la koloro de la aŭto ne \_\_\_as al koloro de ŝia robo. Ju pli oni \_\_\_os, des pli malmulte oni ricevos. Post aĉa vetero en centra Rusio ni \_\_\_is varmon de la Krimea marbordo. Ĉiu infano devas \_\_\_i siajn gepatrojn. Dum katolika meso oni multe \_\_\_as kaj kantas psalmojn. La policianoj traserĉis la tutan domon: nun tie \_\_\_as malordo. «Mi nek \_\_\_as kaj nek \_\_\_as, nek knabinojn amindumas», – diris maljuna fraŭlo. Multaj junaj kaj talentaj estontaj Pikaso-j kaj Van Gog-oj sidas kun penikoj kaj farboj kaj \_\_\_as pejzaĝojn. Kiu \_\_\_as, tiu trovas.

### **IX. Tradukante en Esperanton atentu la vortojn en kursivo.**

Мы провели свой *отпуск* за городом. *Значок* эсперантистов – зеленая пятиконечная звезда на белом фоне. Эсперанто – международный *язык*, созданный польским врачом Л. Заменгофом. Мебель была сделана хозяином дома: стол, стулья, *кровать*, полки. Минувшей зимой на улицах было много *снега*. До позднего вечера во дворе дети играют в *мяч*. Журнал «Волна Эсперанто» издаётся в России. Чтобы купить билеты на новый спектакль в драматический театр, они долго стояли в *очереди*. В *солнечную и тёплую погоду* идут гулять в парки и сады, сидят на скамейках в скверах и аллеях. Необычная *тишина* царила на уроке математики.



## ***X. Traduku la esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:***

глубокая тарелка, глубокая осень, глубокий траур, глубокая старость, глубоко укоренившийся, в глубокой древности, глубокое изучение, глубокая ночь, глубокий мрак, в глубине души, глубокомысленный



## ***XI. Tralegu fragmenton el la rakonto de rusedvena usonano Boris Kolker kaj diru, kion «reklamas» la aŭtoro.***

### **Lando, kiu ne estas sur la mapo**

La lando Esperantujo. Ne serĉadu tiun landon sur la mapo – ĝin ne notis la ĉiosciantaj geografoj. Kaj tamen Esperantujo ekzistas – ĝi etendiĝas sur la tuta terglobo, ĝin enloĝas homoj de ĉiuj sociaj tavoloj – laboristoj kaj ŝtatestroj, lernejanoj kaj akademianoj; homoj de ĉiuj aĝoj – de balbutantaj beboj ĝis centjaraj maljunuloj; homoj de ĉiuj nacioj kaj haŭtkoloroj; homoj de ĉiuj profesioj, okupiĝoj, hobiaj, interesoj, temperamentoj. Esperantujo estas mondo en miniaturo. Tra la prismo de Esperantujo estas pli facile ĉirkaŭrigardi kaj kompreni la mondon.

Kio do unuigas la homojn en Esperantujo? Unue – la aspiro fortikigi la pacon kaj interkompreniĝon inter la popoloj. Due – la internacia lingvo Esperanto, kiu heredis ĉion plej bonan, logikan, esprimkapablan, kio ekzistas en naciaj lingvoj. Malgraŭ tio, ke esperantujanoj loĝas en Arktiko kaj en la tropikoj, sur montoj kaj sur Pacifikaj insuloj, sur ĉiuj kontinentoj, ili bonege komprenas unu la alian pro la admirinda unueco de la lingvo. Se en esperantlingvaj revuoj ne staras subskriboj sub artikoloj, oni ne kapablas difini laŭ la stilo, en kiuj landoj loĝas ties aŭtoroj.



terglobo

Centmiloj da esperantujanoj legas en la Internacia lingvo beletrajn, soci-politikajn, scienc-teknikajn librojn, centon da revuoj, filmojn, korespondas, kantas, parolas dum kongresoj kaj renkontiĝoj, en tendaroj kaj kluboj. Esperanto estas ne simple lingvo, sed ankaŭ rimedo de pacbatalo, ĝi estas romantiko, ĝi estas interesa kaj utila ŝatokupo....

...La romantika, mirakla simbola lando Esperantujo vokas vin transiri ĝian sojlon. Ankaŭ por vi, nova esperantujano, restas en ĝi multe da diversa grava, utila, interesa kaj agrabla laboro, ĉar, laŭ la jura formulo, permesita estas ĉio, kion ne malpermesas la leĝo. Estu konscia, klera kaj iniciatema esperantisto!

*1. Respondu al la demandoj.* Kiu ne notis la landon Esperantujo sur la mapo? Kie etendiĝas Esperantujo? Kiu ĝin enloĝas? Kio estas Esperantujo? Kio eblas tra la prismo de Esperantujo? Kio unuavice unuigas la homojn en Esperantujo? Kion heredis Esperanto el naciaj lingvoj? Pro kio esperantujanoj bonege komprenas unu la alian? Kion ebligas la Internacia lingvo? Ĉu Esperanto estas profesio aŭ ŝatokupo? Kia laboro atendas ajnan novan esperantujanon?

2. Kio en la «reklamita» Esperantujo kaj ĝia lingvo allogas vin?

3. Kompilu la reklampaĝon de via laborloko (lernejo, universitato, klubo) laŭ jenaj helpvortoj:

rekomendi – situi – konveni;

labori – studi – loĝi;

konstruaĵo – urboparto – trafikiloj;

horaro – laboro (studado) – labor(stud)ĉambro;

ĉefo (dekano) – gekolegoj (gestudentoj) – interrilatoj;

konferencoj – scienca tezo – premio (stupendio);

manĝejo – biblioteko – sporta halo – naĝejo;

ferio – banloko – eksterlanda vojaĝo.



## XII. Ni kantu «Ne, ne, ne», E-teksto de D.Lukjanec.

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin helpe de vortaro.

2. Klarigu ĉiujn gramatikaĵojn.

3. Parkerigu la tekston de la kanto.

### Ne, ne, ne

Muziko de Manuel

Refreno: Ne, ne, ne ni veturas tuj

Al la land' Esperantuj',  
Ĉar kunvenas post longa jar'  
En la arbaro amikar'.

Estos bonega renkontiĝ',  
Tondros la kantoj ĝis aŭror'.  
Tie okazos renaskiĝ'  
De niaj fortoj kaj humor'.

Refreno:

Nin ne timigas longa voj',  
Estas malplena la monuj',  
En ĉiu jar' po unu foj'  
Logas nin land' Esperantuj'.

Refreno:

Oni parolas: «pro agad'  
Mi vagabondas por ĉiam'» –  
Tiel postulas la movad',  
Mia esper' kaj mia am'.

Refreno:



malplena monujo

*Refreno*  
Bm (F7) Bm

Ne, ne, ne, mi ve - tu - ros tuj al la land' Es -

E<sup>b</sup>m Bm

pe - ran - tuj', ĉar kun - ve - nos post lon - ga jar'

F7 Bm ⊕ Bm

en la ar - ba - ro a - mi - kar'. 1. Es - tos bo - ne - ga

Bm<sup>7</sup>

ren - kon - tiĝ', ton - dros la kan - toj ĝis aŭ - ror',

E<sup>b</sup>m F7

ti - e o - ka - zos re - nas - kiĝ' de mi - aj for - toj

FINO  
Pli silenteme  
⊕ Bm

kaj hu - mor'... // Ĉar kun - ve - nos post

Bm F7 Bm

lon - ga jar' en la ar - ba - ro a - mi - kar'.

## Ŝlosiloj al la taskoj

### *Tasko VII*

Miaj gepatroj deziras, ke mi ripozu iom ajn. Por kio li forveturos de tie ĉi, kie li havas eblecojn iom ajn perlabori. Infano pli ĝojas al patrino, ol al iu ajn. Ni solvos nian problemon sen ies ajn helpo. Tiu ĉi mapo povas konfuzi iun ajn. Scipovante Esperanton estas pli facile ellerni ĉiun ajn nacian lingvon. Al iu ajn nacio ili apartenu, spertaj esperantistoj tre bone komprenas unu la alian. Ion ajn mi diru, ĉio ŝajnas vero. Iel ajn ili ruzu, ili tutegale estos kaptotaj. Ien ajn maristoj rigardu, ili vidis nur akvon kaj ĉielon. Iun ajn prezon oni al Vi proponu, ne vendu vian domon. Iom ajn daŭru nokto, tutegale venos nova tago.

### *Tasko VIII*

La fraŭlino kapricis dirante, ke la koloro de la aŭto ne konvenas al koloro de ŝia robo. Ju pli oni postulos, des pli malmulte oni ricevos. Post aĉa vetero en centra Rusio ni ĝuis varmon de la Krimea marbordo. Ĉiu infano devas obei siajn gepatrojn. Dum

katolika meso oni multe preĝas kaj kantas psalmojn. La policianoj traserĉis la tutan domon: nun tie regas malordo. «Mi nek drinkas kaj nek fumus, nek knabinojn amindumas», – diris maljuna fraŭlo. Multaj junaj kaj talentaj estontaj Pikaso-j kaj Van Gog-oj sidas kun penikoj kaj farboj kaj pentras pejzaĝojn. Kiu serĉas, tiu trovas.

### *Tasko IX*

Ni pasigis nian *libertempon* eksterurbe. La *insigno* de esperantistoj estas verda stelo sur blanka fono. Esperanto estas internacia *lingvo*, kreita de pola kuracisto L.Zamenhof. Meblaro estis farita de dommastro: tablo, seĝoj, *lito*, bretoj. Pasintan vintron estis multe da *neĝo* surstrate. Ĝis malfrua vespero infanoj ludas *pilkon* en korto. La *revuo* «Ondo de Esperanto» estas eldonata en Rusio. Por aĉeti biletojn por nova spektaklo en drama teatro ili longe staris en *vico*. Dum *suna* kaj *varma vetero* oni iras promeni en parkoj kaj ĝardenoj, oni sidas sur benkoj en skvaroj kaj aleoj. Neordinara *silento* regis dum leciono pri matematiko.

### *Tasko X*

глубокая тарелка – *suptelero*, глубокая осень – *fino de la aŭtuno*, глубокий траур – *granda funebro*, глубокая старость – *tre maljuna aĝo*, глубоко укоренившийся – *enradikiĝinta*, в глубокой древности – *en praeroko*, глубокое изучение – *ĝisfunda studado*, глубокая ночь – *malfrua nokto*, глубокий мрак – *plena mallumo*, в глубине души – *en profundo de l'animo*, глубокомысленный – *profundpens(em)a* (*profundsenca*)

## LECIONO 19



### **I. Tralegu la tekston «Io okazos...» kaj diru:**

- 1) je kies nomo estas ĝi estas rakontata.
- 2) kio estas la plej grava sekreto en la urbeto.

**II. Difinu la signifon de jenaj vortoj:** aboni, aktiva, biblioteko, dinosaŭro, diskuto, ekspozicio, evoluo, fiksi, filmo, imiti, konstanta, objekto, solida, trakti, vino.

### **Io okazas...**

Flugas la tagoj... Kvazaŭ en rapida filmo estas pasintaj du jaroj. Malantaŭ la vintro en la korton sinsekve venis blanka neĝo, helroza petalaro de pomarboj, verdajn foliojn ŝanĝis la oraj, denove ruliĝis neĝeroj... Kio okazas nun en nia urbeto?

Komence ni vizitu la parkon. Tie ni tuj vidos novan duetaĝan konstruaĵon, kie funkcias riĉega prianimala biblioteko kaj vasta ekspozicio pri evoluo de elefantoj. Sperta fakulo, sinjoro Krim, gvidos nin al pluraj objektoj kaj desegnaĵoj. Se ni aktive interesiĝos pri la temo, li, supozeble, prelegos por ni altnivele kaj eĉ subtenos viglan diskuton. Vere, tre afabla sinjoro – eĉ ne unu plendon li havis dum dujara servado. Same afabla estas graseta nigra kato Graf, kiu renkontas ĉiujn ĉe la eniro. Unika kato ĝi estas! Ĉar ĝi vendas biletojn kaj abonigas dezirantojn al la internacia revuo «MM» («Mamuta mondo»). Post fino de la ekskurso ĝi prezentas specialan libron, kie ni esprimu niajn impresojn kaj dankojn. Nur en marto Graf forestas – li prenas la monatan ferion por aranĝi vican edziĝfeston.

Ĉe la pordo de impona mamutejo ni eble renkontos oĉjon Boĉjo kun forkego. Li rapidas kuiri tagmanĝon por la loĝantoj. Boĉjo ne plu trinkas vinon, nur foj-foje bieron el skatoloj. Li havas multajn zorgojn nun, ĉar en la mamutejo jam estas tri konstantaj loĝantoj. Iru ni rekten, kaj ni vidos ilin.

Jen salutas nin la solida mamuto Miĉjo, jam pli ol tri metrojn alta kaj ĉirkaŭ tri tunojn peza. Apud tiu giganto eĉ Manjo, la elefantino, ŝajnas ne tre ampleksa. Sed rigardu ni – kiu estas inter ili? Iu tre simila al la iama Miĉjo. Ĝi eĉ imitas la paĉjon – levas la rostreton, salutante nin. Divenu ĝian nomon. Estas Marko, kiu donacis al la ido de Miĉjo kaj Manjo sian nomon. Li tre amas sian baptofilon kaj, malgraŭ multaj okupoj, vizitas ĝin kun plezuro. Kutime li kaj Lena venadas dum sabatoj por babili kun Miĉjo, iom tondi ĝiajn brunajn haregojn kaj por ŝanĝi belajn rubandojn sur oreloj de Manjo. Certe, ili kun granda peno instruas la etulon Markon, sed ĝi dume ne ĉion bone kaptas. Tamen, la geknaboj esperas, ke ĝi estos pli mapli edukita al veno de la sultano. Tiu gratulis ĉiujn pro la naskiĝo de Marketo antaŭ duonjaro, sendis por ĝi keston da anasoj kaj promesis veni somere. Li traktos kun Maksim la kondiĉojn por transloĝigi la etulon al Limpopo. Ni eksciis, kiel sekreton, ke dum familia kunsido (Lidia kun Maksim, Anna kun Anton, la geknaboj kaj la hundo Klajd) estis decidite: la etulo povos veturi al Limpopo nur post unu jaro. Sed la ĝentila sultano pretas atendi; li nur petas noti la daton.

Kaj jen estas la plej grava sekreto. Preskaŭ neniu scias ĝin, sed al vi mi rakontos tion ĉi. Ja ni tre amikiĝis dum la legado, ĉu ne? Jam dum unu monato Anton

denove navigas ie en sudaj maroj-oceanoj. Ne, tio ne estas sekreto, ja tio estas lia profesio – navigi per ŝipo. Sekreto estas la telegramo, kiu venis de li antaŭhierau. Ankaŭ mi legis ĝin: «Kvin grandegaj ovoĵ. Ŝajnas, ke dinosaŭraj. Renkontu. Anton». Io okazos...



### **III. Respondu al la demandoj.**

Kiom da jaroj pasis post la apero de Manĵo en la parko? Kio nova estis konstruita en la parko? Kio nun estas sinĵoro Krim? Kie oficas Graf? Kion li faras en marto? Kiel ŝanĝiĝis oĉĵo Boĉĵo? Kian aspekton havas Miĉĵo? Kiu videblas inter Miĉĵo kaj Manĵo? Por kio venas Marko kaj Lena dum sabatoj? Kiu gratulis ĉiujn pro la naskiĝo de Marketo? Kio estis decidite dum familia kunsido? Dum kiom da tempo kaj kie navigas Anton? Kion li skribis en sia telegramo?

### **IV. Parigu la partojn A kaj B por formi korektajn frazojn.**

#### **A**

En la parko ni vidos  
Sperta sinĵoro Krim gvidos nin  
Se ni interesiĝos pri la ekspozicio  
Graseta nigra kato Graf  
Oĉĵo Boĉĵo havas multajn zorgojn  
La solida mamuto Miĉĵo  
Manĵo ŝajnas ne tre ampleksa  
Marko kaj Lena venadas al la parko  
La sultano sendis por Marketo  
La etulo povos veturi al Limpopo  
En antaŭhieraua telegramo  
Anton denove navigas ie

#### **B**

kaj li ne plu trinkas vinon.  
nur por unu jaro.  
apud la giganto Miĉĵo.  
novan duetaĝan konstruaĵon.  
Anton avertas pri venigo de kvin ovoĵ.  
al pluraj objektoj de la ekspozicio.  
abonigas la dezirantojn al la revuo.  
en sudaj maroj-oceanoj.  
pezas pli ol tri tunojn.  
Krim prelegos por ni altnivele.  
keston da ananasoj.  
por babilu kun Miĉĵo.

### **V. Bonordigu la planon kaj resumu laŭ ĝi la tekston.**

Famili-kunsida decido.  
Unika kato Graf.  
Sinsekva ŝanĝo de sezonoj.  
Esperoj de Marko kaj Lena.  
La plej grava sekreto.  
Nova aspekto de la parko.  
Nuna ofico de oĉĵo Boĉĵo.  
Gratulo al naskiĝdato.  
Sperta fakulo Krim.  
Familia triopo.

### **VI. Helpe de la sufikso –id–**

1) faru novajn vortojn kaj traduku ilin:

ĉevalo, hundo, porko, koko, bovo;



2) traduku en Esperanton:

Дети окружили жеребёнка и угощали его травой. На ферму привезли очень много поросят. Весной прошлого года посадили саженцы, а теперь это – крепкие молодые деревья. Дочь принесла домой щенка и накормила его. Вдруг яйцо лопнуло, и появился желтый цыплёнок.

**VII. Plenigu la spacojn per sence konvenaj verboj:** aboni, bapti, esprimi, gratuli, gvidi, naski, ruliĝi.

Ĉi lernojare nia E-aktivulo \_\_\_as la kurson por komencantoj. Mia filino \_\_\_is bebon: mi aviniĝis. Por bone \_\_\_is iajn pensojn, necesas multe legi. Kutime oni \_\_\_as infanojn en preĝejoj. La nova aŭto de Paŭlo \_\_\_as rapide. Ne forgesu \_\_\_i la paron okaze de la geedziĝo. Ĉiu esperantisto devas \_\_\_i almenaŭ unu E-revuon aŭ E-ĵurnalon.

**VIII. Metu en spacojn sence konvenajn substantivojn:** forko, impresio, kondiĉo, nivelo, ovo, plendo, rubando.

Nur je \_\_\_\_, ke vi venos persone, mi redonos la ŝlosilon. La «Lingva Festivalo» pasis je alta \_\_\_\_. Nia granda nigra kokino metas \_\_\_n ĉiutage. La festa salono estis ornamita per deverskoloraj \_\_\_j kaj balonoj. En hotelo ne ĉesas \_\_\_j pro malbona priservo de turistoj. \_\_\_ estas reĝino de manĝilaro. Neforgeseblaj \_\_\_j lasis nia vizito al Parizo.

**IX. Kompilu la frazojn korekte kunligante la partojn A, B kaj C. Traduku la ricevatajn frazojn.**

1)

	A	B		C
1.	Biero	estas	a	agrabla, kontentiga sento.
2.	Fako		b	korola folio.
3.	Graso		c	fermenta trinkaĵo el lipolo kaj grenoj.
4.	Kesto		ĉ	malmola, travidebla kaj rompebla substanco.
5.	Peno		d	ujo, ordinare ligna, en formo de paralelepipedo.
6.	Petalo		e	aparta branĉo de scienco, arto, industrio ks.
7.	Plezuro		f	facile ŝmirebla kaj fandebla substanco.
8.	Vitro		g	energia ago de la korpo aŭ de la spirito al la celo.

2)

	A	B		C
1.	Desegni	tio estas	a	fortranĉi (lanon, harojn, herbojn ks).
2.	Flui		b	imiti per strekoj la formon de io.
3.	Tondi		c	diskuti pri la kondiĉoj de iu afero.
4.	Trakti		ĉ	moviĝi seninterrompe malsupren laŭ deklivo.

**X. Traduku la sekvajn esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:**

занавес опустился, птица опустилась на ветку, опуститься в кресло, опустить голову, опустившийся человек (морально), спуститься в погреб, опустить руки, опуститься на колени, спустить флаг





**XI. Tralegu fragmenton el la romano «Metropoliteno» de rusa aŭtoro V.Varankin kaj diru, kiel li priskribas la Zoo-logantojn.**

**Metropoliteno**

... En Zoologia ĝardeno (en Berlino-red.) min ravigas katoj. Ili sidas diverspoze en siaj kaĝoj. Kelkiuj severe sulkigis la vizaĝojn kaj memorigas miniaturajn leonojn, la aliaj brilas per la okuloj, kiel tigridoj, la triaj bonhumore kuŝas sur la planko kaj murmuris, sin ĵus satiginte... Leonidoj, tigridoj kaj katoj estas tiom similaj unu al alia, ke oni povas miskompreni... En Zoo najtingaloj konkuras kun estradaj kantistoj, amuzante la vizitantojn, kaj simioj kun aktoroj de la baletoj. Ili estas malpli graciaj, sed ankaŭ malpli postulemaj. La simioj ne postulas, ke la publiko ilin aplaŭdu. Ili aplaŭdas sin mem... La simioj ne estas nur aktoroj, sed ankaŭ bonaj gepatroj kaj laboruloj. Ĉi tie estas videblaj la plej delikataj scenoj de infannutrado. La pli aĝaj fratoj veturigas la pli malgrandajn en kaleŝoj, aŭ balancas ilin en apogseĝo... Sekvantaj najbaroj estas rozkoloraj ĝirafoj kun brunaj makuloj. Ili en io similas arganojn, aŭ longajn levilegojn super putoj en rusaj vilaĝoj, nomatajn tie gruoj. Poste sekvas antilopoj, kies unu speco memorigas ĉevalojn, kaj la alia bovojn... Struto kun protezita piedo, kiel senpieda invalido – malpacemulo ĉe la foiro, saltas ĉirkaŭ sia dupieda kamarado, vokante ĝin al la duelo... En Akvario, en sufokaeraj varmegaj ĉambroj, sub la ponto, en ŝlimo, kie putras algoj kaj lianoj, ĉirkaŭpreninte unu la alian, implikiĝis en la propraj tigoj kuŝas senmovaj aligatoroj kun pecoj da viando en buŝoj ...



zoologia ĝardeno en Berlino



*1. Respondu al la demandoj.*

Per kio diferencas la katoj en Zoologia Ĝardeno? Kun kiu konkuras najtingaloj? Kial simioj estas malpli postulemaj? Kion faras la simioj? Al kio similas ĝirafoj? Kiun memorigas antilopoj? Kiu vokas kamaradon al la duelo? Kiu kuŝas en ŝlimo?

*2. Priskribu la Zoo-logantojn laŭ jenaj helpvortoj:*

Berlino – Zoologia Ĝardeno – vizito,  
katoj – kaĝoj – kuŝas – sidas,  
najtingaloj – kantistoj – amuzas,  
simioj – baletaktoroj – laboruloj,  
ĝirafoj – arganoj – rusaj vilaĝoj,  
antilopoj – ĉevaloj – bovoj,  
struto – protezita piedo – saltas – duelo,  
Akvario – algoj – lianoj – tigoj,  
aligatoroj – ĉirkaŭpreninte – senmovaj – kuŝas.

*3. Kiu el Zoo-logantoj de «Metropoliteno» similas al la logantoj de la urbeto de «Mamutido Miĉjo» kaj per kio?*

NE KROKODILU!  
Parolu Esperanton!



#### 4. Memorfiksu nomojn de certaj animaloj:

**krokodilo** – granda kvarpieda danĝera rampulo, vivanta en grandaj riveroj de Hindujo kaj Afriko; **krokodili** (slange) – paroli nacian lingvon en E-ista medio;

**aligatoro** – Nord-Amerika kaj Afrika krokodilulo; **aligatori** (slange) – uzi la gepatran lingvon de unu el parolantoj en Esperantujo;

**kajmano** – Mez- kaj Sud-Amerika krokodilulo; **kajmani** (slange) – interparoli en alia, ne la gepatra, lingvo en Esperantujo.



#### XII. Ni kantu «Ni renkontiĝos» de ukraina aŭtoro V. Soroka.

1. Voĉlegu la tekston de la kanto kaj traduku ĝin helpe de vortaro.

2. Diru, pri kio kaj kiu nostalgias kaj revas la aŭtoro?

#### Ni renkontiĝos

Post mul - taj ja - roj ren - kon - ti - ĝos ni,  
ki - am ĉi tem - po es - tos hi - sto - ri',  
ki - am la nu - naj ta - goj pa - sos for,  
do, ki - on fa - ri, sed ne plen - das mi - a kor'. Ĉar ku - ne  
Ni ren - kon - ti - ĝos en a - mi - ka  
rond', ni ren - kon - ti - ĝos dum fe -  
li - ĉa temp', ni ren - kon - ti - ĝos...

Post multaj jaroj renkontiĝos ni,  
Kiam ĉi tempo estos histori',  
Kiam la nunaj tagoj pasos for,  
Do, kion fari, sed ne plendas mia kor'.

Ĉar kune  
Ni renkontiĝos en amika rond',  
Kaj rememoroj, kiel varma ond',  
Kaj niaj kantoj sonos ĝis aŭror',  
Niaj tendaraj kantoj – ĝojo kaj dolor'

Mi kredas,  
Vento kruela ne disigos nin,  
Ja en batalo venkos la obstin',  
Ja geamikoj en la tuta mond'  
Estas plej vera en la vivo firma font'.

Do, tial  
Ni renkontiĝos dum feliĉa temp',  
Fruaj hirundoj venos kun printemp',  
Suno unua kaj unua flor'  
Novan inspiron vekos en amika kor'.

Do, certe,  
Ni renkontiĝos en amika rond',  
Ni renkontiĝos dum feliĉa temp',  
Ni renkontiĝos...

### **Ŝlosiloj al la taskoj**

#### *Tasko VI*

Infanoj ĉirkaŭis ĉevalidon kaj regaligis ĝin per herboj. Al farmobieno oni venigis tre multe da porkidoj. La pasintjaran printempon oni plantis arbidojn, nun ili estas fortaj junaj arboj. Filino alportis hejmen hundidon kaj manĝigis ĝin. Subite ovo krevis, kaj aperis flava kokido.

#### *Tasko VII*

Ĉi lernojare nia E-aktivulo gvidas la kurson por komencantoj. Mia filino naskis bebon: mi aviniĝis. Por bone esprimi iajn pensojn, necesas multe legi. Kutime oni baptas infanojn en preĝejoj. La nova aŭto de Paŭlo ruliĝas rapide. Ne forgesu gratuli la paron okaze de la geedziĝo. Ĉiu esperantisto devas aboni almenaŭ unu E-revuon aŭ E-ĵurnalon.

#### *Tasko VIII*

Nur je kondiĉo, ke vi venos persone, mi redonos la ŝlosilon. La «Lingva Festivalo» pasis je alta nivelo. Nia granda nigra kokino metas ovon ĉiutage. La festa salono estis ornamita per deverskoloraj rubandoj kaj balonoj. En hotelo ne ĉesas plendoj pro malbona priservo de turistoj. Forko estas reĝino de manĝilaro. Neforgeseblaj impresoj lasis nia vizito al Parizo.

*Tasko IX*

1)

1. = c

3. = f

5. = g

7. = a

2. = e

4. = d

6. = b

8. = ĉ

2)

1. = b

2. = ĉ

3. = a

4. = c

*Tasko X*

занавес опустился – kurteno malleviĝis, птица опустилась на ветку – birdo sidiĝis sur branĉon, опуститься в кресло - sidiĝi en fotelon, опустить голову – klini kapon, опустившийся человек (морально) – senmoraliginta homo, спуститься в погреб – descendi (malsupreniri) en kelon, опустить руки – perdi esperon (senesperigi), опуститься на колени – genuiĝi, спустить флаг – malhisi flagon